


kultura revuo en esperanto

LITERATURA FOIRO

organo de esperanta PEN-centro

jaro 48 februaro 2017 n-ro 285



ISSN 0393-2907

Dumonata revuo, organo de LF-koop, fondita en 1970 de literatura rondo "La Patrolo"
 Posedas, eldonas, administras Kooperativo de Literatura Foiro (LF-koop), Svislando.

Nicolino Rossi <i>Via klepsidro</i>	uverturo	3
Perla Martinelli <i>Serenan kaj fruktodonan 2017!</i>	novjara saluto	5
Mikaelo Bronŝtejn <i>Bulgakov, eksterleĝa fenomeno</i>	nia kovrilo	6
Miĥail Bulgakov (Mikaelo Bronŝtejn) <i>Samogona lago</i>	rusa literaturo	9
Carlo Minnaja <i>De "Afero" ĝis "ĉaŭ" - 2</i>	zamenhofologio	14
Antonio Della Rocca (Perla Martinelli) <i>Historio rompita</i>	speciale PEN	22
Fernando Pita <i>Jacobson kaj Chomsky antaŭ surdmutulaj lingvoj</i>	lingvistiko	24
Giorgio Silfer <i>Ekzilo kaj azilo trans dudek mil leŭgoj...</i>	kino	28
Julian Modest <i>La bebo</i>	rakonto	30
Adin Ljuca (Zlatoje Martinov) <i>La gepatra(j) lingvo(j) de mia patrujo</i>	balkana prozo	33
Renato Corsetti <i>Mortis Tullio De Mauro, granda itala lingvisto</i>	ekskluzive	37
Vinko Oŝlak <i>Diino de ĉasado</i>	filozofio	38
Carmel Mallia <i>Transflugo, oka parto</i>	rememoroj	45
Esperanta PEN <i>Marjorie Boulton konfirmita</i>	Nobel-kandidato	47
Miĥail Lermontov (Espopore) <i>Demono mia</i>	interlude	48
Francisko Degoul recenzas <i>Kun la aromo de la estiĝa tempo</i>	religio	49
Carlo Minnaja recenzas <i>Steloj kaj revoj</i>	en vitrino	57
Anne Jausions recenzas <i>Hipokriteco fariĝas ĉefverko, per ...</i>	en vitrino	60

Ĉefredaktoro: Zlatoje Martinov. Asista redaktoro: Perla Martinelli. Redaktoroj: Marie-France Conde Rey (kino), Carlo Minnaja (recenzoj), Fernando Pita (lingvistiko), Giorgio Silfer (teatro).

Kontribuis al tiu ĉi numero: Nicolino Rossi, Mikaelo Bronŝtejn, Julian Modest, Renato Corsetti, Vinko Oŝlak, Carmel Mallia, Espopore, Francisko Degoul, Anne Jausions.

Redaktejo: Zlatoje Martinov, Otona Zupancica 24, 11070 Novi Beograd, Serbio, <lofo@esperantio.net>.

Administrejo: LF-koop, CP 928, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, <lf-koop@esperantio.net>.

Via klepsidro

de Nicolino Rossi

I.

*Via klepsidro
elĉerpas sian sablon,
mankas probable*

por aga pluo.

*La brikoj de l' konstruo
fendiĝe kraŝis.*

*Ĉe-horizontas
jam kelkaj nigraj korvoj,
vanuis solvoj*


*por malimpliko
de viaj ĉuoj antaŭ
la misterdiko.*

*En domsilento
vi paŝtas vian tedon
ĉe lun' ermita.*

*Nek ploras ĝi, nek ridas
pro via viv' fuŝita.*

II.

*Rompitas klepsidro. Refluas
la sablo al sunflavaj plaĝoj.
de via junco. Rokoj bluas
marhorizonte. En orkaĝoj
velkas viaj revoj pri glor'...
kaj via am' ŝrumpas muciden.
Rompitas revoj kaj sen plor'
sabligras via nun' ariden.
Via senpova kri' el ŝtono
pli akras ol ĉi maroklifo.
Vin stringas preme monotono
pli ol klopodo de Sizifo.
Eriĝas sablen viaj tagoj,
polviĝas viaj revimagoj.*



III.

*En ĉi val' aspra
aŭroroj sufokiĝas,
vulturoj kriĉas*

*la noktoj plumbas
kaj vi blindpalpe stumblas -
ĉu lasta falo?*

*ĝis hieraŭ tede
vi paŝtis la vesperojn
sub lun' rikana
spektonta vian morton
per sensurpriz' totema.*

*Januargrize
la tagovico lamas
vaken, vanuas
tristen. Aŭroroj ftize
sunpalon misreklamas. ❁*



Serenan kaj fruktodonan 2017!

Karaj legantoj, fidelaj geamikoj,

Ekis nova jaro, la 48a de via *Literatura Foiro*: jes, ĝi jam dum kvardek sep jaroj senpaŭze “pluportis la torĉon” de nia fierinda kulturo! Ankaŭ danke al via valora subteno, la revuo eniris la Novan Jaron kun renovigita elano, rigardante kun fido al la ne tiom fora momento, en kiu ĝi festos la oran jubileon de sia naskiĝo.

Kaj por konkrete esprimi nian dankemon al vi, karaj legantoj, la eldonisto elpensis esceptan donaceton: ĉi tiu unua numero de 2017 estas pli riĉa je ok plenaj paĝoj!

Krom la regula kaj akurata publikigo de LF, pasintjare nia eldonejo sukcesis same regule produkti dek sep numerojn de *Heroldo de Esperanto*, en la dudeka kaj lasta jarkolekto de “nia” epoko. Fakte, LF-koop vendis la gazeton al Sociala Grupo Lexus, en Brazilo, kies direktoro estas la konata publicisto Fabrício Valle. La vendo de HdE liberigas rimedojn kaj homajn resursojn por pli intensa aktivado de la librofako, kiun ni gratulas pro la dua represo de *Historio de la esperanta literaturo* kaj la preparo de nova, aktualigita eldono de la verko aŭtorita de niaj kooperantoj Carlo Minnaja kaj Giorgio Silfer. Prioritaton en la laborplano ni probable donos ankaŭ al la reeldono de *Paŝoj al plena posedo*, la fama perfektiga verko de William Auld.

Krome LF-koop aktivis kadre de la Pakto, kontribuante al la sukceso de la unua Arta Renkonto Transnacia en Esperanto, organizita de Fajzi Amika Rondo en Budapeŝto, kaj al la vigleco de Esperanta PEN-Centro, aktiva sur diversaj kampoj, interalie per siaj jam tradiciaj Literaturaj Kafejoj.

Karaj legantoj, kune ni trairis ankaŭ nigrajn momentojn: pensu tiurilate al la fidelaj kunlaborantoj, kiuj nin adiaŭis por eble pli feliĉa restado en alta loko. Dum la longa vivo de LF ni bedaŭrinde devis priplori multajn, laste nian admirindan Armando Zecchin, kiu, jam malsana, sendis sian lastan artikolon nur kelkajn tagojn antaŭ la forpaso. Ke ili ĝuu la merititan rekompencan: ilia ekzemplo daŭre akompanos kaj kuraĝigos nian poresperantan agadon.

Geamikoj, ĉiam pli veru kaj fortiĝu en nia “spirita familio” la difino ŝatata de Privat por la esperanta popolo: ke nin plu kunigu la memoro de la jam kune farita kaj la deziro tiel daŭri, kun ĉiam renovigita entuziasmo.

Feliĉan 2017, kaj denove dankon al vi ĉiuj!



**de Perla
Martinelli,
prezidanto
de LF-koop**

Bulgakov, eksterleĝa fenomeno

de Mikaelo
Bronŝtejn

Bulgakov venis al mi malfrue. Mi supozas, ke en mia junaĝa percepto liaj verkoj eligus por mi lumon multe pli brilan. Mi bedaŭras. Post la dua mondmilito eĉ la nomo de la verkisto estis malpermesita por mencio dum lecionoj pri la rusa literaturo. Ho, fakte, ne nur lia! Babel, Pilnjak, Platonov, Zoŝĉenko... longa listo de brilaj nomoj, malpermesataj tiutempe. La nomoj, kiujn mi ekkonis, jam estante studento, danke al sekreta aliro al *samizdat*¹ ricevita de miaj ĉefurbaj amikoj.

Tamen Bulgakov en tiu listo staras iom aparte. Laŭlegende, Boris Pasternak foje nomis lin *eksterleĝa fenomeno en la rusa literaturo*. Pasternak pravas. Kaj la lingvaĵo, kaj la temaro, kaj la idearo de la Bulgakov-verkoj esence apartigas ilin disde ĉiuj aliaj literaturaĵoj de la epoko. Ĝuste tiu ĉi trajto rezultigis raven kaj adoron de plimulto de la legantoj kaj samtempe malamon de kritikistoj, cenzuristoj ktp.

Bulgakov mem kalkulis, ke dum dek jaroj da literatura laboro en Moskvo li ricevis 298 mokajn recenzojn pri siaj verkoj, kaj nur tri estis laŭdaj. Ho, eĉ nun, en la dudek-unua jarcento, amaso da t.n. "ortodoksaj aktivuloj", agantaj ĉe

neafiŝita aprobo de la regantaro rusia, alvokas malpermesi "la fiajn diablaĵojn" de Bulgakov! Vanas la alvokoj – la nuntempa populareco de *Majstro kaj Margareta*, *La hunda koro*, *La fatalaj ovoj* kaj de multaj aliaj verkoj jam provizis certan senmortecon al la nomo de la aŭtoro.

Mihail Afanasjeviĉ Bulgakov naskiĝis en Kievo la 15^{an} de majo 1891. Post finstudo en la Unua kieva gimnazio, en 1909 li iĝis studento de medicina fakultato en loka universitato kaj en 1916 ricevis diplomon de kuracisto. Bonŝance – antaŭ la danĝeraj perturboj, kiuj ekis en Kievo kaj en la tuta lando en 1917. Poste li priskribis tiun teruran tempon en la fama romano *La tagoj de familio Turbin*.² Cetere, la perturboj ekis eĉ antaŭ lia diplomigo – en 1914.

Kiel studento Bulgakov kelkfoje skribe petis, ke oni sendu lin al la fronto, kiel militan kuraciston, sed la militistaj aŭtoritatoj ne rekrutis lin pro netaŭga sanstato. Do, diplomiginte, la juna kuracisto eklaboris en vilaĝo apud Kievo, kaj de tie li trafis la vorticon de la revoluciaj eventoj. La sorto ĵetis lin jen en la armeon de Ukraina Popola Respubliko, jen al la

¹ *Samizdat* - tajpitaj kopioj de literaturaĵoj malpermesitaj en Sovetunio, sekrete transirantaj de unu al alia libroŝatanto.

² Kun la titolo *La Blanka Gvardio* tiu romano parte aperis felietone en la revuo *Rossija* en 1926, kaj komplete nur en 1973.

Ruĝarmeo de bolŝevistoj, jen al la Blanka Gvardio – ĉie li plenumis sian profesian taskon – kuracis la homojn. Certe, li estus elmigrinta kun la blankgardianoj en 1920, kaj lia sorto, eble, estus alia, ne verkista. Sed la elmigron malhelpis subita morbo – tifo. Resaniĝinte, en septembro 1921 la tridekjara Bulgakov, sen mono, sen iaj utilaj kontaktoj, kuraĝis veni en Moskvon. Tie komenciĝis lia literatura biografio.

La sorto donis al li por tio nur dek ok jarojn. En 1940 Miĥail Bulgakov forpasis pro grava malsano de la renoj. Sed dum tiuj dek ok ege malfacilaj jaroj li sukcesis krei eksterordinare grandan verkaron: dek tri romanojn, dek unu teatraĵojn, ses filmscenarojn kaj operlibretojn, pli ol kvardek novelojn kaj nekalkulitan kvanton da felietonoj, gazetartikoloj ktp. La plejmulto de liaj verkoj famiĝis tutmonde, estis eldonitaj en multaj lingvoj, inkluzive esperanton, kaj multfoje reproduktitaj en kino kaj teatro.

Seriozaj obstakloj kaj baroj stumbligis sed ne haltigis la literaturan laboron de Bulgakov. Komence, en teruraj loĝkondiĉoj de la moskva komunego li estis pene vivtenanta sin kaj la edzinon per verkado de felietonoj por kelkaj moskvaj gazetoj.

Pli grandajn verkojn li kutimis prezenti al siaj konatoj antaŭ ol doni al iu redakcio por publikigo. Do en 1926 li voĉlegis partojn el la *Hunda koro* al grupeto de konatoj. Endas diri ĉi tie, ke la fikcia novelo

enhavis multajn preskaŭ malkaŝajn mokojn kontraŭ la bolŝevista regantaro. Ĉeestis inter la aŭskultantoj kanajlo, kiu poste lin denunciis. Sekvatage sekurecanoj traserĉis la loĝejon de Bulgakov kaj konfiskis la manuskripton de *La fatalaj ovo*, kaj ankaŭ la taglibrojn de la verkisto. La manuskripto estis redonita post du jaroj, la taglibroj malaperis.

En 1928 la cenzuristoj deklaris totalan malpermeson por publikigo de Bulgakov-verkoj. Dum du jaroj la senlabora verkisto skribis kvin leterojn al la soveta diktatoro Stalin, kaj, mirinde, post la kvina letero Stalin mem telefonis al li. La informo pri tiu telefonalvoko vastiĝis en Moskvo kaj estis ne tre aprokata de la literaturista medio. Tamen post tiu telefonparolo Bulgakov ricevis postenon de reĝisoro en unu el la plej famaj moskvaj teatroj – MĤAT,³ kaj verkis heroecan teatraĵon, *Batum*, pri la junaĝo de Stalin. La reĝisoran postenon en MĤAT Bulgakov okupis ĝis la grava ekmalsano en 1939. La teatraĵo *Batum* neniam estis surscenigita, dum la vivo de la protagonisto – pro persona malpermeso de tiu. Ankaŭ poste – pro objektivaj kaŭzoj.

Miaopinie la plej valora verko de Miĥail Bulgakov estas *La tagoj de familio Turbin*, sed mi restas inter la malplimulto. La plimulto adoras *La Majstro kaj Margareta*, kaj mi komprenas tion. Tiu ĉi verko – kun kolizioj humurplenaj en la soveta Moskvo kaj dolorplenaj, novtesta-



Miĥail Bulgakov

³ MĤAT - mallongigo de Malgranda Arta Akademia Teatro.

mentecaj, en la praepoka Jerusalemo – estas apenaŭ komprenebla ĝisfunde, sed samtempe tenta, brila, incitanta kaj, rimarkeble, multe turmentinta la aŭtoron. Tio ja estis. La unuan manuskripton de la romano Bulgakov mem forbruligis. Sekvis reverkado kaj polurado multjara, finfarita de la jam mortmalsana verkisto. *Min kvazaŭ la diablo mem retenas ĉe tiu verko* – diris Bulgakov. Ĉe la mortsojlo li petis la edzinon ĵuri, ke ŝi konservos kaj publikigos la verkon. Ŝi plenumis la ĵuron, konservinte la manuskripton, sed la romano estis unuafoje publikigita nur en 1966.

Ĉu Bulgakov estis informita pri esperanto? Certe, jes. Oni povas supozi, ke danke al aktiva, ofte eĉ agresa, propaganda agado de SEU la tuta legoklera loĝantaro de Sovetio estis bone informita. Mi trovis menciojn pri esperanto ĉe multaj tiuepokaj rusaj verkistoj, ekz. ĉe Aleksandr Kuprin, Aleksandr Grin, Konstantin Paustovskij, Varlam Ŝalamov. Jen do ankaŭ en la rakonto, prezentata al la legantoj de LF ĉi-sekve, aperas esperantisto, ho ve – pentrita, mildadire, ne tro pozitive. Tio absolute ne signifas negativan opinion de la aŭtoro pri esperanto. Sed certe ne longa klarigo estas bezonata ĉi-okaze.

Imagu do Rusion, kiu dum kvin jaroj estas regata de bolŝevistoj. Du jaroj pasis post la fino de la intercivitana milito. Inflacio – kelkmilprocenta, kvin milionoj da rubloj estis trinkmono, donata al dompuri-

gisto! Amaso da “burĝoj”, t.e. nobeloj, oficiroj, fabrikposedantoj k.s. fuĝis eksterlanden, iliajn apartamentojn la novaj regantoj disdonas al la “proletaj” familioj, ĉe tio en unu apartamenton estas enloĝigitaj kelkaj familioj tute ne parencaj(!) – ĉiu familio ricevas po unu ĉambro, sed kuirejo, banĉambro, neceso kaj koridoro estas komunuzaj. Tiel aperis la teruraj komunumoj, ĝis nun ekzistantaj en kelkaj rusiaj grandurboj. En la rakonto *Samogona lago* Bulgakov priskribas fakte la apartamenton, kie li kun la edzino estis loĝinta apud ses najbaraj familioj. La rolulino Annuŝka el la rakonto poste aperas ankaŭ en *La Majstro kaj Margareta* kun sia kurta sed fatala rolo. La problemon de kunloĝado de tute fremdaj homoj en unu apartamento igas eĉ pli terura la totala kaj ĉiutaga drinkado de la “proletoj”. Memfarado de brando estas formale malpermesita kaj laŭleĝe persekutata, sed preskaŭ en ĉiu domo oni produktas kaj vendas ĝin.

Ĝuste tian komunejon kaj ĝuste tian atmosferon trafas la aŭtoro, kiu estas devigita loĝi kaj verki inter la ebriaj proletoj. Lin malhelpas diboĉado de la najbaroj, ĉiutagaj skandaloj, vizitado de la malsobraj domservistoj, tradicie petantaj trinkmonon por la Paskofesto... Eĉ la esperantisto, veninta al li, estas ebriega, do ne surprizas, ke la verkisto nomas la lingvon abomeninda.

Jes, la aŭtoro ironie mokridas pri la situacio, tamen larmoj tuj videblas en lia rido. ☼

Samogona* lago

Je la deka vespere antaŭ la Paska Dimanĉo fine silentiĝis nia damnita koridoro. En la beata silento naskiĝis en mia sino bruliganta penso pri tio, ke plenumiĝis mia revo, kaj la cigared-vendantino, avinaĉo Pavlovna, mortis. Mi venis al tiu konkludo ĉar el la ĉambro de Pavlovna ne aŭdiĝis la krioj de ŝia torturata filo Ŝurka.

Kun volupta rideto surlipe, mi sidiĝis en trivitan fotelon kaj malfermis volumeton de Marc Twain. Ho moment' beata, hela temp'!

... Kaj je la deka kaj kvarono vespere en la koridoro trifoje kantis koko.

Koko ne estas io eksterordinara. Ja eĉ porkido loĝis dum duonjaro en la ĉambro de Pavlovna. Entute Moskvo ne estas Berlino, tio estas la unua kaŭzo, kaj due, personon, loĝantan dum jaro kaj duono en koridoro N-ro 50, oni povas mirigi per nenio. Ne la fakto de subita kok-apero timigis min, sed la cirkonstanco, ke la koko kantis je la deka vespere. Koko ne estas najtingalo kaj en la antaŭmilita tempo ĝi ĉiam ekkantis ĉe mateniĝo.

Ĉu tiuj kanajloj ebriigis la kokon? – lasinte Twain-on mi demandis mian kompatindan edzinon.

Sed tiu ne havis tempon por respondi. La intervenan kokan fanfaron sekvis senpaŭza ŝriko de la sama koko. Poste ekmuĝis vira voĉo. Ho kia voĉo! Tio estis senĉesa basa hurlado en C-dieso, hurlado de animdoloro kaj despero, antaŭmorta tristega muĝado.

Ekfrapis ĉiuj pordoj, ektondris paŝoj. Mi flankenĵetis Twain-on kaj impetis en la koridoron.

En la koridoro sub lampeto, en densa ringo de konsternitaj loĝantoj de la fama koridoro, staris civitano por mi nekonata. Liaj kruroj estis disigitaj kiel renversita V, li ŝanceliĝis kaj, ne fermante la buŝon, eligadis ĝuste tiun furiozan muĝadon, kiu timigis min. En la koridoro mi konstatis, ke la neklaran longdaŭran noton (fermaton) anstataŭis recitativo.

– Jen do – raŭke singultis kaj muĝegis la nekonata civitano, verŝante grandajn larmojn. – Kristo Resurektis! Haleluja! Do havu vin neniŭ! A-a-a-a!

Kaj tion dirante li ŝiradis faske plumaron el la vosto de la koko, kiu penegis liberiĝi el liaj manoj.

Sufiĉis unu rigardo por certiĝi, ke la koko estas absolute sobra. Sed survizaĝe de la

de Miĥail Afanasjeviĉ Bulgakov (1923)

elrusigis Mikaelo Bronŝtejn

* *Samogon* estas rusa forta brando, eksterleĝe memfarita. Ĉi tiu satiro estis unuafoje publikigita 29.07.1923 en la revuo *Antaŭtage*, en 1926 ĝi eniris la libron *Traktato pri loĝejo* eldonita de *Tero kaj Fabriko* en Moskvo, poste ĝi reaperis en kelkaj kolektoj pri Bulgakov.

koko montriĝis terura sufero. Ĝiaj okuloj elorbitiĝis, ĝi arde svingadis la flugilojn kaj daŭre penadis liberiĝi el la kapto-lertaj manoj de la nekonato.

Pavlovna, Ŝurka, la ŝoforo, Annuŝka, Miŝa la edzo de Annuŝka, la edzo de Dusjka kaj ambaŭ Dusjkaj staris ringe en kompleta silento kaj senmove, kvazaŭ enbatitaj planken. Ĉi-foje mi ne kulpigas ilin. Eĉ ili perdis la parolkapablon. Scenon de senplumigo de viva koko ili vidis, samkiel mi, por la unua fojo.


La loĝejestro de N-ro 50, Vasilij Ivanoviĉ, acide kaj des-pere ridetis; kaptante jen la nekapteblan flugilon, jen la krurojn de la koko, li provis forpreni ĝin de la nekonata civitano.

– Ivan Gavriloviĉ! Timu Dion! – ekŝrikis li, sobriĝante antaŭ miaj okuloj. – Neniu vian kokon prenas, damnita ĝi estu trifoje! Ne turmentu la birdon ĉe la Hela Krista Resurekto! Ivan Gavriloviĉ, rekonsciiĝu!

Mi reakiris sinregon pli frue ol ĉiuj kaj inspirakrobate forigis la kokon el la manoj de la civitano. La koko impetis sor, peze frapis la lampeton, poste sobiĝis kaj malaperis trans la koridorturno, tie, kie situas la formetejo de Pavlovna. Kaj la civitano momente paciĝis.

Diru ĉion ajn, sed la okazintaĵo estis eksterordinara, kaj nur tiakaŭze ĝi finiĝis bonorde por mi. La loĝejestro ne diris al mi ke, se al mi ne plaĉas tiu ĉi loĝejo, mi povas ja trovi luksan vilaon. Pavlovna ne

diris, ke mi trouzas la lampeton ĝis la kvina matene, okupiĝante pri “neklare kiaj aferoj”, kaj ke ĝenerale mi tute malrajte entrudiĝas en ŝian vivon. Ke ŝi rajtas draŝi Ŝurkan, ĉar tiu estas ŝia Ŝurka. Kaj ke mi ekhavu “miajn ŝurka-jn” kaj manĝu ilin kun kaĉo. Mi rebatis: “Aŭdu, Pavlovna, se vi plian fojon batos la kapon de Ŝurka, mi pledos en la juĝejo, kaj vi ricevos jaran prizonigon pro torturado de la infano” – sed tio ne bone helpis. Pavlovna siavice minacadis, ke ŝi portos “peticion” en la administrejon por ke oni forigu min el la loĝejo. “Se iu ne kontentatas, iru li tien, kie doktuloj loĝas”.



Kurtadire, ĉi-foje nenio simila okazis. En ĉerka silento disiris ĉiuj loĝantoj de la apartamento plej fama en Moskvo. La nekonatan civitanon la loĝejestro kaj Katerina Ivanovna je kubutoj forkondukis sur la ŝtuparon. La nekonato, punca, iris tremante kaj ŝanceliĝante, silente kaj eliginte la murdo-pretajn, estingiĝantajn okulojn. Li similis veneniton per hiskiamo (*atropa belladonna*).

La senfortiĝintan kokon Pavlovna kaj Ŝurka kaptis el sub barelo kaj ankaŭ portis for.

Katerina Ivanovna rakontis postrevene:

– Iris do tiu filo de hundo (legu “loĝejestro” – la edzo de Katerina Ivanovna) kiel bonmorulo por aĉetaĵoj. Aĉetis li tamen kvaronon¹ ĉe Sidorovna. Gavriĉ-on li invitis – iru ni, li diris, gustumu. Ĉiuj homoj homas, sed ili ebriiĝis, indulgu Sinjor’ mian pekon, kiam eĉ la popo ankoraŭ ne sonorigis en la preĝejo. Ne imagas mi tute, kio okazis al Gavriĉ. Drinkis do ili, poste la mia al li diras: ne iru ci, Gavriĉ, en la necesejon kun via koko, donu ĝin al mi, mi tenu ĝin dume. Sed tiu furioziĝis ial. Ha, li diras, ci, li diras, kokon mian volas akapari! Kaj komencis li muĝi. Kio ŝajnis al li, dio ĝin scias!..

Je la dua nokte la loĝejestro, malfastiĝinte, frakasis ĉiujn vitrojn, bategis la edzinon – kaj sian agon klarigis per tio, ke ŝi forvoris lian vivon. Tiutempe mi kun mia edzino ĉeestis matutininon, kaj la skandalo okazis sen mia partopreno. La

loĝantaro de la apartamento maltrankviliĝis kaj vokis la prezidanton de la administraro. La prezidanto de la administraro aperis senprokraste. Kun brilantaj okuloj kaj ruĝa kiel flago li rigardis al la bluiĝinta Katerina Ivanovna kaj diris:

– Miras mi pro ci, Vasilj Ivaniĉ. Ĉefo de la domo ci estas – sed la virinaĉon ci ne povas regi.

Tio estis la unua okazo en la vivo de nia prezidanto, kiam lin ne ĝojigis la propraj vortoj. Persone li, la ŝoforo kaj la edzo de Dusjka devis senarmigi la freneziĝintan Vasilj Ivaniĉ, ĉe kio li tranĉvundis sian brakon (Vasilj Ivaniĉ post la vortoj de la prezidanto sin armis per kuirtranĉilo por buĉi Katerinan Ivanovnan. “Do mi montru al ŝi”).

La prezidanto, ŝlosinte Katerinan Ivanovnan en la formejo de Pavlovna, mensogis al Ivaniĉ, ke Katerina Ivanovna estas fuĝinta, kaj Vasilj Ivaniĉ endormiĝis, dirinte:

– Estu tiel. Mi ŝin buĉu morgaŭ. Ŝi miajn manojn ne eskapos.

La prezidanto foriris, dirinte:

– Jen kian samogonon faras Sidorovna. Bestecan samogonon!

Je la tria horo nokte aperis Ivan Sidoriĉ. Mi deklaras publike: se mi estus viro, ne ĉifonaĉo, mi, certe, ĵetus tiun Ivan Sidoriĉ for el mia ĉambro. Sed mi timas lin. Li estas la plej potenca persono en la administraro – post la prezidanto. Eble, li ne sukcesus senigi

1 Kvarono – botelo 2,5-litra, t.e. kvaron-sitela.

³ Pro la terura inflacio, kvin milionoj estis tiam negranda trinkmono.

min je la loĝejo (sed eble, eĉ li sukcesus, diablo lin konas!), sed venenigi mian ekzistadon li povas tute libere. Tamen por mi ĝuste tio estas la plej terura. Se oni venenigos mian ekzistadon, mi ne povos verki felietonojn, sed se mi ne verkos felietonojn, okazos financa ruiniĝo.

– S-s-salut... civitano ĵurn...listo, – diris Ivan Sidoriĉ, ŝanceliĝante, kiel herbero ĉe vento. – Mi al vi venis.

– Tre agrable.

– Mi ve-nis por esperan-to... Informon endus skribi... artikolon... Deziras mi fondi soc-cieton... ĝuste tiel endas skribi. Ivan Sidoriĉ, esperantisto, deziras do...

Kaj subite Sidoriĉ ekparolis en esperanto (cetere: mirige abomena lingvo).

Mi ne scias, kion legis la esperantisto en miaj okuloj, sed subite li ŝrumpis, la strangaj vortaĉoj, similaj al miksaĵo de latin-rusaj vortoj, komencis rompiĝi, kaj Ivan Sidoriĉ revenis al komprenebla lingvaĵo.

– Cetere... pardon... mi morgaŭ.

– Bonvenon, – milde respondis mi, venigante Ivan Sidoriĉon al la pordo (li iakaŭze volis eliri tra la muron).

– Ĉu ne eblas lin peli for? – demandis mia edzino post lia foriro.

– Ne, bebeto, ne eblas.

Matene je la naŭa la festo ekis de mateloto², prezentita de Vasilij Ivanoviĉ perharmonike (dancis Katerina Ivanovna), kaj de parolado de frakase ebria Miŝa, la edzo de Annuŝka,

adresita al mi. Miŝa je sia nomo kaj je la nomo de civitanoj por mi nekonataj, esprimis al mi sian estimon.

Je la deka venis la subpurigisto (iom drinkinta), je la 10.20 – la dompurigisto (morte ebria), je la 10.25 – la hejtisto (en terura stato). Li silentis kaj silente foriris. La 5 milionojn³, donitajn de mi, li perdis tuj en la koridoro.

Tagmeze Sidorovna arogante ne finverŝis je tri fingroj la kvaronon por Vasilij Ivanoviĉ. Li tiam, preninte malplenan kvaronan ujon, direktis sin tien, kien endas, kaj deklaris:

– Samogonon oni vendadas. Mi petas pri aresto.

– Ĉu ci ne misas? – morne oni demandis lin tie, kie endas. – Laŭ niaj informoj, samogono en via kvartalo forestas.

– Ĉu forestas? – amare ridetis Vasilij Ivanoviĉ. – Viaj vortoj estas vere sublimaj.

– Do jes, forestas. Ja kia maniere ci estu sobra, se tie vi havas samogonon? Iru for kaj satdormu por via bono. Morgaŭ ci skribos plendon pri tiuj, kiuj vendas samogonon.

– Jen-do... mi komprenas... – diris Vasilij Ivasnoviĉ kun embarasa rideto. – Tio estas, ke mankas por ili puno, ĉu ne? Ke ili rajtas verŝi neplene. Sed rilate kial sobra mi estas, volu flari la kvaronon.

Evidentiĝis, ke la kvarono posedas *klare kapteblan odoron de fuzelo*.

– Konduku nin tien! – oni diris al Vasilij Ivanoviĉ. Kaj li faris.

Kiam Vasilij Ivanoviĉ vekis

² Mateloto – danco, tiuepoke populara.

ĝis, li diris al Katerina Ivanovna:

– Kuru do al Sidorovna, plenigu la kvaronon.

– Rekonsciiĝu, animo damnita, – respondis Katerina Ivanovna. Sidorovnan oni fermis.

– Kiel? Kiel do oni eksciis?

Mi jubilis. Sed ne por longe. Post duonhoro Katerina Ivanovna revenis kun plena kvarono. Evidentiĝis ke ekfunkciis nova fonto – ĉe Makeiĉ, du domojn post tiu de Sidorovna. Je la sepa vespere mi pene liberigis Nataŝan el la manoj de ŝia edzo, la bakisto Volodja (“Vi ne rajtas bati ŝin!”, “Ŝi estas mia edzino” kotopo).

Je la oka vespere, kiam ektondris arda mateloto, kaj ekdancis Annuŝka, mia edzino leviĝis de la divano kaj diris:

– Mi ne povas plu. Faru kion vi volas, sed ni devas foriri de tie ĉi.

– Bebeto, – mi respondis en despero. – Kion mi povas fari? Mi ne povas akiri ĉambron. Ĝi kostas 20 miliardojn, mia salajro estas kvar. Antaŭ ol mi finverkos mian romanon, ni povas esperi je nenio. Toleru.

– Ne pri mi mi zorgas, – respondis la edzino. – Sed vi neniam finverkos la romanon. Neniam. La vivo estas senespera. Mi venenigu min per morfino.

Ĉe tiuj vortoj mi eksentis, ke mi iĝas fera.

Mi respondis, kaj voĉo mia estis plena je metalo:

– Vi ne veneniĝos per morfino, ĉar tion mi ne permesos

al vi. Sed la romanon mi finverkos, kaj mi kuraĝu certigi vin: ĝi estos tia romano, ke pro ĝi la ĉielo varmiĝos.

Poste mi helpis la edzinon vesti sin, ŝlosis la pordon, petis Dusja-n la unuan (ŝi drinkas nenion krom portovino) zorgi, ke neniu rompu la seruron, kaj forveturigis la edzinon al Nikitskaja-strato, por pasigi la tri festotagojn ĉe ŝia fratino.

KONKLUDO

Mi havas projekton. Mi surprenas la taskon dum du monatoj efektiviĝi la malEbriigon de Moskvo – se ne komplete, do je 90%.

Miaj kondiĉoj: la aferon estru mi. La teamon de miaj helpantoj mi mem formu el la studentaro. Salajro ilia devas esti tre alta (eble, 400 rublojn orajn. La afero pravigos tion). 100 personoj. Al mi oni prezentu apartamenton – tri ĉambroj kaj kuirejo, plus momentan pagon de 1000 rubloj oraj. Pension por la edzino en okazo, se oni min mortigos.

Mia prokuro estu nelimigita. Laŭ mia ordono oni arestu senprokraste. Juĝproceso enkadre de 24 horoj, kaj neniam anstataŭoj per monpuno.

Mi efektiviĝos frakason de ĉiuj Sidorovnaj kaj Makeiĉoj kaj respegule samtempan frakason de la “anguletoj”: *Floroj de Kartvelio, Kasteloj de Tamara* kaj similaj ejoj.

Moskvo iĝos kiel Saĥaro, kaj en oazoj, sub elektraĵafiŝoj *Malfermita ĝis la dekdua nokte* oni vendos nur leĝerajn vinojn, ruĝajn kaj blankajn. ❁

De “Afero” ĝis “ĉaŭ” - 2

de Carlo
Minnaja

Ĉi tie sekvas ĉerpaĵo el la menciita letero de Zamenhof al Kofman:*

Kara Sinjoro! [...]

Lingvo internacia fortikiĝos por ĉiam nur en tia okazo, se ekzistos ia grupo da homoj, kiu akceptas ĝin kiel sian lingvon familian, heredan. Cento da tiaj homoj estas por la ideo de lingvo neŭtrala multege pli grava ol miliono da aliaj homoj. Hereda lingvo de la plej malgranda kaj plej sensignifa popolo havas vivon multege pli garantiitan kaj neestingeban, ol senpopola lingvo, kiun uzus eĉ miliono da homoj.

Jes, mi estas profunde konvinkita, ke nek solvo de la hebrea demando, nek enradikiĝo de lingvo neŭtrala estos iam ebla sen hilelismo, t.e. sen kreo de neŭtrala popolo.³

Kelkaj historiistoj kaj ekzegezistoj vidas en tiu ĉi letero la komencan ideon de *esperantista popolo* baziĝanta sur *denaskaj esperantistoj*, heredantoj de la lingvo en la familia medio. Tamen la prognozo de Zamenhof estis klara: se ne formiĝos neŭtrala popolo, la lingvo ne enradikiĝos; siaflanke, la Bulonja Deklaracio nete disigos la uzadon de la lingvo disde ĉia hilelista principo. La denaskaj esperan-

tistoj efektive tra la tempo tre multiĝis laŭnombre, tamen ne ofte videblas, ke ili formis novan esperantlingvan familion kun postageraciaj denaskuloj, kiuj herede transprenis la lingvon kaj herede ĝin pludonis. La manko de komuna teritorio, la efektiva sporadeco de okazoj de esperantlingvaj renkontiĝoj (kvankam lastatempe forte oftigantaj), lasas la esperantistojn kiel diasporan parolkomunumon. La ideo de popolo aplikata al la esperantistoj konkretiĝos poste kun la regule okazantaj kongresoj, la multaj pli malgrandaj kunvenoj, la multnombriĝo de la gazetoj, la larĝa plivastiĝo de la literaturo kaj de la kulturaj iniciatoj, la renkontiĝoj de esperantistaj familioj. Firmaj asertantoj pri la ekzisto de jam formiĝinta esperantista popolo estos plej frue Privat, Baghy, Forge kaj Emba; post la milito pleje Lapenna kaj Tonkin. Se Tonkin verkas en 2006, *Lingvo kaj popolo*, Emba (hungaro, pseŭdonimo de Imre Baranyai) en sia *En ekzilo* (Literatura Mondo, 1938) firmakrede diras: *Popol' ni estas, ne movado nura / kaj nia land' la tuta tuta ter'.* / *Standardo nia, de sangverŝoj pura, / portas koloron verdan de l' esper'.* [...]

* Vidu la numeron 284 de *Literatura Foiro*, p. 321.

³ OV, p. 322-323, kie troviĝas ankaŭ ampleksa komentario pri la retrovo de tiu letero kaj pri la dato kaj situacio en kiu ĝi estis skribita.

Popol' ni estas ĉie en popoloj, / kulturon propran portas per torĉflam'. / Kojniĝis ni en ĉiuj homtavoloj. / Aŭ – tiel estu, se ne estas jam.

Ankaŭ la letero al Schneeberger restis preskaŭ nekonata, tre verŝajne ĉar ankaŭ Schneeberger transiris al Ido.

Sed jen aperas, preskaŭ enrompas, alia termino, kiu restos forte signifoplena dum multaj jardekoj: *samideano*. En la inaŭgura parolado de la Bulonja kongreso, Zamenhof tiel startas:

Estimataj sinjorinoj kaj sinjoroj! Mi salutas vin, karaj samideanoj, fratoj kaj fratinoj el la tutmonda familio, kiuj kunvenis el landoj proksimaj kaj malproksimaj el la plej diversaj regnoj de la mondo, por frate premi al si reciproke la manojn pro la nomo de granda ideo, kiu ĉiujn nin ligas.

Do en ĉi tiu kunteksto la vorto *samideano* havas forte ideologian karakterizon: la samideanoj estas fratoj kaj fratinoj, ili venis por frate premi al si reciproke la manojn, ili venas el plej diversaj mondopartoj kaj estas ĉiuj ligitaj de granda ideo; do la termino alprenis tiun konotacion, kiu antaŭe estis esprimita per *frato*, kaj restas insistata la mencio pri la diasporo. La dua parolado en Ĝenevo pri la interna ideo kaj la tria en Kembriĝo pri la signifo de la kongresoj plifirmigis la senton de interna solidaro en la komunumo de la esperantistoj kaj plifortigis la identecon esprimatan de tiu vorto.

Ŝajne la unua okazo en kiu estas trovebla la termino *samideano* estas letero de Zamenhof al Devjatnin, 15.6.1891,⁴ sed ĉiuj aliaj leteroj havis *kara/estimata sinjoro*, (*tre*) *kara/estimata amiko*, *kara kolego*, aŭ, kiam skribite al doktoro pri medicino, *kara kunfrato* (laŭ franca influo). Tre verŝajne tiu frue unika okazo estis simple traduko el la rusa lingvo *je-dinomyšlennik* - samdoktrinano, sampartiano. En signifo proksimigebla al la posta *samideano* Zamenhof en la fruaj tempoj uzadis *kunbatalanto*, termino kiu troviĝas ankaŭ ĉe Beaufront en 1891.⁵ Laŭ noto en la *Historia vortaro* de Gonçalo Neves (2011, p. 5) unua apero de *samideano* estas registrita en *Lingvo Internacia* (1897, n-ro 2, p. 18), antaŭata samrevue (1896, n-ro 10-11, p. 188) de simila formo *kunideano*.⁶ Tamen, tie, ĉe *samideano* la kunteksto rilatis al tradukanto, kiu devus esti persono kiu same sentas mense kaj pense kiel la tradukota aŭtoro, kaj ĝi tute ne rilatis al sameco pri la ideo de favorado kaj disvastigo de la lingvo internacia sur bazo neŭtrale homa. Kaj ankaŭ ĉe la frazo de 1896, en iom alia kunteksto, treni la vorton *kunideano* al la signifo de *kunbatalanto por la ideo de lingvo internacia* estas iom perforte. La ideoj estas ja similaj, sed ne rilatas specife al la apogo al internacia lingvo.

Do, ŝajne, ĉi tiu termino ne enradikiĝis en la tute frutempa uzado. Ĝi troviĝas kelkajn jarojn poste (1903, 1904) en

⁴ V. N. Devjatnin: *Rememoroj de malnova esperantisto*, LNE, decembro, 1929, p. 72; represita en A. Holzhaus, *Zamenhof - Leteroj*, Helsinko, 1975, p. 26.

⁵ PVZ, *La franca periodo de esperanto*, kajero 6-bis, p. 4.

⁶ Respektive: *Preferinde devas traduki aŭ la aŭtoroj mem aŭ iliaj samlingvanoj, samlandanoj, samideanoj, entute iliaj 'alimiuloj' (alter ego), kiuj tute bone komprenas la aŭtoron, kaj uzante nian lingvon la homo pli facile trovos tion, kion li bezonas aŭ deziras: komercaĵon, agenton, malnovan poŝtsignon, karan amikon, kunideanon, akompananton en vojaĝo k.t.p.*

⁷ El la privata arkivo de J. Amouroux.

⁸ PVZ, *La franca periodo de esperanto*, kajero 6-bis, p. 122, 134, 156.

leteroj kaj kartoj.⁷ Kuriozaĵo: francaj esperantistaj ĉefoj longe kutimis interkomuniki private franclingve, sed en franclingva letero al Michaux de 12.5.1905, Cart enŝovis plurfoje la esperantan vorton *samideano* aludante al Bourlet, eble kun iom moka nuanco, sed kvazaŭ antonomazie. Samjare en franclingva letero al Bourlet ĝin uzis Michaux.⁸ Certe post la Bulonja parolado la vorto iĝis ege uzata. Multe poste, en 1925, Beaufront, en *Kompleta Gramatiko Detaloza di la Linguo Internaciona Ido*, p. 140, asertas, ke li mem iniciatis en esperanto la terminon *samideano* en la jaro 1891, aŭ 1892, sugestante ĝin al Gaston Moch okaze de ties respondo al iu letero. Strange tamen, ke Beaufront neniam registris tiun vorton en sia vortaro esperanta-franca, ĝuinta kvin eldonojn de 1902 ĝis 1907, nek en la abundaj leteroj al Bourlet inter 1901 kaj 1905, kie li uzis ĉiam (*mia/tre*) *ĉara amiko*, (*mia*) *kara kolego*; *samideano* aperas unuafoje envortare en la esperanta-sveda de Ahlberg (1905). Tiu vorto ekzistas ankaŭ en Ido, al kiu elmigris kaj Beaufront kaj Moch kaj Ahlberg (ĉi tiu lasta poste migris al Novial). En *Latino sine Flexione* de Giuseppe Peano la responda vorto estas *coidealista*.

La vorto *samideano* fariĝis la komuna saluto kaj identigilo inter esperantistoj dum pluraj jardekoj. *Samideana trinkkanto* de Frans Swagers refrenas tiel: *Je via sano, samideano / ĝoju ni, trinku ni / je via sano.*

Google tradukas ĝin al la itala per *collega* kaj al la angla per *colleague*. La fama skota adiaŭa kanto *old lang syne* havas lastastrofe *and there's a hand, my trusty friend*; en la adapto de tiu kanto al silvestra-nokta saluto farita de Giorgio Silfer, *La jaro baldaŭ for*, kantata de Nikolin' en disko eldonita de LF-koop, troviĝas la verso *Kaj jen la man', samidean'* (alternativa traduko de Reto Rossetti diras: *Do jen la mano, kamarad'*). Personoj donis nomon al sia filo *Samideano*; miloj da leteroj komencaĝis per *kara samideano* aŭ finiĝis per *samideane salutas*. *Do ne kvaku kiel ranoj / karaj gesamideanoj* versas Julio Baghy, en sia *Rankvarteto – dediĉata al plendantaj neni-farantoj*.

Ke *samideano* estis la kutima voknomo inter esperantistoj ekde la postbulonjaj jaroj atestas ankaŭ tre interesa historia romano de Mikaelo Bronŝtejn *Dek tagoj de kapitano Postnikov* (dua eld. Impeto, 2010).

Mikaelo Bronŝtejn (pseŭdonimo: *Bruna Ŝtono*) naskiĝis en 1949, en Ukrainio, poste translokiĝis al Rusio, kie li diplomiĝis pri elektrotekniko kaj ĵurnalismo kaj kie li nun daŭre loĝas kaj laboras kiel direktoro de firmao konstruanta lignajn vilaojn. Li esperantistiĝis en 1962, verkis kelkcent poemojn kaj kantojn, originale verkis kaj tradukis 23 librojn. Li iam estis prezidanto de Soveta Esperantista Junulara Movado (SEJM), pri kiu li verkis tre interesan libron, kaj

gvidis la artajn programojn en Universalaj Kongresoj. En 2003, li iĝis laŭreato de la literatura premio "Antoni Grabowski".

Valoras scii ion ankaŭ pri la protagonisto de lia menciita romano, kapitano Aleksandr Postnikov. Fariĝis esperantisto almenaŭ en 1907, en la jaro 1908 prezidanto de Ruslanda Ligo Esperantista; li ankaŭ revivigis la revuon *Ruslanda Esperantisto*, farante ĝin oficiala organo de tiu ligo. En 1910 li organizis la unuan *Russian Kongreson de Esperantistoj*, partoprenitan ankaŭ de Zamenhof, kiu parolis pri la neceso uzi esperanton ankaŭ inter samlandanoj. En la jaro 1910, Postnikov krome fondis *Universalan Ligon*, societon celantan, per la helpo de esperanto, kunigi la homojn pensantajn racie kaj popularigi la ideon pri unuigo de la *regnoj*, unua ŝtupo por fondi en la estonteco unuiĝon de ĉiuj ŝtatoj. Neatendite, la 28^{an} de marto 1911 li estis arestita; post tio en Peterburgo okazis traserĉoj en la loĝejoj de multaj esperantistoj. Postnikov estis akuzita pri spionado, ĉar en iu banko oni trovis 200-rublan kvitancon kaj konstatis, ke tiun sumon pagis eksterlanda agento. La 26-an de aŭgusto la Juĝistaro de la Peterburga Milit-Distrikta Juĝejo deklaris la verdikton: Postnikov estis senigita de ĉiuj rangoj, ordenoj, surbrusta akademia signo, posedrajtoj, kaj kondamnita al 8-jara punlaborejo. La ruslanda esperanto-movado tuj

distanciĝis de li, nomante lin *hazarda persono en la movado*. La Februara revolucio lin liberigis en aprilo 1917, oni reatribuis al li la kapitanan rangon, poste la kolonelan, sed en junio li estis ree arestita, ĉar li estis *blankgardiano kaj nefidinda persono*. Liberigite, li denove oficis, sed decembre oni ankoraŭfoje lin arestis akuzante lin pri *kontraŭ-revolucia agado*, kaj li restis en koncentrejo. La Centra Plenumkomitato nuligis la verdikton en oktobro 1920; Postnikov estis liberigita kaj instruis militarton en la kursoj por militistaj gvidantoj. Sed en novembro 1921 li estis denove arestita. Oni lin suspektis pri spionado kaj kondamnis al du jaroj da ekzilo, sed subite oni nuligis la verdikton, kaj en majo 1922, li estis liberigita, kaj ĝis oktobro 1924 instruis strategion diversloke. Postnikov iĝis prezidanto de *Ligo de Socialistoj Universalistoj* kaj li estis arestita kun pluraj aliaj anoj: oni opiniis la Ligon kontraŭ-revolucia organizaĵo, kaj la proceso okazis la 19^{an} de junio 1925. La edzino de Postnikov, Muza, estinte sekretario de la Ligo, estis kondamnita al 3-jara ekzilo. Similajn verdiktojn ricevis aliaj membroj. Nur unu persono estis kondamnita al pafekzekuto: Aleksandr Postnikov. La saman nokton la



verdikto estis plenumita. Ĉiuj kondamnitaj estos rehabilititaj nur en 1993.

La verko *Dek tagoj de kaptano Postnikov* rakontas, per rektaj paroloj, pri konversacioj en la rusaj societoj kaj precipe sur la vaporŝipo *George Washington*, kiu transportas kongresantojn al la UK en Washington en 1910. Laŭ la rakonto de Bronŝtejn, tie Zamenhof, karesnomata la barbuleto diras:

Mi opiniis, ke la tuta afero Esperanta estas parto de tiu komuna ideo, kiun mi nomis Hilelismo. Tiam mi skribis al unu el miaj plej bonaj kaj plej komprenemaj amikoj, al mia kunfrato Emile Javal, ke Hilelismo celas krei popolon neŭtrale homan, kies membrojn dividi nur la limoj geografiaj, ne lingvoj, nek religioj. Mi skribis, ke tiu popolo, dekomence malgranda, povus havi sian kulturan centron kaj centran templon en unu el la urboj de la neŭtrala Svisujo. Ĝi estus la fundamenta grupo, sin montranta kiel modelo de la estonta lingve kaj religie unuigita homaro [...] Tamen mi konfesu, kun granda bedaŭro mia, ke miaj kunfratoj Javal, Sebert kaj multaj aliaj kiuj kun ravo aliĝis al nia afero esperanta, kategorie malakceptis la hilelisman homaranismon... Homoj ankoraŭ ne estas pretaj al tiom funda unuiĝo.

La konversacio pludaŭras pri la ebleco formi tiun revatan popolon tra geedziĝoj inter esperantistoj-hilelistoj, kiuj mem generos idaron; Postnikov diras:

Havante komunan lingvon kaj komunikante inter si, niaj nepoj ne evitos ekhavi propran kulturon, proprajn psikajn trajtojn... sekve, ni intencas komplete produkti novan etnon, dissemitan en la mondo! Kaj jen la vica paŝo: la etno formas novan civiton. Kaj tiu nova civito posedas la plej racian lingvon, progreseman intelektan kapitalon, kaj eble, eĉ novan komunan religion... do, en la mondon venis nova etno, nova civito por okupi dignan lokon inter la popoloj dividitaj.

Al tiu ideo rebatas s-ro Fiŝer, kiu vidas danĝeron en la afero. Sed Zamenhof replikas: *Kial s-ro Fiŝer trovas danĝera estontan aperon de la Esperantista civito? Se tiu aperos, ĝi estos la plej inteligenta civito inter la ekzistantaj en la mondo. Do, dissemita tra la mondo, ĝi havos sufiĉan prudenton por ne pretendi ian teritorion, ian ajn havaĵon de sendependaj ŝtatoj. La civito Esperantista nur fortigos la kulturon de la tuta homaro. [...] Eble nur post cent jaroj aperos la kerno de tiu denaska esperantistaro.*

Efektive nun ni estas cent jarojn for de tiam, kaj la denaska esperantistaro povas kalkuliĝi je ĉirkaŭ mil kvincent /du mil personoj: eta kerno, kaj la nuna *Esperanta Civito* rezultanta el pakto inter esperantistaj societoj realigas tute precize tion, kion prirevis Zamenhof: popolo diaspora, kiu neniel celas teritorion kvazaŭ ŝtato, sed agnoskon de senteritoria diaspora komunumo.

En sia inaŭgura parolado en Vaŝingtono, Zamenhof difinas la evoluon de la lingvo, kiu, en 1910, baziĝas sur kvar principoj:

1) Lingvo Internacia ne povas esti alia ol Esperanto.

2) La evoluado de la lingvo fariĝos plej kredeble per tiu sama vojo kiel en ĉiu alia lingvo, t. e. per la senrompa vojo de neologismoj kaj arkaismoj.

3) Se iam aperos la neceso fari en Esperanto ian ŝanĝon, tion povas fari nur aŭ la esperantistoj mem per komuna interkonsento, aŭ iu grandega forto, sed nepre en plena interkonsento kun la tuta esperantistaro.

4) Se iam la esperantistoj mem aŭ ia granda ekstera forto decidus fari en Esperanto iajn ŝanĝojn, tiuj ŝanĝoj povos esti nur ekstreme malgrandaj, neniam rompos la kontinuecon kun tio, kion ni ĝis nun havis, kaj neniam senvalorigos tion, kion ni ĝis nun faris, faras aŭ poste faros.

Per tiuj aserto Zamenhof refutas la idismon, kiu volis trudi ŝanĝojn tra la Delegitaro, sed ankaŭ refutas iun antaŭan cendon, ke aŭtoritata akademio povos reformi esperanton *ĝis nerekonbleco*.

Pli aparte difinanta politikajn ideologiojn estas la vorto *kamarado*, uzata en la maldekstraj medioj, tute aparte ĉe *Sennacieca Asocio Tutmonda* (SAT). Interesa tiurilate estas ties statuto, kiu inter siaj celoj havas:

– lernigadi, instruadi, klerigadi siajn membrojn tiel, ke ili fariĝu la plej kapablaj kaj plej

perfektaj el la tiel nomataj internaciistoj;

– peri kaj ĉiel eble helpi al kreado de literaturo (tradukoj kaj originaloj) spegulanta la idealojn de nia Asocio.

SAT do aspiras esti intelekta pinto, kiel Postnikov aŭspiciis. La statuta artikolo 1. insistas, ke SAT ne estas partipolitika, sed nur kleriga, eduka, kultura organizo. Ĝi eĉ havas literaturan komitaton.

Male, UEA sin prezentas tute alimaniere: ĝia Statuto listigas jenajn kvar celojn:

– disvastigi la uzadon de la internacia lingvo Esperanto

– agadi por la solvo de la lingva problemo en internaciaj rilatoj kaj faciligi la internacian komunikadon

– plifaciligi la ĉiuspecajn spiritajn kaj materiajn rilatojn inter la homoj, malgraŭ diferencoj de nacieco, raso, sekso, religio, politiko aŭ lingvo

– kreskigi inter siaj membroj fortikan senton de solidaro, kaj disvolvi ĉe ili la komprenon kaj estimon por aliaj popoloj.

Nenio pri esperantista popolo, kulturo, literaturo, strebo al monda paco.

Ĉe la katolika movado iam estis uzata *samcelanoj* preskaŭ samsignife kun *samideanoj*, sed en la ĝenerala movado oni multe emfazis iaspecan religian karakteron de la *interna ideo*, precipe kiam Zamenhof elvenis kun sia *homaranismo*, kiu ja restis lia persona afero, sed ofte rilatigebla al esperantismo pro la sameco de la iniciatinto. Tio kaŭzis distanciĝon fare de la katolikaj esperantistoj, kiuj ne

ŝatis aliĝi al la tiel prezentita "idea sameco". Antaŭ jardekoj oni vigle diskutis en *Espero Katolika* pri la "netaŭgeco" de *samideano* por katolikoj. Nun ankaŭ en la ekumenaj kunvenoj estas uzata *frato*, sendepende de esperanto.

* Gravas la difino pri *lingva grupo* en la Universala Deklaracio pri la lingvaj rajtoj, art. 1 (1996)

Sed la vorto *samideano* regis dum preskaŭ jarcento ene de la ne specife ideologia esperantistaro, ĝis iu pensofluo komencis malŝati ĝin, perceptante, ke per tiu termino oni indikus kiel ĉefan la komunan celon prezenti esperanton kiel duan lingvon por ĉiuj, dum la diaspora popolo vidus esperanton kiel unuan lingvon por iuj, tiuj kiuj akceptas la koncepton, ke la esperantistoj konsistigas grupon kiu havas ne nur komunan lingvon, sed ankaŭ komunajn kulturajn trajtojn. La unua konscio, ke esperanto ne fariĝos baldaŭ tiu ĝenerale akceptata lingvo celanta la *finan venkon*, startis jam en 1925, kiam Teo Jung ŝanĝis la nomon de sia gazeto de *Esperanto triumfonta* al *Heroldo de Esperanto*: estis evidenta la rezigno, almenaŭ en antaŭvidebla tempo, pri la triumfo, sed estis plu flegata la konscio, ke esperanton oni povas heroldi laŭte kiel kulturalan realaĵon. Kelkajn jarojn post la akiro de ĝia posedo fare de LF-koop en 1996, ĝia subtitolo estis ŝanĝita de: *trisemajna informa gazeto pri la esperanto-movado* al: *trisemajna informa gazeto pri la esperanta mondo*, ĉar *movado* havis same odoron de la plurgeneracie flegata *finvenkismo*, kaj cetere pri movadoj oni ne plu povas paroli en la singularo,

ĉar estas pluraj celoj flankaj kiuj distingas diversajn strategiajn.

Siavice la Esperanta Civito, laŭ la vortoj de sia Konstitucia Ĉarto, celas firmigi la rilatojn inter la esperantistoj kiuj sentas sin apartenantaj al senŝtata diaspora lingva grupo*, per la difino kaj pacama evoluigo de komuna kondutkodo, transnacia kulturo kaj kolektiva identeco. Ne estante ŝtato, la Civito ne avidas politikan kaj ekonomian potencon, sed celas klerigan, edukan, kulturalan evoluon, en komprenemo kaj toleremo rilate al la diversaj pensoskoloj al kiuj persone aliĝas la civitanoj. Ĉi tie ni retrovas, iom maskitan, la zamenhofan homaranan koncepton, ke ĉiuj pensoskoloj (Zamenhof ilin nomis "religioj") estas egalaj; kutimo inter la personoj havantaj la esperantan civitanecon estas la alnomo *civitano*.

Lastatempe, unu esktreme minoritata grupeto komencis kontraŭstari al la dum jarcento firmiĝinta koncepto pri *esperantista popolo* kaj laŭte kriis diversloke, ke la esperantistoj estas nur *kvar ranoj en marĉo*, kreante tiel, almenaŭ neoficiale, novan pensoflun, la *kvarranismon*, kiu volus sin diferencigi de finvenkismo, raŭmismo, jamvenkismo. Sed temas nur pri vorta spito, kiu opinias sin sprito, al la subtenantoj de aliaj sinnomadoj; ĝi havas neniun manifeston aŭ principaron, nek, kompreneble, statuton, krom tiu principa defetisma aserto. Ĝi kontraŭdiras la tutan historion de la

lingvo kaj de la medio ĉirkaŭ ĝi: esperanto kaj esperanto-verkistoj ĝuas respekton en la monda kadro. La konsila konsilio pri junularo de la Konsilio de Eŭropo havas en si TEJO-membron, elektitan de dudek membroj de la Forumo Junulara Eŭropa: estis Veronika Póor, kiu poste forlasis la postenon, ĉar ŝi iĝis ĝenerala direktoro de UEA, kaj ŝin anstataŭis alia TEJO-aktivulino, Oleksandra Kovyazina.

La Esperanta PEN-centro, iam sub prezidanteco de William Auld, nun sub prezidanteco de Walter Zelazny, estas inter la plej estimataj kaj aktivaj el la diverslingvaj PEN-centroj, partoprenanta en tri komisionoj: verkistoj por la paco, lingvaj rajtoj kaj tradukarto, verkistoj en prizono; ĝi havas sian revuon, *Literatura Foiro*, kiu atingas plurajn naci-lingvajn PEN-centrojn.

Fakte diferenco estas preskaŭ nur pri vortoj, kaj precipe, pri la insistado ĉe kelkaj vortoj. Raŭmismo, kiu spegulis efektive alternativon al la finvenkismo dum la okdekaj jaroj, kaj kies korifeoj kaj unuaj subskribintoj estis Amri Wandel, Jouko Lindstedt kaj Giorgio Silfer, definitive kolapsis en la jaro 2000, kiam kuniĝo de la iamaj simpatiantoj konstatis, ke ĝi ne bezonas esti laŭte diskriata kvazaŭ novaĵo, ĉar ĝi simple eniris la komunan penson de tre larĝa bazo de esperantistoj: esperanto estas valoro en si mem, sendepende de sia disvasteco. Oni ja ĝin disvastigu, instruu, diskonigu ĝian celon

esti la dua lingvo por ĉiuj, sed oni ne neglektu ĝian valoron de lingvo minoritata de popolo ekzistanta.

Se temas pri salutvortoj, la Senato de la Esperanta Civito proponis leĝigi la jam uzatan vorton “ĉaŭ” kiel saluton ene de la anoj de la Civito kun la signifo *Saluton, civitan(in)o*; la Lingva Komitato de

Esperantio, kiu zorgas pri la lingvo de la civitaj instancoj, malaprobis la proponon pro du kaŭzoj: en la civita Konstitucio estas neniu normo kiu rilatas al salutoj, dum estas normoj rilatantaj al insignoj, al la himno, al la celebrotagoj (ekzemple la 15^a de decembro estas la *Tago de la Esperanta Kulturo*, nomata *Zamenhof-tago* en la UEA-medio). Saluto estas afero tro persona por ke ĝi estu iamaniere leĝigata. Krome trudi al vorto jam uzata kun certa signifo alian signifon, pli specifan, kontraŭas la Fundamenton kaj kaŭzas konfuzon. Do la vorto “ĉaŭ” estis malaprobata kun tiu specifa signifo, kvazaŭ kiel ekskluziva saluto inter civitanoj.

Tiel, de la komenca *amiko de l' lingvo internacia* ĝis la nuna *civitano* disvolviĝis la nomoj per kiuj la diverstendencaj uzantoj de la lingvo esperanto ŝatis sin difini.



ESPERANTA NATURAMIKO
LIGAS ESPERANTISTAS DE LA NATURALEZA

Esperanto-Societo
MARBORDO DE LA SUNO

Tago de la Esperanta Kulturo

lundon, la 15^{an} de decembro 2014
ekde 17h00

ni festos la Tagon de la Esperanta Kulturo,
koincide kun la naskiĝtago de L. L. Zamenhof,
iniciatoro de esperanto

benveniga parolo de
Julio Herrero, prezidanto
regaleto
(kun itala gastronomio kaj hispanaj vinoj)

originala komitubo de
Giorgio Silfer
Albaniva kaj ŝiaj sep nanoj



naturamika Esperanto-Domo
C/ Ricardo de la Vega 14
ES-29018 Málaga este
tel. (34) 952 201046 - naturamiko@esperantio.net

Historio rompita

de Antonio
Della Rocca

elitaligis kaj
enkondukas
Perla
Martinelli

Dum la pasintseptembra mondkongreso de PEN Internacia en Ourense (Galicio) la itala verkisto Antonio Della Rocca, reprezentanto de la Triesta PEN-Centro kaj kandidato por la internacia sekretarieco, prezentis sian lastan verkon, novelaron titolitan *Mi revis vivi kiel Franz Kafka*. Ĝi entenas impresojn kaj reinterpretitajn memorojn el vigla mondvagado, kaj tial flugas de Sud-Ameriko al Rusio, de iu fikcia 1530a al la nuno.

Hodiaŭ estas la 21^a de oktobro de la jaro 2000 – pli ĝuste estas la 22^a de la monato Tiŝri, jaro 5761.

Estas sabato, kaj grava festotago, *Ŝemini Azeret*, la lasta tago de *Sukkoth*, la “festotago de la kabanoj”, kiu rememorigas la porĉiaman protekton de Dio al sia popolo. *Yom Kippur*, la tago de la pentado kaj de la pekliberigo, pasis antaŭ nelonge, kaj jam antaŭ ĝi oni ekpafis en la teritorioj (ne necesas diri kiuj, ne ekzistas aliaj “teritorioj” en Israelo).

Mikol ĉe fenestro rigardas eksteren, al ŝi ŝajnas ne eble ke la suno brilas. Ŝi solas kaj volas nenium apud si. Ne nun, venos baldaŭ la momento en kiu ŝi bezonos la aliajn, ŝi estas *sabra*, naskita jam en Israelo, en kibuco, ŝi apartenas al unu el la lastaj generacioj kiuj ne povas imagi vivadon sen la kunesto de siaj samuloj, “la filoj de la revo”, kiel nomis ilin Bruno Bettelheim.

Mikol ne plu estas junega, ŝi

aĝas tridek kvin, vidvino sen infanoj. La edzo mortis en akcidento, antaŭ kelkaj jaroj, kaj ĉi-printempe ŝi enamiĝis al palestinano. Preskaŭ neniu tion scias, certe ne ŝia ĉefo, kiu tuj forpelus ŝin: eĉ la patrino fermis al ŝi la pordon. Nur la patro ne ŝin malaprobas, kvankam por sia filino li preferintus judon, kiel Ŝimon, tiom bonan knabon, kial la misorto trafis ĝuste lin, la patro sin demandas ĉiufoje kiam pri tio li pensas, kaj tio okazas ofte, ĉiufoje kiam li pensas pri ŝi.

Ibrahim estas bela viro, du jarojn malpli aĝa ol Mikol, ne edziĝinta – ili bone kunestas. Ĝis antaŭ nelonge li tenere moketis ŝin, dirante ke li amas ŝin pli ol ĉion en la mondo krom Palestino, kaj Mikol ridis. Ŝi respondadis ke se li estus dirinta “krom Fatima”, nesanga kuzino de Ibrahim, ŝi estus tranĉinta liajn kojonojn kaj iginta lin gluti ilin, sed Palestinon ŝi toleras – kaj li ridis siavice, milde riproĉante ŝin pro

Kongrue al la aparteno de Esperanta PEN-Centro al la Pac-Komitato, por niaj legantoj ni elektis mallongan, sed tre signifan specimenon.

ŝia “kazerna” esprimstilo. Ŝi respondis, ĉiam ridante, ke en Israelo la virinoj soldatas, ke ŝi estas eĉ kaporalo, kaj ke li estu singarda, la fusilon ŝi tenas hejme, sub la lito, por ĉiu okazo.

Poste komenciĝis la bordelo kaj ili ne plu ridis. Ibrahim fariĝis sombra, montriĝis pli kaj pli malofte, kaj Mikol scias ke ne ĉar li ne plu amas ŝin, sed ĉar la malbenita Palestino estas forkrifanta lin de ŝi. Ŝi scias ke ŝi povas lin demandi pri nenio, same kiel ŝi scias ke se la situacio pli malboniĝus oni vokos ŝin al la milito kaj ŝi senhezite surmetus la uniformon.

Ni proksimis al paco, fidiablaĉe, kaj nun ĉio denove rekomenciĝas, pensas Mikol, kaj hontetas ke ŝi sakris en maniero kiun Ibrahim ne ŝatus.

Ĉi-matene oni diris al ŝi ke Ibrahim mortis, unu inter la multaj. Kaj Mikol rigardas tra la fenestro, eĉ ne sukcesas plori. Pensas pri la judaj soldatoj linĉitaj en Ramallah kaj volus malami la palestinanojn, sed nur malbonfartas, pensas pri sia patrino, kiu dum sia tuta vivo riproĉos ŝin ĉar ŝi enamiĝis al “unu el ili”, volus fuĝi sed scias ke ŝi ne povas, pensas pri sia patro kaj vidas lin skui la blankharan kapon, mienante “povra etulino mia...” kaj ne plu scias ĉu tio vekas en ŝi amofluon aŭ agaĉon.

Ŝi leviĝas kaj eliras, ne plu povas resti tie, devas moviĝi. Tuj eksterdome ŝi renkontas Rav Jaakov, la maljunan aŝkenazan rabenon kiu konas ŝin

ekde ŝia infanaĝo, kaj lin rigardas fikse, ne decas, oni ne rigardas tiel rabenon, ŝi scias, sed funde de la koro ŝi esperas ke li kapablos diri al ŝi kion fari, kvankam neniam ŝi tion rekte demandus.

Rav Jaakov scias pri Mikol kaj Ibrahim – rabeno ne konfesprenas sed ĉiuj parolas al li konfidence – kaj scias ke Ibrahim mortis, oni ĵus diris al li. Kaj li scias ankaŭ ke li devus diri kelkajn aferojn al Mikol, eĉ devintus diri pli frue, sed li maljunas, tro multon spertis kaj ne plu kapablas riproĉi.



Li eltenas la rigardon de Mikol, reciprokas per siaj helaj okuloj iom akvecaj malantaŭ la okulvitroj, karesas sian blankan barbon kaj faras ion, kion rabeno devus ne fari, metas manon leĝeran sur ŝian ŝultron kaj recitas la preĝon: *Ŝema Israel, Adonai Elohenu, Adonai echad...* Aŭskultu, Israelo, nia Sinjoro estas nia Dio, nia Sinjoro estas unu...

Mikol ripetas la vortojn de la rabeno, reeniras la domon kaj fine sukcesas plori. ❀

Jakobson kaj Chomsky antaŭ surdomutulaj lingvoj

de **Fernando Pita**

¹Kiel bonega ekzemplo sufiĉas rememori la faman usonan filmon *Inglourious Basterds* (esperante: *Negloraj Bastardoj*, el 2009), reĝisorita de Quentin Tarantino; en kiu la usona spiono estas malkovrita de la nazioj ĉar li petis tri bierojn laŭ la kutima usona gesto, kaj ne laŭ la germana.

²Tio ja fariĝis kontraŭ-esperanta akuzo, ĉar oni diras ke kreita lingvo ne kapablas disponi pri tiuj korpaj nuancoj de la lingvaĵo.

³Tiu aserto estas farita fare de la konata brazila epistemologo Hilton Japiassu, kiu konsideras, ke oni ja povas skribi senhoman historion, geografion, biologion (ekzemplo estas paleontologio) ktp, sed neniel oni povus skribi lingvistikon sen ĉeesto de homa elemento. Vidu: Japiassu, Hilton 1978. *Nascimento e morte das Ciências Humanas*. Rio de Janeiro: Francisco Alves.

Estas jam sciata, ke ĉia komunikado konsistas el kodoj elektitaj de iu komunumo por esprimi ian ideon. Tamen, tiuj konceptoj estas pli ampleksaj ol oni ĝenerale pensas: kiel komunumo, oni povas kompreni de fiŝoj kaj gregoj ĝis la plej altkulturitaj homoj; kodoj varias de flugo de insektoj al binara sistemo en komputiloj.

Do, ĉia komunikado konstruiĝas pere de neŝancebla organizado de kodoj, kaj ilia analizo fariĝas, pro tio mem, nemalhavebla ero de semiotiko kaj, specife rilate al la homa komunikado, de lingvosciencoj. Tio ja okazas ĉar ne nur lingvo kaj lingvaĵo komponas homan komunikadon: partoprenas en ĝi – en tre variaj proporcioj – diversaj aliaj esprimoj. Tiuj estas, laŭnecese aŭ laŭkondiĉe, pli aŭ malpli subtilaj: voĉtonoj, mangestoj, vizaĝaj esprimoj ktp, estas tiel stabilaj partoj de lingvo kiel gramatiko mem; aŭ eĉ pli gravaj, se oni konsideras, ke ĝia plena regado estas preskaŭ nealirebla de tiuj, kiuj ja lernas gramatikon kaj sintakson de lingvo, sed ne povas vivi en

teritorio kie la pristudita lingvo estas surstrate kuranta¹.

Tiel, plena regado de lingvo, kiel ajn ĝi estu, postulas ankaŭ regadon de ties “nelingvaj lingveroj”, ĉeestantaj en ĉiuj lingvoj kaj ĝin konstituantaj². Kompreneble, kontakto, pri-skribo, katalogado kaj interpretado de tiuj elementoj estas taskoj kiuj povas forfuĝi limojn de lingvistiko, kaj, eĉ se apartenantaj al la semiotika kampo, postulas de ĝi pli proksimajn rilatojn kun aliaj kampoj de scienco: (sociala) antropologio, psikologio, eĉ ekonomio kaj arkeologio!

Sed ne estas malfacile kompreni, ke homa komunikado ĉiam ĝuis la precipan rolon en tiu scenejo, ĉar, fariĝinte la plej grava studobjekto de lingvistiko, homa komunikado finfine ekhavis la plej strategian pozicion por atingi la plej privilegiitan fokuson dum diversaj generacioj de esploroj. Oni ja povas sentroige aserti, ke ĉar lingvistiko studas fenomenon ekskluzive homan, ĝi ja estas la nura vere homa scienco³.

Do, kvankam preskaŭ ĉiam neglektata, lernado de gestoj,

vizaĝaj esprimoj kaj korpaj sintenoj estas parto de akiro ne nur de (alilanda) lingvo sed ankaŭ de ties kulturo aŭ kulturoj, kaze de lingvoj parolataj internaciskale. Tamen, tiu lernado ekhavas pli gravan signifon kiam oni rimarkas la fakton, ke en ĉiu lingva komunumo estas homgrupo por kiuj ĝi fariĝas la ununura komunikilo: mi parolas pri surdomutuloj, pri kies eduksistemo necesas ke oni rapide parolu.

Kvankam kreita en 1755, nur en 1960 ĝi sukcesis esti plene akceptita de la eduksistemoj: profesoroj, pedagogoj, psikologoj deklaris, ke oni insistu pri dulingvismo de la lernantoj, kaj konsideru mansignon kiel unuan lingvo de surdulo, kaj lokan lingvon kiel dua. Oni konstatas do ke mansigna lingvo vivas de la lastaj kvindek jaroj reflo-riĝan periodon, ene de kiu ĝi ne estas plu konsiderata nura komunikilo, sed aŭtonoma lingvo, kiu nur pere de komuna kultura fono rilatas al tiu de la parolantoj. Tiel, oni ankaŭ re-rimarkas influon de kultura medio ne nur sur la lingvo (parolata) sed ankaŭ sur ĉiu komunikada sistemo, kiel ekzemple tiu de surdomutuloj. Estas ankaŭ facile konstati, ke ĉiu surdo-mutulo ĉeestinta formalan edukan sistemon regas du variantojn de sia lingvo: dum skribado, tiu estas devigata koni kaj uzi la komunajn gramatikajn regulojn de lingvo parolata de siaj samlokanoj; tamen, dum ĉiu alia komunik-procezo, tiu homo uzas la saman varianton de surdo-

mutula lingvo uzata en sia surdula komunumo.

Fakte, surdomutula lingvo fariĝas vera varianto de la lingvo, interalie ĉar gestoj, agoj, movoj ktp ricevas novajn signifojn; kiujn mi ekzempligos pere de komparo inter la brazila varianto de la portugala kaj de Libras (Linguagem BRAsileira de Sinais, t.e, Brazila Mansigna Lingvo). Okulfrapas ke, en Libras, multaj gestoj estas resignifitaj de surdomutuloj, por fariĝi taŭgaj al ties komunikaj necesoj. Oni analizu kelkajn el ili:

a) tradicia gesto premi orelpinton per la montra kaj dika fingro, komune uzita por indiki bongustecon; estas uzita de "libraslingvanoj" por marki ke iu estas bone vestita.

b) gesto simila al la usona *ok*, kiu estas tre ofendema en la brazila kulturo, akiras en Libras signifon tute alian: ĝi indikas la "bongustecon" de iu plado!

c) en la brazila kulturo oni alvokas iun movante la manon, kaj tute ne gravas ĉu fingroj estas supren aŭ malsupren levitaj. Tamen, tiu lasta maniero estas tre ofendema ĉe niaj peruaj najbaroj, kiuj konsideras, ke tiu gesto povas uzita nur por alvoki bestojn, kiel estas hundoj kaj katoj, sed homoj estu alvokitaj nur kun suprenlevitaj fingroj. En Libras, la alvokiga gesto estas tute simila al tiu de la peruanoj, kaj tiu kun la malsuprenlevitaj fingroj elmontras ŝteladon.

Tamen, se tiuj estas trajtoj kiuj karakterizas *Libras*-on

kompare al la portugala, oni povas same percepti, ke kelkaj ĝeneralaj trajtoj de la surdmutula lingvo iamaniere reformulas la kadron de komunikigaj funkcioj, tiel kiel starigitaj de Roman Jakobson (1896-1982), kaj, samtempe, la tezojn de Noam Chomsky (1928) pri kompetenteco kaj plenumado. Tiel, ni konstatas kaj relokiĝon kaj adaptiĝon de kelkaj ideoj el tiuj du elstaraj lingvistoj.

Laŭ Jakobson, ĉiu komunikiga ago okazas laŭ la sama procezo: *emisianto* sendas *mesaĝon* al *ricevanto*. Por esti efika, tiu mesaĝo postulas *kuntekston* al kiu ĝi referencas. Tiu kunteksto devas esti alprenebla de la ricevanto, kaj devas ankaŭ esti parola aŭ paroligebla laŭ *kodo* tute aŭ parte komuna al ambaŭ. Fine, ĝi postulas ankaŭ *kontakton*, fizikan aliron kaj psikologian konekton inter emisianto kaj ricevanto, kiuj ilin kapabligu eniri kaj daŭri en komunikado.

Ĉiu el tiuj ses faktoroj entenas malsimilan funkcion por lingvaĵo: la tielnomata *referiga funkcio* orientiĝas al la kunteksto, dum la *emociiga* estas fokusita sur la emisianto, ĉar ĝi celas senpere esprimi sintenon de la parolanto rilate al tio, kio estas parolata. Kiam estas orientiĝo al la ricevanto, tiam ni estas antaŭ *koniga funkcio*.

Ankoraŭ laŭ Jakobson, estas ankaŭ tri aliaj funkcioj: *fakta*, orientita al la kontakto mem. Ĉiam kiam necesas certiĝi ĉu oni uzas la saman kodon, la fokuso falas sur la kodo mem, kaj oni estas antaŭ la *metalingva funkcio*. Fine, kiam la fokuso staras sur la mesaĝo mem, jen la *poetia funkcio*.

Konsiderante, ke en surdmutula lingvo oni parolas per la tuta korpo, ne estas, unuavide, loko por ke emocioj estu esprimitaj distinge de la mesaĝo mem. Ĉar se, ekzemple, la uzo de vizaĝesprimoj iĝas nepre por sendo de kelkaj mesaĝoj, ĝia uzado por elsendo de tute alia mesaĝo radikale kompromitus la signifon mem; do, la *emociiga funkcio* estas centrata ne



sur la emisianto, kies korpo estas ilo por la kodo, sed specife sur la kodo.

Aliflanke, la fakta funkcio estas kaj nenecesa kaj nepraktikebla, ĉar inter du surduloj, konversacio nur povas okazi se ambaŭ havas vidan kontakton inter si, ĉar nur per rigardo ili kapablas kompreni la mesaĝon.

Oni povas ankaŭ konsideri ĉu eblas metalingva funkcio en intersurdula konversacio ĉar, kompreneble, sen la uzado de la sama kodo ne estas ebla komunikado. Tiamaniere, en ia intersurdula konversacio la lingvaj funkcioj pensitaj de Jakobson fariĝas nur kvar, kaj ni devas rimarki ke ambaŭ, emisianto kaj kodo, respondecas pri la *emociiga funkcio*.

Sed ne nur laŭ Jakobson eblas analizi surdomutulajn lingvojn. Eblas ankaŭ realigi tiun analizon laŭ la tezojn de Chomsky, kiujn ni montras sube, en la kondensita versio prezentita en la esperanta eldono de *Lingvo kaj Menso*:

Ĉe la plej kruda nivelo de priskribado ni povas diri, ke lingvo asocias sonon kaj signifon en specifa maniero; scii lingvon signifas povi, principe, kompreni tion, kio estas dirata, kaj produkti signalon kun celita semantika interpreto. Tamen, krom multe da malklareco estas ankaŭ plursenceco en ĉi tiu kruda karakterizo de lingvoscipovo. Estas tute evidente, ke frazo havas esencan signifon difinitan de lingvaj reguloj, kaj ke homo, kiu scipovas lingvon, iel internigis la sistemon de reguloj, kiuj

difinas kaj la fonetikan formon de la frazo kaj ĝian esencan semantikan enhavon – ke li disvolvis tion, kion ni nomos specifan lingvan kompetentecan. Tamen, estas same klare, ke la efektive observata uzado de lingvo – efektiva plenumado – ne simple spegulas la esencajn sono-signifo-konektojn establitaĵojn de la sistemo de lingvaj reguloj. (Chomsky; 2010:102)

Kompreneble ĉio dirita de Chomsky rilate al fonetiko rekte aplikeblas al gestoj uzitaj de surduloj, ĉar ĉiu gesterio reprezentas tiam rolon de fonemo kaj ties semantika enhavo. Tiel, la lingva kompetenteco de surdulo tute egalas al plenumado, ĉar gesto, kiu surdulo ne kapablas reprodukti, havas por li nenian semantikan sencon.

Sed Chomsky diras ankoraŭ plion; por li, konkreta plenumado rezultas plejparte de eksterlingvaj faktoroj:

Plenumado dependas ankaŭ de multaj aliaj faktoroj. Ni ne interpretas aferojn diratajn en nia ĉeesto per nura aplikado de la lingvaj principoj, kiuj difinas la fonetikajn kaj semantikajn proprajojn de diraĵo. Eksterlingvaj supozoj rilate la parolanton kaj la situacion ludas fundamentan rolon, difinante kiel parolado estas produktata, rekonata kaj komprenata. Lingva plenumado estas, krome, regata de principoj de kognaj strukturoj (ekzemple, de memorlimoj), kiuj ne estas, striktasence, aspektoj de la lingvo. (Chomsky; 2010:102)

El tio oni povas ja rezoni, ke la lingva kompetenteco de surdulo estas fakte duobla: tiu kiu manifestiĝas pere de mansigna lingvo, kaj tiu kiu manifestiĝas pere de la skriba (ĝenerale nacia) lingvo. Kaj oni rapide konstatas, ke sia aparteneo al tiuj du kulturoj konstruiĝas sur malsimilaj bazoj, ĉar kvankam aktive uzita nur dum skribado, la skriba lingvo vehiklas la aŭdparolan kulturon kiu ĉirkaŭas surdan komunumon, do, kvankam ĉiu surdulo estas dulingva, ĝiaj kompetenteco kaj plenumado ne reciprokas: eblas ke surdulo kiu estas plene kapabla esprimiĝi en la mansigna lingvo – do kies kompetenteco ja egalas al plenumado – ne sukcesas uzi la samajn rimedojn nacilingve. Ekestas do granda diferenco: se, por tiu persono, la kompetenteco en la mansigna lingvo ĉiam egalos plenumadon, en la nacia certe okazos la kontraŭo, ĉar tiuj du kategorioj neniam egaliĝos. Kaj, same, ke la nun disfloriganta kulturo de strikte surda komunumo iel malproksimigas ilin de la ĝenerala loka kulturo, ĉu per starigo de malsamaj signifoj al gestaro jam uzita en tiu kulturo, ĉu per starigo de limoj inter tiuj kulturoj.

Tamen, alia grava konkludo estas, ke kelkaj paradigmoj – kiel tiuj de Jakobson kaj de Chomsky – jam solide starigitaj en lingvosciencia kampo, postulas ja adaptiĝon por esti aplikeblaj al specifaj komunumoj, kiaj estas tiuj de surduloj. ❀

Ekzilo kaj azilo trans dudek mil leŭgoj ne submare

de **Giorgio
Silfer**

* Kun li aktivis Valdemar Langlet, sed la nomo de la sveda esperantisto mankas en la memortabulo dediĉita al la Justuloj, kie la unua estas Wallenberg, kaj Perlasca estas la deknua el dudek unu.

La historio de Chiune Sugihara najbaras al tiu de aliaj diplomatoj, kariere aŭ fikcie, kiuj helpis per vizoj, veraj aŭ falsaj, persekutatojn plej ofte hebreaĵn dum la dua mondmilito.

La plej admirinda estas la kazo de Raoul Gustav Wallenberg,* ĉefsekretario de la sveda legacio en Budapeŝto, mortonta kiel prizonulo en Sovetunio. Samurbe aktivis Giorgio Perlasca, itala faŝisto eĉ batalinta dum la civila milito en Hispanio, pseŭda hispana konsulo. Pri aliaj ne mankas duboj, kiel la portugala konsulo en Bordozo, Aristides de Sousa Mendes; sed eble pli damaĝas ties

bildon la fakto ke pro li, certe jam kun edzino, gravediĝis francino kun duono de lia aĝo (kaj lia pezo) – ol ke li (necerte) ricevis bakŝiŝojn pro la vizoj...

La sama kalumnia supozo koncernis s-ron Chiune Sugihara; kvankam absolute ne pruvita, ĝi damaĝis lian karieron en socio, kie suspektata korupto estas pli danĝera ol efektiva kokro (la malo okazas en Suda Eŭropo, multe pli hipokrita ol Japanio).

Sugihara estas do la japana Wallenberg, kvankam li ne bezonis riski sian vivon, male al la svedo.

La nomon de Sugihara, kaj lian kromnomon Sempo, mi ekkonis dufoje en la sama tago: unue legante la politikan programon de Riĉi Karibe (relektota al la Senato de la Esperanta Civito), due spektante la filmon dediĉitan al la sola japano en la listo de la Justuloj: *Persona non grata*.

Fakte la panoramo estus kompleta per plia filmo, de Florian Gallenberger, dediĉita al la “bona nazio” en Nankino: John Detlev Rabe, kiu savis pli ol ducent mil ĉinojn en 1937. Ĉiuj tri filmoj (pri Perlasca,

Estus granda honoro, se mi povus kontribui al la difino pri la konceptoj de paco kaj pacifismo en Esperantio. Se Esperantio estus vere matura kaj avangarda pri tiu temo, certe ekzistus Vikipedia paĝo en la zamenhofa lingvo pri Chiune Sugihara. Ne nur ĉar tiu diplomato estas la sola japano en la listo de la Justuloj inter la popoloj, sed ankaŭ pro lia politika sagaco.

Chiune Sugihara komprenis ke la kerna rolo de diplomatio estas eviti la izolon, krei bonajn rilatojn kun la ceteraj. Kaj tiu rolo estas esenca por konstrui kulturon de paco. Kulturo necesa sed ankoraŭ ne sufiĉa por la esperanta popolo mem.

Same kiel mi donas etan kontribuon en mia patrolando, apogante la nunan artikolon Naŭan de la Japana Konsitucio, mi esperas alporti mian etan kontribuon en la Esperanta Civito, rilate la fortigon de tiu kulturo de paco.
Riĉi Karibe, kandidato al la Civita Senato



Rabe, Sugihara) estas malperfektaj hagiografioj, sed *Persona non grata* ŝajnas eĉ tro diskreta, rilate al la heroo.

Ĝi ekzemple silentas pri lia sinteno rilate Nankinon, kvankam ni scias ke li pli kaj pli malŝatis la armean diktaturon regantan en Nipono.

Ĝi limigas la sovetian parton de lia vivo al la intertraktado pri la manĝura ĉefa fervojo, kio estis lia unua granda sukceso en diplomatio. Sugihara tamen havis rusan edzinon, de kiu li divorcis nek tuj nek baldaŭ (li eĉ konvertiĝis al la ortodoksa religio); nu, ankaŭ la svisaj esperantistoj skotomizis la unuan edzinon de Privat...

Ĝi ne adekvate prilumas lian rolon en la diplomatio post la foriro el Litovio: Sugihara estis *persona non grata* ĉe Sovetunio

ĉar tro lerta lingve kaj *pro patria sua*, sed lin rifuzis ankaŭ la Tria Regno, pro liaj ambiguaj rilatoj kun la pola registaro en ekzilo.

Se la filmo enhavus ankaŭ tion, ĝi fariĝus unu el la plej interesaj lukoj al la sekreta historio de la dua mondmilito. Bedaŭrinde ĝi insistas nur pri la ikono de la Justulo. Certe tio meritas etikan aprezon: la mondo estus multe pli bona, se ĉiuj rezonus kiel Sempo – *mi devus malobei al mia Registaro, sed se mi obeus, mi malobeus al Dio*. Sed tio ne sufiĉas por kinematografia aprezo.

Por trafi ankaŭ arte en la holokaŭsta/militkrima kino, la plej bona ekzemplo restas *La listo de Schindler*, interalie pro la sagaca rezigno pri koloroj favore al blanko kaj nigro. ❁

Persona non grata (Sugihara Chiune), de Cellin Gluck, kun Toshiaki Karasawa. Japanio, 2015.

La bebo

de Julian
Modest

Aleksi staris ĉe la pordo. Li ekis foriri, sed haltis kaj alrigardis Dan, la patron. Dan konjektis kion Aleksi deziras diri al li, tamen Aleksi ne kuraĝis komenci aŭ verŝajne pripensis kiel komenci la konversacion. Dan sidis ĉe la tablo en la kuirejo kaj atendis. Pasis eble minuto. Aŭdiĝis nur la ritmaj frapoj de la malnova vekhorloĝo, kiu estis sur la bufedo.

Finfine Aleksi kuntiris siajn densajn brovojn kaj iel obtuze ekparolis. Li strebis esti trankvila, sed Dan sentis, ke lia animo estas streĉita kiel gitara kordo kaj liaj vortoj falis kiel pezaj akvogutoj.

– Paĉjo – traglutis Aleksi, ŝajne lia lango estis gluita al la palato. – Mi miras, je via aĝo vi tiel agis. Pardonu min, sed vi jam ne estas juna. Jen, en junio vi iĝos kvindekkvinjara kaj ŝi estas nur tridekkvinjara. Dudekjara diferenco. Oni ridas kaj diras: “Dan trovis junan amatinon.” Pro la homaj klaĉoj mi hontas iri sur la strato. Kaj nun ŝi estas graveda kaj baldaŭ naskos. Hontinde. Panjo, Dio absolvu ŝin, same hontus en la tombo. Ĉu eblas. Baldaŭ vi povus havi nepojn kaj mi, kaj mia frato Ivano nun atendas de vi frateton aŭ fratineton. Nekredeble!

Dan silentis. Aleksi pravis. Ne estis normale, sed tiel okazis.

– Mi kaj Ivano opinias, ke ankoraŭ ne estas malfrue. Diru al ŝi aborti kaj foriri – daŭrigis malrapide kaj hezite Aleksi – ŝi foriru tiel, kiel ŝi venis. Ŝi ankoraŭ estas juna, ŝi povus edzinigi viron je sia aĝo, ili havos infanojn kaj estos feliĉaj...

Aleksi elspiris. Li ne sciis kion ankoraŭ diri por konvinki la patron. Li estis konfuzita. Ne decis paroli tiel al la patro kaj konsili lin. Aleksi amis la patron, estimis lin. La tutan vivon la patro laboris kaj faris ĉion por ke Aleksi kaj Ivano edukiĝu. La patro konstruigis por ili domojn. Se ne estus okazinta tio, li daŭre helpus al ili, sed nun ĉio ŝanĝiĝis. Aleksi ne deziris mencii, ke la edzino Radka senĉese ripetas al li: “Ĉu via patro ne hontas? Li vivas kun junulino. Li, la maljunulo, nun decidis havi junan edzinon. Tiu ĉi senhontulino ekloĝis kun li kaj baldaŭ ŝi naskos infanon kaj poste postulos heredaĵon. Tiam vi kun Ivano ĉion devas dividi je tri kaj tio, kion havas via patro tute ne estas multe! Tamen la ruza vulpino venis nuda, enkuŝis en la liton de via patro kaj diros, ke ŝi estas lia sola heredantino.”

Tiuj Ŝi vortoj de Radka venenigis la animon de Aleksu kaj finfine li ekkuraĝis paroli kun la patro kaj provi konsili lin forpeli “la ruzan vulpinon” kiel nomis ŝin Radka.

Dan daŭre silentis. Tiu turmenta silento pli maltrankviligis Aleksu kaj li ne povis diveni kion opinias la patro, kion li decidis. La patro eĉ vorton ne prononcis, Aleksu malfermis la pordon kaj diris:

– Mi iros. Iun tagon mi denove venos, sed same vi venu al ni. De kiam la juna virino loĝas kun vi, vi ne gastis ĉe ni. Venu.


– Bone – respondis Dan.

Aleksu foriris kaj Dan restis sidi ĉe la tablo, rigardante tra la fenestro al la korto. Jam estis preskaŭ kvina horo posttagmeze kaj Ketu baldaŭ venos de la laborejo. Ŝi estis kasistino en granda vendejo. De kiam Dan kaj Ketu estas kune, la vivo de Dan ŝanĝiĝis. Antaŭe la soleco turmentis lin. Dum pluraj jaroj li loĝis sola kaj la tagoj ŝajnis al li senfinaj. Li estis arma piloto, pensiiĝis, sed malfeliĉe lia edzino Roza forpasis kaj li restis sola. La filoj Aleksu kaj Ivano havis familiojn, siajn zorgojn kaj preskaŭ ne interesiĝis pri li. Ili gastis ĉe Dan tre malofte kaj serĉis lin nur kiam Dan devis helpi ilin, ripari ion aŭ aĉeti ion.

Iun nokton Ketu alkuris al Dan vere nudpieda. Ŝia edzo Panajot estis kolego de Dan, same piloto, pli juna, sed li havis malbonan kutimon, multe drinkis kaj kiam ebria li batis Ketin kaj kulpigis ŝin, ke ŝi

kokras lin. Ili ne havis infanojn kaj tio pli forte kolerigis Panajot. Post simila koŝmara nokto kaj terura bato, Ketu forkuris kaj venis en la loĝejon de Dan. Nenien alien ŝi povis iri. Antaŭe ŝi loĝis en malproksima vilaĝo kaj tie jam ŝi ne havis parencojn, ŝiaj gepatroj estis mortintaj. Ketu konis Dan, ĉar Dan kaj Panajot estis kolegoj. Ofte Dan parolis kun Panajot kaj provis konvinki lin, ke li ne drinku, ĉar tiel li pereigas sin kaj sian familion, sed Panajot tute ne akceptis liajn konsilojn.

Ketu ekloĝis kun Dan kaj Dan provis helpi ŝin. Li bone komprenis, ke tiu ĉi kunvivado ne estas deca. Ketu estis tre juna kaj li jam sufiĉe aĝa, sed li ekamis Ketin. Neniam antaŭe



li tiel forte amis iun. Kiam li rigardis la grandajn nigrajn okulojn de Ketu, lia koro pli forte batis. Li ne konis alian tiel belan virinon. La densaj haroj de Ketu odoris kiel matura tritiko, ŝia korpo estis svelta kaj

elasta kiel truto. De kiam Ketj estis en lia loĝejo, ĉio ekbrilis. Ŝi kuiris, purigis, aĉetis. Ŝi kvazaŭ neniam laciĝis. Tio ĝojigis Dan, sed same maltrankviligis lin. Li ne kutimis, ke iu zorgas pri li. Ofte li diris al si mem: “Jes, mi helpis ŝin, sed ne decas, ke ni kune loĝu. La vivo estas antaŭ ŝi. Ŝi devas serĉi sian feliĉon.”

Iutage, tute neatendite, Ketj diris al Dan, ke ŝi estas graveda. Tutan nokton li ne dormis: estis feliĉa, ke li denove estos patro, sed en la sama momento sentis turmenton, kvazaŭ iu ĵetis lin en kaldronon kun bolanta akvo. “Kion diros la homoj – meditis li. – Oni komencos klaĉi kaj primoki min.” Li intencis diri al Ketj, ke ŝi abortu, sed ne havis fortojn por eldiri tion kaj ne povis imagi, ke tiel li mortigos sian infanon. Ĝi ne estas kulpa.

Ketj same plu nenion diris. Ja, la gravediĝo surprizis ŝin. Tiom da jaroj ŝi kunvivis kun Panajot kaj ne gravediĝis. Tiam ŝi opiniis, ke la kaŭzo estas ĉe ŝi, ĉar Panajot ĉiam riproĉis ŝin. Li nomis ŝin “sterila bovino” kaj batis ŝin terure. Nun Ketj estis senlime ĝoja. Finfine ŝi donos novan vivon, sed ŝi same maltrankviliĝis. Ĉu Dan ne opinias, ke ŝi intence gravediĝis por devigi lin edzinigi ŝin. De kiam Ketj komprenis, ke ŝi estas graveda, ŝi kaj ĝojis kaj malĝojis kaj ŝi ne povis decidi kion fari. Ŝi pretis tuj foriri, estis dankema al Dan, ke li akceptis ŝin. Ja ŝi ekamis lin, sed bone komprenis, ke ilia kunvivo incitas liajn parencojn. Ŝia streĉo iĝis pli kaj pli granda, sed nenion ŝi povis decidi.

La momento de la nasko venis subite. Ili ĵus finis la vespermanĝon kaj Ketj eksentis la dolorojn.

– Mi naskos – diris ŝi.

Dan rapide ekstaris de la seĝo, helpis ŝin sidiĝi kaj diris, ke tuj li preparos la aŭton por la ekveturo al hospitalo. Post kelkaj minutoj ili jam veturis al la hospitalo. La akuŝistinoj renkontis kaj

akceptis ŝin. Dan revenis hejmen, sed tutan nokton ne dormis. Li paŝis de unu ĉambrangulo al alia. Kiam liaj filoj Aleksj kaj Ivano naskiĝis, li ne estis tiel maltrankvila kiel nun. Frumatene li denove estis en la hospitalo. Oni diris al li: “Kna-bo” kaj tio kvazaŭ levis lin alten. Li eksentis sin flugila kaj ekflugis, same kiel antaŭ jaroj, kiam li estis piloto.

Sur la strato li marŝis kiel ebria, kvazaŭ li rapide estus fordrinkinta du glasojn da konjako. Li iris, iris kaj ne ĉesis demandi sin: “Kion diros la homoj? Ja, maljunulo, sed havas bebon. Ĉu li ne hontas?” Tiuj ĉi demandoj premis lin kiel pezega ŝtono. Lia koro galopis simile al timigita ĉevalo.

– Mi diros al ŝi lasi la bebon por adopto – flustris al si mem Dan. – Kaj se ŝi ne deziras lasi la bebon, ŝi iru loĝi ie alie kaj ne ĉe mi.

Pasis kelkaj streĉitaj tagoj. La maltrankvilo de Dan kreskis. Li emis renkonti nenion. Ketj telefonis de la hospitalo kaj diris al li, kiam ŝi revenos kun la bebo hejmen, tamen Dan ne iris en la hospitalon por renkonti ilin. Li hontis. Kiel li, la maljunulo, ĉirkaŭbrakos la bebon kaj konfesos, ke li estas la patro. Tio ŝajnis absurda.

Ketj venis de la hospitalo. Dan sentis kulpon, ke li ne venigis ŝin per la aŭto, sed kredis, ke Ketj komprenos lin. Kiam Ketj eniris la ĉambron, Dan miris. Ŝi estis sola, sen la bebo.

– Kie estas la bebo? – demandis li.

– Mi lasis ĝin por adopto.

Tiu ĉi vortoj ŝtonigis lin. La sango enfluis en lian kapon kiel varmega torento, liaj piedoj iĝis molaj kiel gumo.

– Kion mi faris! Kiel eblas! – kriis Dan.

Li rapide surmetis la jakon kaj ekiris al la pordo.

– Kien vi iras? – demandis Ketj.

– En la hospitalon por preni kaj alporti la bebon. Ja ĝi estas mia propra filo! – respondis li kaj eliris. ❀

La gepatra(j) lingvo(j) de mia patrujo

Filipo Tesaĵ ellernis la bosnian lingvon en Bosnio. Li alvenis en 1992, jam komence de la milito, kiel ĵurnalisto kaj bonfaranto. Aventurema, li disiĝis de sia ĉeĥa teamo kaj ie perdiĝis dum pli ol duonjaro. Liaj gepatroj estis malesperaj ĉar opiniis lin mortigita, geamikoj konsolis ilin ripetante “ne timu, li estas spritulo, li scias eliri el ĉiuj malagrablajoj”, la ĉeĥaj informiloj anoncis pri “la malaperinta ĉeĥa ĵurnalisto”. Sed Filippo intertempe serioze, lerte kaj kun certa plano faris la surterenajn esplorojn.

Per entuziasmo de juna etnologo li ĝisfunde studis Bosnion kaj Hercegovinon kaj ties homojn. Li ellernis tabakumi laŭ la bosnia maniero, t.e. tre malrapide, pasie kaj ĝue volvante tabakon por fari cigaredforman volvaĵon samkiel faras iu olda bosnia haĝulo kaj tabakumanto. Li ankaŭ ellernis trinki bosnian kafon. Eĉ hodiaŭ li venigas la kafon rekte el nuntempa, postmilita Bosnio kaj trinkas ĝin bosni-maniere: malrapide verŝante kafon el etkafujo al taseto kiun bosnianoj nomas *filĝan*. La bosnian lingvon li ellernis tiel perfekte

ke oni ne povas diferencii lin de vera bosniano!

La sanga milito finiĝis kaj kelkajn jarojn poste, kune kun teamo de ĉeĥa humanisma organizo, mi vojaĝis Bosnion. Nia tasko estis doni psikosocian helpon al permilite traŭmatizitaj infanoj en bosnia urbo Maglaj. Kuracistoj, psikologoj, logopedoj kaj aliaj fakuloj provis helpi al povraj geetuloj. Mi kiel bosnia rifuĝinto jam plurjare vivanta en Ĉeĥio estis tradukisto. Ni sukcese faris nian laboron kaj unu monaton poste ni volis reveni Pragon. En urbo Zenica aliĝis al nia teamo ankaŭ Filip Tesaĵ.

Estante ses en la teamo, ni vojaĝis per minibuso. Sed dum ni finis laboron en Maglaj jam noktiĝis kaj ni devojiĝis, fakte ni ne povis trovi la ĝustan ŝoseon por aliri la kroatan landlimon. Nia kolego kaj teamgvidanto, psikologo Oleg, proponis ke ni eniru Respublikon Serban, kiu estas parto de Bosnio kaj Hercegovino, ĉar tie plej verŝajne, liaopinie, troviĝas UNPROFOR¹, kiu povas helpi al ni.

Tiu ĉi nokto estis nigra kiel krimula animo, kaj sur la mini-

de Adin Ljuca

elbosniigis
Zlatoje
Martinov

Adin Ljuca
(1966-), estas
bosnia verkisto.
Vivas en Prago
ekde 1992.

Prozaj verkoj:
*La tatuitaj
bildoj* (1996),
*Urbeto Maglaj
en la spuroj de
pasinteco* (1999)
Verkas ankaŭ
poezion, konata
estas lia poem-
kolekto *Hidzra*,
Prago, 2000.

¹ *The United Nations
Protecting Forces*
(La Protektaj Fortoj de
Unuiĝintaj Nacioj).

busaj fenestretoj videblis nur densa, malseka nebulo. Ŝoseoj detruitaj, senlumaj, sen vojmontriloj, kiel jam normale en la detruita lando freŝe postmilita. Ni denove devojiĝis ne sciante kie ni troviĝas. Ni iris tien kaj reen, sed la landlimon kroatan kaj la riveron Sava oni neniel povis vidi.

Iu evidente rimarkis “suspektindan” minibuson kiu zizagas, ekiras, haltas... Post nelonga tempo aperis polica aŭtomobilo. Policisto aliris kaj diris al nia ŝoforo:

“Dokumentojn!”

Tra malfermita fenestro la ŝoforo donis la dokumentojn. La policisto diris:

“Pasportojn!”

Kiam la ŝoforo donis al li la sian, la policisto kriaĉis:

“Vi ĉiuj montru viajn pasportojn!”

Ricevinte, li ilin eĉ ne rigardis. Li metis ilin en la poŝon kaj al la ŝoforo ordonis:

“Akompanu min!”

Post kelkaj minutoj ni estis en policejo. Estis ĉirkaŭ meznokto. Ili forkondukis nin en grandan ejon en kiu kompreneble ne estis hejtado. Unu policisto restis kun ni, starante apud pordo kun aŭtomata pafilo. Ni sidiĝis. Mi iomete timis sed tamen esperis ke ĉio finiĝos bone.

Nia kolemino kuracistino kiu ne plu estis juna, eble jam sesdekjara, verŝajne pro malvarmo kaj timo, volis viziti necesejon.

Kiam mi ŝian neceson tradukis al la policista gardisto li malagrable ekgrumblis:

“Mi ne permesas!”

Oleg eksaltis kaj energie protestis menciinte homajn rajtojn, ankaŭ nian humanisman engaĝon en Balkano...

La gardisto, surprizita per la protesto kiun li opiniis impertinenta, ekrigradis lin kaj per minacanta voĉo alvortis min:

“Diru al tiu fekulo ke li fermu la faŭkon!”

Nia kolego proponis al la sinjorino:

“Ni povas turniĝi kaj vi eble faru tion ĉeangule.”

Ŝi tion rifuzis. Mi ne scias kiel ŝi eltenis ĝis mateno. La situacio fariĝis malagrabla kaj nerve streĉita. Ni atendis, ne sciante kion atendi. Tamen tiu longa, malvarma kaj malagrabla nokto iel pasis. Tagiĝis. Tiam eniris policisto kaj vokis:

“Jasenka, venu kun mi.”

Ni ĉiuj frostiĝis. Jasenka estis juna kaj bela bosnianino kiu same kiel mi forfuĝis de la milito kaj vivas en Prago; ni timis ke io malbona povas okazi al ŝi. Oleg denove proteste eksaltis el sia seĝo invitante la policiston respekti la internacian juron kaj homajn rajtojn, sed la policisto simple ekkriaĉis rigardante min:

“Diru al tiu stultulo ke li tuj fermu la faŭkon!”

Nenion oni povis fari. La policisto forte kaptis la manon de la juna virino kaj eliris kune kun ŝi. Minutoj pasis nekredeble malrapide. Post kiu scias kiom da tempo Jasenka revenis kun la policisto tute sana kaj trankvila. Ŝi montris eĉ ne unu eron da timo. Poste, kiam ni rekonstruis tiun nokton, ni kon-

sciis ke ili intence unue alvokis ŝin, opiniante ŝin la plej malforta ĉenero de nia teama ĉeno: ŝi estis la plej juna, ŝi estas virino kaj ŝi estas bosnianino. La policisto diris:

“La ĉefo de la teamo kune kun la tradukinto akompanu min! Tuj kaj rapide!”

Dum ni iris, en la policeja koridoro sidis sur benko du policistoj. Unu el ili kape montris min al la dua, kaj diris:

“Li estas tiu Juca kiu mortigis vian fraton en urbo Bihaĉ.”

Tie ĉi jam ŝajnis ke ni estas en grava problemo. Estis tutklare ke ili trarigardis niajn pasportojn. Mi do vere estas Juca, sed mi neniun mortigis!

La policisto alkondukis nin en la oficejon de la polica ĉefo. Ni tiam konsciis ke ni pasigis la tutan nokton nur atendente ke li matene venu al sia laborloko. La polica esplorado konsistis el demandoj kiujn starigis la polica ĉefo, kiujn mi tradukis, kaj al kiuj Oleg respondis.

Mi adaptis mian tradukon al tio kion la polica ĉefo volis aŭdi. La humanismaj organizaĵoj tiajn homojn, kia sendube estis la polica ĉefo, ne impresas multe, tial mi aparte substrekis la duan parton el la titolo de nia organizaĵo: *Homo en embaraso – humanisma organizo de la Televido Ĉeĥa*. Se tio ne helpos – mi opiniis – almenaŭ ili sciu ke la ekstera mondo certe aŭdos pri nia pafmortigo. Sed, kvankam mi estis singardema, kaj kiel devena bosniano bone konas la psikologion de la bosniaj homoj, negrave ĉu serboj, kroatoj aŭ muzulmanoj, ankaŭ mi



faris erareton, nome al la demando:

“Kion vi entute serĉas en nia urbeto Dubica?”

Mi respondis:

“Ni vojeraris. Ni eĉ ne sciis ke ni estas en Bosnia Dubica.”

Li minace rigardis min kaj severe alvortis:

“Vi estas en Dubica, ne ekzistas Bosnia Dubica!”

Mi sciis ke oni dum la milito ŝanĝis la nomojn de stratoj kaj placoj, vilaĝoj kaj urboj, ke oni etne purigis tutajn regionojn, oni same purigis la naciajn lingvojn, oni ekzemple en la serba regiono tute “ekstermis” la latinan alfabeton kaj enkondukis ekskluzive la cirilan, unuvorte, estis fonditaj tute novaj rilatoj kaj valoroj. Bone mi tion sciis, tamen mi eraris kaj elbuŝigis tion, kio ne agrablas al la oreloj de la serba ĉefo de la polico de la urbeto Dubica, antaŭmilite Bosnia Dubica.

La ĉefo konstante starigadis la samajn aŭ preskaŭ la samajn demandojn al Oleg, kaj mi tradukadis je la sama maniero. Post iom da tempo la polica ĉefo konsciis ke ni ne prezentas ajnan danĝeron por la sekuro de la urbeto, ke ni estas simplaj humanismaj agantoj, kaj tiel li primoke diris:

Malnova foto de Bosnia Dubica

“Bone, mi komprenas ke vi apartenas al tiu via humanisma organizaĵo. Sed nun diru al mi, kion tiu via aĉa organizaĵo faris por nia Respubliko Serba?”

“Nia organizaĵo estas granda kaj ni laboras multe por ĉiuj militaj oferoj. Mi kiel tradu-kisto partoprenas nur en tiu ĉi projekto. Sed mi scias ke nia organizaĵo helpis ankaŭ en Respubliko Serba sed mi ne scias la detalojn. Inter ni troviĝas homo el Ĉeĥio kiu povas pli detale informi vin pri tio.”

“Iru tuj alkonduki lin ĉi tien!” li ordonis.

Mi ekiris por trovi Filipon. Min akompanis la policisto kun aŭtomata pafilo. Enirinte la ĉambron en kiu ni pasigis la nokton kaj atenteme uzante ĉeĥajn vortojn por ke la serba policisto eventuale ne komprenu min ĉar la ĉeĥa tamen estas slava lingvo (kaj tiam la tuta teamo estos eble en pli terura situacio ol ni tiam troviĝis) mi diris al Filipino:

“Filipo, parolu la beogradan varianton de la serba lingvo, ne la bosnian, ĉar tiuj policaj stultuloj aprezos kun granda timrespekto tiun kiu parolas la “veran” serban, parolatan en la ĉefurbo de Serbio.

Antaŭ la civila milito, en socialisma Jugoslavio la lingva situacio estis jena: kiam mi ekzemple en la stacidomo de Zagreb volis aĉeti bieron aŭ sandviĉon, la zagrebanoj tuj diris: “Ho, vi estas bosniano, ĉu ne?” Ne do bosnia muzulmano, ne bosnia serbo, ne bosnia kroato, sed *bosniano*, ĉar en Bosnio ĉiuj tri popoloj parolis la saman dialekton. Same okazis kiam mi foje vizitis Beogradon. Sed dum la milito per la oficiala dekreto la bosniaj serboj estis devigataj publike paroli la beogradan serblingvon kiu nur nuance diferencas de ilia kutima lingvaĵo, sed, laŭ la gvidantoj de la bosniaj serboj, la beograda dialekto estas “nia vera serba lingvo”. Fakte ilia ideo ŝanĝi la propran bosnian elparolon estis pli vasta ol oni povas unuavide pensi: nome, por

la serbaj politikaj gvidantoj, gravis ke la bosniaj serboj ĉiam pli diferenciĝu kaj de la bosnianoj kaj de Bosnio kaj Hercegovino. Similaĵoj, sed ne oficialigitaj kiel en la serba kazo, oni povis vidi ankaŭ ĉe la bosniaj kroatoj kaj eĉ ĉe la bosniaj muzulmanoj. Tiuj lastaj, ekzemple, en sian leksikon enkondukis multajn turkajn vortojn, eĉ tiajn, kiujn la turkoj mem ne plu uzas. Ĉiuj tri bosniaj popoloj klopodis do siajn gepatrajn dialektojn adapti al la ideologiaj, naciismaj celoj kiuj estis altrudita al ili fare de iliaj politikaj (legu: naciaj) elitoj.

Ŝanĝiĝis lingvo kaj ni kune kun ĝi, diris foje Czeslaw Milosz, sed en pli multe tragika situacio ŝanĝiĝis nia komuna gepatra lingvo en Balkanio. Ankaŭ nia komuna patrujo ŝanĝiĝis kaj faris de ni “fremdulojn.”

Enirinte en la oficejon de la polica ĉefo, li, rigardante min, komencis starigi demandojn. Mi ĉesigis lin kapmontrante al Filipino:

“La sinjoro studis la serban lingvon ĉe la universitato de Krakovo, li perfekte parolas la serban, bonvolu rekte lin demandi.”

Kompreneble mi emfazis la vorton “serban”. Kiam Filipino komencis paroli laŭ la beograda maniero la vizaĝo de la polica ĉefo de la bosniaj serboj de urbeto Dubica mildiĝis kvazaŭ li aŭskultus la dian muzikon. Dialekto kiun li kaj la aliaj policistoj parolis ne diferencis de la mia, sed Filipino parolis la “puran” serban lingvon kaj la polica ĉefo ne povis kaŝi la plezuron kiun li klare esprimis per bonvola rideto. Aŭdinte la fremdulon kiu parolas lian “veran” gepatran lingvon, li dum kelkaj minutoj ĝuis la lingvan melodion kaj poste diris:

“Bone, vi estas liberaj!”

Kiam ni eliris el la policejo kaj eniris nian veturilon, plene dankemaj al kara Filipino pro nia savo, subite ni konsciis: la minibusa motoro ĉesis funkcii... ❀

Mortis Tullio De Mauro, granda itala lingvisto

La morto de Tullio De Mauro je 84 jaroj la 5^{an} de januaro 2017 eble ne estus rimarkenda per artikolo en ĉi tiu revuo, se li ne estus havinta rilaton al esperanto. Ĉiuokaze li estis la plej influa itala lingvisto de la dua duono de la pasinta jarcento. Dum jardekoj li instruis en la ĉefa universitato de Romo kaj krome li estis aktiva en politiko, eĉ iĝis ministro pri publika instruado en la jaro 2000.

De Mauro ne estis tre konata eksterlande, kvankam li ricevis honorajn diplomojn de eksterlandaj universitatoj. Liaj plej konataj verkoj estas traduko al la itala kun komentoj de *Cours de linguistique générale* de F. de Saussure (1967) *Storia linguistica dell'Italia unita* (1963) [Lingva historio de unuiĝinta Italujo] kaj *Grande dizionario italiano dell'uso* [Granda vortaro de la uzata itala].

Li antaŭ multaj jardekoj verkis artikoleon pri lingvoj en Eŭropo, en kiu li esprimis dubojn pri esperanto. Tiam pro la reagoj abundaj de esperantistoj li malkovris la realon de esperanto kaj de la movado pri ĝi kaj tuj reviziis siajn ideojn. Estas malfacile listigi ĉion, kion de tiam li faris pri esperanto.

Mi ne povas ne citi lian enkondukon al la reviziita eldono de *Manuale di Esperanto* [Manlibro pri Esperanto] de Bruno Migliorini en 1995.

Unu el liaj lastaj aperoj, la 15^{an} de pasinta novembro, li bonvolis partopreni la tagon en la universitato, kie oni prezentis la libron honore al mi, *Serta gratulatoria in honorem Renato Corsetti*, redaktitan de Federico Gobbo, kaj ankaŭ tiam li parolis pri demokrata lingvopolitiko kaj esprimis sin favore al esperanto.

Italaj esperantistoj perdis grandan amikon, sur kies konateco oni bazis ofte la prezenton de esperanto. Cetere, li estis amiko de alia grandulo, Umberto Eco, kaj unu el miaj belaj memoroj rilatas al la publika prezentado de la unua eldono de la libro de Eco, *La ricerca della lingua perfetta nella cultura europea* [La serĉo pri la perfekta lingvo en la eŭropa kulturo], okazinta en plenplena salono en Romo, en kiu De Mauro, kiu prezidis, parolis pri esperanto surbaze de la pozitiva pritrakto de ĝi en la libro fare de Eco.

Esperable en la nuna generacio aperos aliaj grandaj lingvistoj favoraj al esperanto. ❀

de Renato
Corsetti

*Giorgio Pagano,
sekretario de ERA
(esperanto-asocio
fondita de Giordano
Falzoni kaj ligita al la
radikala partio),
tamen donas
alian version
pri la sinteno de
Tullio de Mauro:
"En publika deklaro
kaj dum renkonto
kun ERA
li favoris ĝeneralan
dulingvismon
anglan-italan
ĉe la instrusistemo."*

Diino de ĉasado

de Vinko
Oŝlak

¹ PIV, pato 2. Se unu el du ludantoj ne plu povas ludi kun siaj figuroj oni interkonsentas pri nedecidita ludpartio. La vorto devenas el la itala *patta*.

Franjo kaj mi denove troviĝis en la pozicio pat!¹ apud nia ŝaktabulo ekstere antaŭ la muro de lia dometo. Kiel ajn mi provus movi la figureton, mi malfermus atakvojon kontraŭ mia reĝo.

“Ĉu nia ŝakpartio ne memorigas tre instrue je la nuna politika situacio sur la tutmonda scenejo?” mi tiel ĉirkaŭire ignoris mian nesukceson en la ŝakpartio.

La iama biletkontrolisto, kies politikaj kaj ankaŭ alitemaj prijuĝoj estis multe pli trafaj ol la diagnozprovoj de mi, iama kuracisto, komencis aranĝi la figuretojn en la ŝaktabulan skatolon, sen ion ajn diri pri mia rimarko. *Let's drink tea!*² li diris angle. La anglan li ne lernis en lernejo – kion oni tuj povis konstati, li ĝin fakte scipovis – sed kiel dekokjara germana soldato, militkaptito de la brita armeo en Italio. En la kampaĵo por la militkaptitoj li lernis la lingvon de siaj novaj mastroj, kion li opiniis iom stranga afero. Anstataŭ venĝi super lia haŭto pro la ekstreme malkavalira militado de la nazioj, la britoj lin premiis per sia lingvo, kiu fakte malfermis al li larĝajn fenestrojn de informiĝo kaj kleriĝo, eĉ se praktika tiel malbone pagitan

profesion, kia la trajna bilet-kontrolado estas.

Li leviĝis kaj enpaŝis sian dometon. Mi ne devis aŭguri, ke li baldaŭ revenos kun kruĉo da teo kaj du antikvaj tetaso. Ankaŭ la kutimo ne tuj salti en tro rapidan respondon aŭ tro hastan reagon, estas al li donacita ĝuste de britoj, kiuj lin ankoraŭ du jarojn post la militfino tenis kaptita. Li ŝtelis – ne el la magazeno de iliaj materiaj varoj, sed el la magazeno de iliaj scioj kaj bonaj kondutoj kaj tradicioj...

Lia horloĝo diris, ke la alportota teo estas preta por ĝui. Li elprenis el la kruĉo kribrilon kun te-folietoj, kiuj en la akvo ricevis sian naturan dimension. Tio igis min pripensi la aferon.

“Mi supozas, Franjo,” mi diris prenante la tason, “ke angloj ne fariĝis la nacio de la tetrinkantoj nur ĉar ili estis la kolonia grandpotenca mastro en aziaj regionoj, kie tiu kreskaĵo bone prosperas; same mi pensas pri vi, ke vi ilian kutimon ne alprenis nur ĉar via militkaptiteco pasis en la lando, kiu fakte distingiĝas per elstare bona kafpreparado, Italio... Mi eĉ ludas per la penso, ke angloj jam antaŭ ol renkonti teon en Azio, kondukis kvazaŭ ili la

² Trinku ni teon!

kvietigan manieron konsumi teon jam konus kaj praktikus.”

“Angloj probable diferencas de aliaj nacioj per tio, ke ili ne obeas nepre la popolan diraĵon: *unue saltu, poste diru hop!* Sed ili unue mallaŭte, sen fanfaroni antaŭ la publiko, diras *hop*, poste trinkas teon kaj dume primeditas, ĉu vere indas salti, kaj nur poste, se ili trovas tion racia, eventuale ankaŭ saltas. Tio povas ŝajni iomete stranga, sed tiel ili evitas kelkajn saltojn en abismon, kiel multaj aliaj daŭre saltadas je propra malprofito. Eble ili lernis tion pro siaj danĝeraj klifoj kaj malfacile alireblaj marbordoj, kie ili ĉiun paŝon devis zorge pripensi por ne tuj rompi siajn gambojn aŭ eĉ kapon...”

Mia sagaca amiko daŭre silente kaj meditsajne observis sian teon kaj kvazaŭ sen propra intereso atendis, kia spekulacia teorio plu venos el mia buŝo.

“Oni komparu kaj serĉu laŭplaĉe,” mi fine diris al li, “sed fine tamen venkas tiu, kiu ne urĝas, ne hastumas, ne ignoras sian kaj alies gambojn kaj kapon. Tiel ne la tuj saltanta kaj ne tre racia Adolfo venkis Vinstonon, sed la trankvile aganta Vinstono supervenkis Adolfin, kvankam li ne parolis kaj agis hastaĉe kaj fanatike kiel Adolfo, sed eĉ iom distance, kvazaŭ li estus nur dungita soldato de la brita reĝo kaj ne havus en la afero propran intereson.”

“Mi ne estas tute certa, ĉu iu ajn en tiu milito vere venkis,” replikis fine Franjo. “Germanoj post la milito ne lernis nur la lingvon de la ŝajne venkintaj

britoj, ili lernis ankaŭ iom da ilia diplomatia arto. Dum la britoj intertempe perdis preskaŭ ĉiujn siajn koloniojn, la germanoj en la sama tempo gajnis pli kaj pli da influo, kiun oni povus karakterizi moderna formo de kolonia mastreco. Kiu do vere gajnis, kiu vere perdis? Venki sur la batalkampo ofte signifas malvenki sur la paclepoka vivkampo. Aliflanke, se oni la aferon rigardas el ĉiuj anguloj, eble la britoj tamen venkis, ja ili per ŝajnigo de ekonomia kaj teknika prospero kaj eĉ ekstera politika influo, transformis la germanojn al *morlokoj* de la eŭropa kontinento, kiuj produktas kaj pagas la bonfarton de ĉiuj ceteraj, sen sin mem transformi al *eoloj* laŭ la *Tempomaŝino*³ de H. G. Wells.”

Anstataŭ pripensi lian eldiron kaj eventuale kontesti ĝin, mi subite demandis:

“Kaj kio pri via Hannah, Franjo? Kutime ŝi saltetas ĉirkaŭ ni kaj nin ĉarme ĝenas. Sed hodiaŭ tia stranga trankvilo, faras min tamen maltrankvila...”

Apenaŭ mi tion elparolis, jam la respondo venis, sed ne el la buŝo de mia amiko Franjo, sed en formo de ĉarma enkorpiĝo. El la krono de la arbo rando de la ĝardeno ĉirkaŭanta la dometo de Franjo, laŭ ŝtupetaro, kiun mi antaŭe ne rimarkis, malsuprenvenis infana figuro, vestita je tipe loka ĉasista kostumo, kun ligna imitaĵo de ĉasfusilo. Tiu stranga infanfiguro, tuj poste jam paŝinta sur la herban grundon, baldaŭ malkovriĝis esti la nepino de mia amiko

³ La sciencfikcia romano *Tempomaŝino* de H. G. Wells aperis en la jaro 1895.

Franjo, lia por ĉia surprizo preta Hannah.

“Nu, Hanjo,” mi ŝin ĝoje salutis, “ekde kiam vi apartenas al la ĉasista familio en la loko de via avo?”

“Ekde hieraŭ, doktoro Prenner!”

“Nu, tiel rapide do oni povas fariĝi vera ĉasisto en Karintio, vere mirinde... Kaj kiu majstro konstruis por vi la ĉasobservejon tiel alte kaj kaŝe en la arbokrono?”

“Mi devis fari ekzamenon. La observejon, post kiam mi sukcesis en la ekzameno, faris mia avĉjo!”

“Kaj kiu prenis de vi la ekzamenajn respondojn?” mi insistis enketante, konjektinte malbonon, pri kiu mi baldaŭ kun mia amiko devos tre serioze paroli.

“Ankaŭ mia avĉjo...” ŝi senŝancele diris al mi ĉion, kion mi bezonis scii. La nevidebla akuzformularo por mia amiko jam estis kompletigita per ĉiuj nepraj detaloj. Mi sciis, ke Fortuno hodiaŭ, almenaŭ hodiaŭ, kun mi simpatias.

“Kaj kiujn ĉasbestojn vi per via lorno hodiaŭ observis?” mi ruze pludemandis, vidinte etan lornoimitaĵon el plastiko pendinta ĉirkaŭ ŝia kolo.

“Ho, leporojn, kokinojn, ĝirafojn...” ŝi rapidis rakonti.

“Vidu, Hanjo, leporoj, bone, sed kokinoj ne estas ĉasbestoj, ja ili eĉ donacas al vi ovojn, kiujn vi laŭ miaj sekretaj informoj eĉ tre ŝatas manĝi. Sed ĝirafoj, karulino, en nia regiono tute ne vivas. Kaj eĉ tie, kie ili vivas, en la savanoj de Afriko,

ili estas severe protektataj kaj ne troviĝas sur la ĉaspermese listo! Fakte vi tion devis lerni por fari vian ekzamenon, ĉu?”

Hannah min rigardis dum kelkaj sekundoj kiel gazelo rigardas leonon, antaŭ ol ĝi decidus, en kiun direkton fuĝi por eskapi la hororan mekanismon de la leonaj dentoj. En mi kolektiĝis novaj ardantaj sableroj de ĉagreno, vidante, kiel la lipoj de mia amiko, ĉu ne jam malamiko, apenaŭ retenas eksplodon de lia aĉa rideto.

“Mia lorno vidas ĝis Afriko!” tiam Hannah, rebatis min per tute nova argumento el la kampo de fantazio, kiun do neniu povus objeti.

Mi ne plu vidis por mi eskapon. Por fari al tio finon kaj por povi al Franjo diri mian opinion, mi elpensis trukon, dirante kun tre afabla tono:

“Hanjo, ĉu vi ne povus denove grimpi sur vian observejan plataĵon por daŭre observi pri ĝirafoj, kaj mi antaŭsentas, ke vi baldaŭ vidos de tie supre leonojn kaj eĉ eble elefantojn?”

Mi kompreneble ne forgesis saluti ŝin laŭ la ĉasista rito: *Havu akran rigardon!* kaj libere rekomencis spiri sciante, ke nun la iniciato troviĝas denove ĉe mi.

La lertaj gamboj de Hannah jam malaperis en la krono de la altkreska arbo, kaj mi ne volis perdi tempon kaj prokrasti la nepran konfrontiĝon kun la – por mi malakcepteblaj – edukaj metodoj, kiujn mi devis observi ĉe la maljuna soldato kaj serioza kontrolisto Franjo, kaj mi komencis tute civilize:

“Franjo, ĉu vi vere trovas bona afero tiel delikatan kaj inteligentan knabinon konduki en tiel nehumanan marĉon, kiel per fusilo ĉasi senkulpajn bestojn, eĉ se tio ĉi ankoraŭ estas nur ludo? Ja vi scias, ke ankaŭ la plej malvalora aŭstro ĉion komencis per infana ludo. Knabino kaj fusilo, Franjo, en kia filmo vi troviĝas?”

Eble mi antaŭtempe tre alte aprezis teon, sed nun mi havas pli kaj pli impreson, ke mi teon malŝatas, eble eĉ abomenas. Franjo ne respondis tuj mian demandon, sed provoke malrapide prenis la tenilon de sia tetaso kaj per filmredukta malrapideco portis la tason al sia buŝo kaj trinkis, kvazaŭ temus pri senfunda barelo kaj ne eta taso por tri-kvar glutoj. Mi estas kuracisto, sed li estas senkonkurenca specialisto pri nervoj. Kutime la vojo reen por la homo daŭras, almenaŭ psike, malpli ol la vojo tien, sed nun, kiam li post sia jam vere historia periodo, ĉesis trinki, la vojo de lia taso ĝis alteleriĝo daŭris por mia psiko eĉ pli longe kaj por tion kompreni mi ne povis trovi racian kialon, kvankam da bezonata tempo mi havis pli ol sufiĉe.

“Vidu, Hermann,” la ĵus ankoraŭ trinkanta buŝo min tamen kompatis, “okaze de tiel gravaj dilemoj estas ĉiam konsilinde imagi la kontraŭon de la problemŝajna situacio. Do, provu imagi nian mondon, kia ĝi vere estus, kia la homa vivo en ĝi estus, se la sendanka okupiĝo de ĉasistoj ne troviĝus. Ne nur mi kiel kontrolisto, ankaŭ vi

kiel kuracisto devis parte veturi, parte piediri multajn vojojn de domo al domo tra dense kreskinta naturo. Kaj nun imagu, ke ie ajn povus vin surprizi ĉu urso, ĉu roto da lupoj, surpade jen kaj jen venena serpento, ankaŭ agresa uro, mustango kaj aliaj sovaĝaj bestoj, kiuj libere minacus la homon, se ĉasistoj ne troviĝus kaj ĉia ĉasado estus severe malpermesata, pro humanismaj principoj kompreneble... Ĉu vivo en tiaj cirkonstancoj ŝajnus al vi pli bona por la prospero kaj farto de la homo ol la nuna kun tiel sangavidaj ĉasistoj, kiuj la rabbestojn mortigas, por ke ili ne mortigu la homon!”

“Nu, eble tio estis bona argumento antaŭ epokoj, kiam la homa raso devis batali por simple supervivi en la cirkonstancoj de sovaĝa naturo, sed nun, Franjo, kiam en niaj arbaroj nur plu senkulpaj kaj sendanĝeraj kapreoloj, leporoj kaj similaj ĉarmaj bestoj promenas, nun mi vidas la neprecon de la ĉasista okupiĝo komplete ne bezonata kaj neaktuala, mi vidas nur la ĝuadon mortigi la senhelpan vivestaĵojn...”

“Mi vidas, ke vi legas nur vian fakan kuracistan bulteton, sed ne scias, kio en la arbaroj intertempe okazas...” replikis Franjo kaj alrigardis min tiel mirante, kvazaŭ li detektus novan primatan specion kaj havus problemon ĝin bone klasifiki laŭ la kategorioj biologiaj. Kaj li ne estis preta baldaŭ ĉesi: “Ĝuste ĉar la rabobestoj preskaŭ ne plu troviĝas, la aliaj bestoj, por vi, ne terkulturisto, tute

sendanĝeraj, sed por tiuj, kiuj perlaboras nutraĵon por ni ĉiuj, tamen tre minacaj, en tre mallonga tempo povus tiom multigi, ke nia tuta nacio povus sin nutri nur per importitaj nutraĵoj el la mondregionoj, kie humanistoj de via skolo ankoraŭ ne havas povon super la homa vivo! Cetere ankoraŭ kelkaj rabobestoj revenas, ĉar la tiel nomataj protektantoj de la besta vivo tion volas. Tiel ni denove havas en niaj arbaroj ursojn, lupojn kaj sovaĝajn katojn. Tio estas la komenco, mi ne scias, kio ankoraŭ venos. Mi povas al vi nur certigi: se la ŝtato malpermesus ĉasistojn ĉasi laŭ iliaj severaj planoj kaj limigoj, vi ne havos vian sekuron eĉ meze de la grandurboj, por ne diri ĉi tie en vilaĝa regiono.”

“Bone, Franjo,” mi provis savi la lastajn spurojn de mia pravo, “eĉ se vere tiel, ĉu knabino tamen estas la ĝusta sekso por esti edukata ĉasiste?”

“Kiel infano dum malvarmumo, vi certe manĝis kokinan supon, preparitan de via patrino, Hermann, ĉu?” la atako venis de tute neatendita angulo.

“Nu, ni ĉiuj manĝis la faman kokinan supon kontraŭ la malvarmumo kaj nazkataro. La moderna medicino eĉ trovis kialon de tio. En la viando de maturaj kokinoj fakte troviĝas ingredienco, kiu povas helpi ĉe tiaj aferaĵoj. Sed kia rilato inter tio kaj via ĉaseduko super via nepino Hannah?”

“Vi verŝajne forgesis, ke niaj patrinoj antaŭ ol kokinon meti en poton por kuiri, devis iel ajn kapti ĝin kaj dehaki de ĝi la

kapon. Tio ne estis ĝuste knabina delikataĵo, tamen nepra por via kaj mia resaniĝo kaj satigi. Kaj vi eble el via gimnazia edukado forgesis, ke la romia diino Diana estis la diino de luno, ĉasado, naturo, sed ankoraŭ de bonŝanca akuŝo. Do tamen ĉarma kaj delikata damo kaj ne kruda viro, kiel vi postulas! Kaj cetere, vi ĉiam pledas por egalrajtoj kaj sama traktado de viroj kaj virinoj, do restu ĉe via principo de seksa egaleco.”

“Mi ĉiam opiniis, ke la unua ĉasisto en la historio estis Nimrod, filo de Kuŝ, tiu ĉi filo de Ham, tiu Ham kiu sian patron Noan hontigis kaj estis pro tio de li malbenita, li kaj liaj postuloj. Kaj tiu Nimrod, la posta fondinto de Babilono, estis granda ĉasisto antaŭ la Eternulo, kiel oni en la deka ĉapitro de Genezo pri li legas. Do tamen ne via diino de Romo, fakte la romia versio de la greka diino Artemisa el Efeso.”

“Mi ĝojas, ke vi tamen legas la Biblion, kvankam vi ofte pri ĝi ŝercas. Sed vi devus legi tuj de la komenco. Tie vi trovos, ke la unua ĉasisto ne estis tiu aŭ tiu homo, sed la Kreinto mem.”

“Kion vi diras Franjo...? Ĉu Dio vere bezonas viandon de sovaĝa besto por sin nutri, kvankam mem spirito kaj ne korpo?” mi provis eskapi novan falilon de Franjo.

“Tuj post la raporto pri la unua homa peko, rakontata en la tria ĉapitro de Genezo, fine de la ĉapitro troviĝas unu nura frazo, kiu klare diras, kiu la unua ĉasis: *Kaj Dio la Eternulo*

faris por Adam kaj por lia edzino vestojn el felo, kaj Li vestis ilin. Vi estas kuracisto, eĉ se ne bestkuracisto, vi supoze scias, ke normale feloj troviĝas sur la korpoj de bestoj. Se vi volas felon, vi devas ĉasi la koncernan beston, ĝin mortigi kaj depreni per tranĉilo ĝian felon. Tiel kredeble ankaŭ la Eternulo procedis kaj eĉ mem vestis la deliktintan homaron. Kompreneble, oni ekde tiam ĉiam povis ĉasi bestojn, ĉu laŭ la maniero kaj spirito de Dio, ĉu laŭ la maniero kaj spirito de la ribelanto kontraŭ Dio, la majesta Nimrod...”

“Pardonu, Franjo, se mi bone rememoras la vortojn de nia katekisto en la gimnazio, ĉu Adam kaj Eva mem ne faris por si vestaĵon el arbofolioj kiam ili hontis pro sia faro? Kial do ili bezonus aldonan vestaĵon el sange akirita felo?”

“Precize legi, Hermann!” Franjo min kun serioza pedagogia rigardo admonis kaj daŭrigis: “Meze de la sama ĉapitro vi povas vere legi, ke ili kunkudris foliojn de figarbo kaj faris al si zonaĵojn. Do, ili ne faris al si kompletajn vestaĵojn, sed nur zonaĵon. Sed tio ne estis la ĉefa problemo, kiu bezonus plibonigon fare de la Eternulo. Dio volis la okazon utiligi kaj al ili indiki, kiu estas la nura vojo kaj prezo por esti deaĉetita de la kulpo, farita per la peko. Per vesto folia, kaj tiel sensanga, do tute moderna laŭ la niatempa spirito, oni la pekon ne povas repagi, ĉar la *salajro de la peko estas la morto*, kiel vi povas legi tute ekstremparte de



la sama libro, en la epistolo al Romanoj, do la pekanto mem devas morti – aŭ, kiel en la kazo de Adam kaj Eva, iu alia viva estaĵo. Sed ĉar nur la morto de tia viva estaĵo povas rekompenci la homan kulpon, kiu mem kulpon ne havas, sed tamen troviĝas almenaŭ sur la nivelo de la homo, nome la morto de besto, povas nur simbole kovri la pekon, kiel la felo nur simbole povis kovri la honton, kaj ankaŭ en nia tempo tiel estas, dum la vera elaĉeto povos okazi nur, kiam estos naskita tiu, kiu mem estos homo, sed ne naskiĝos el la peka linio de Adam, kaj pretos oferi sian vivon por elaĉeti la homan rason de ĝia kulpo. Tial la Eternulo, volinte eduki la unuan homan paron, devis oferi la unuan beston por al ili klarigi la problemon de la savo, kiu daŭre restos la ĉefa religia, sed ankaŭ morala dilemo de la tuta homa historio ĝis nun. La rakonto diras, ke la homo ĉiam provas eskapi sian kulpon laŭ la humanisma vojo, tiel Eva kudrante sian zonon el figarbaj folioj, ne verŝante la sangon de senkulpa besto; tiel same Kaino, oferinte tritikon kaj vegetaĵojn anstataŭ ŝafidon

kiel Habelo, pro kio la ofero de Kaino ne estis akceptita de Dio kaj Kaino pro tio mortigis sian fraton Habelon kaj tiel montris, kie la realo de la humanisma trompo finiĝas.”

“Kaj la vera solvo de tiu problemo do estis Jesuo, la senkulpa ŝafido, kiu per sia sango la nura povis elaçeti la homojn sur la kruco, vi verŝajne volas diri...”, mi devis tamen montri, ke mi ne estas ĝuste analfabeto koncerne la Bibliion.

“Nu, tamen funkcias, Hermann!” ridis Franjo. “Kaj la tuta afero denove finiĝas per la maniero sin vesti...”

“Ne diru, ke ni denove devas nin lasi de Dio vesti en la felon de tiuj ĉi kelkaj ursoj, kiuj nun denove vivas en niaj arbaroj...”

“Ne, ni devas, se ni akiris kredon en Jesuon, nin vesti en lin mem, kiel diras lia apostolo Paŭlo. Kompreneble ne temas plu pri materia sinvestado, kiel Adamo kaj Eva estis materie, per reala felo vestitaj, ja ili ne povis jam kompreni la aferojn spirite. Tiel ni devas, se vere sekvantaj Kriston, vesti en lin spirite, kiel ni ankaŭ spirite kaj ne materie, kiel kredas la herezaj eklezioj, manĝas lian korpon, partoprenante ĉe la pano kaj vino, memore je lia lasta vespermanĝo, lian vivon kaj agojn kaj lian sinoferon.”

“Kaj kiel aspektas la teksaĵo de tiu spirita mantelo de Kristo, kiun vi kiel kristano devas surmeti?” mi demandis eble iomete provoke, kvankam mi ankaŭ ne volis lin ĉagreni.

“Temas pri la preskaŭ sama vortradiko, ĉiuokaze ili ambaŭ

devenas de la sama: *teks-* el kiu evoluis la ideo teksa kaj ankaŭ la ideo tekstumi, skribi tekston. Kaj la teksaĵo de Kristo estas la teksto de lia vorto, la Biblio. Ĝi devas esti la spirita mantelo de tiu, kiu sin prezentas kristano, ĉio alia estas sensignifa folkloro! Kaj jen la ĝoja mesaĝo el la evangelio... Kvankam en la epistolo al Hebreoj estas dirite, ke *sen sangoverŝado ne fariĝas absolvo*, al tiu leĝo jam sufiĉe kaj por ĉiam pagis tributon Jesuo sur la kruco kaj tiel neniu plu devas pagi savon per sangoverŝo, nek besta nek homa. La ĉasisto de nia epoko ne prenas la vivon de besto pro la sama motivo kiel Dio tute en la komenco tion faris, por kovri la pekon de la homo. La ĉasisto de ĉiuj lokoj kaj tempoj post la ofero de Kristo mortigas bestojn nur por reguli ilian staton en la naturo kaj por kontribui al la nutrado de la homoj.”

El la arbokrono denove montriĝis la kapo de Hannah. Ŝi lerte descendis laŭ la ŝtupetaro kaj jam staris antaŭ ni. En la manoj ŝi tenis brune kolorigitan paperfolion, per tondilo tranĉitan en la formo de deprenita besta felo. Franjo kaj mi interŝanĝis niajn surprizitajn rigardojn, por ion diri ne restis tempo kaj oportuno. Mi gratis la kapon de Hannah kaj decidis hejme legi en la teksto, kiu povus esti komprenata ankaŭ kiel la teksaĵo por kovri onies honton, kaj ne dependi nur de palaj memoroj pri la prelegoj de mia jam antaŭ longe mortinta katekisto. ❀

Transflugo, oka parto

Du jaroj de novicperiodo kaj poste du aliaj de beletristiko kaj iom da sciencostudado atendis min.

La novicperiodo estis iom peza. Eble tian mi nun valorigas tiun tempon, ĉu pro la tempodistanco ĉu pro mia nuna aĝo. Mi klarigu. Juneco kapablas akcepti ĉion, eĉ la plej ĝenajn situaciojn. Gejunuloj vivas en la nuno sen tro pensi pri la estonteco. Mi ne intencas diri, ke la estonto neniel ĝenas ilin, sed ke ĝi ŝajnas al ili tro fora por pripensi ke ili per ĝi ĝeniĝu.

Mi studadis diversajn literaturojn, ĝiajn plej elstarajn aŭtorojn kun metodoj kritiki, kribri kaj eltrovi en ili la belon kaj la malbelon. La latina lingvo estis la bazo. Iom da greka spicis la tuton. Kaj kial la greka? Ĉar laŭtradicie ni devis poste studi iom da Biblio, kies ŝlosilaj lingvoj estas la latina kaj la greka. Kompreneble, kun tiu logiko oni devis ankaŭ studi la hebrean, precipe pro la Malnova Testamento. Sed tiun lingvon oni gustumos nur dum la teologia kurso.

Lingvojn mi tre amis. Do tiuj studindaj algluiĝis en mian menson kiel mielo. Oni diras ke la mielo estas unu el la plej

kuracaj terapioj. Por mi la lingvostudado estis ĝuste tiu terapio al mia nervozo.

La sciencon kaj la matematikon mi ne ŝatas kaj neniam ŝatis. Mia menso neniam sukcesis kapti ilian logikon. Eble vi konkludus ke sekve mia menso ne konas logikon kaj ke mi ne estas normala. Mi ne scias. Eble vi pravus, eble ne. Eble tiu situacio dependis de miaj profesoroj. Sed se tio estas vera, la aliaj kamaradoj devis trovi sin en la sama maro. Sekve mi ne hontas konstati, ke la kulpo estis nur mia. Ne ĉar mi volis tion, ne ĉar mi azenis.

Ho ve! Povra azeno!

Ĉi tie permesu al mi flankenmeti mian temon por halti ĉe ĉi tiu punkto. Mi sentas, ke mi devas pardonpeti al la azeno, laŭdante ĝin, tiom atakitan, tamen tiom humilan kaj inteligentan. Jes inteligentan. Pli ol oni pensas.

Je mia infanaĝo, mi vivis kiel la aliaj buboj duone endome kaj duone surstrate. La mediteranea kutimo. Tiutempe trapasis la stratojn nur ĉevaloj kaj azenoj. Do ne ekzistis danĝero precipe por ni infanoj.

Unu el niaj najbaroj, karbovendisto, preskaŭ ĉiutage direktis sian azenon tirantan ĉaron plenan de korboj da

**de Carmel
Mallia**



karbo. Li direktis sian azenon ĝis la alia parto de la urbo por vendi sian stokon. Post mi ne scias kiom da horoj, ni knaboj kun ĉiam renovigata surprizo vidis la tute solan azenon, tirantan la nun malplenan ĉaron, paŝadi sur la strato sen la stirado de sia mastro, kiu, tutlibere fajfante laŭlonge de la vojo, marŝis post la azeno, kvankam ne tute apude, tiel ke la azeno ŝajnis koni bone la straton trapaŝendan.

Ĉi tiu bildo estis preskaŭ ĉiutaga, kio mirigis nin infanojn.

Miaj studjaroj pasis kiel sonĝo. Pasis ankaŭ tiuj maloftaj specialaj kuniĝoj, kiam ni devis interparoli nur latine. Tion ni devis obeeme fari dum kelkaj tagoj, eble du, tri, monate, mi ne bone memoras hodiaŭ post tiom da jaroj.

Hodiaŭ mi estas sufiĉe maljuna. Mi estis 24-jara, kiam mi forlasis mian landon por iri studi filozofion en Francujon. Ne estis facile pensi, ke mi denove forlasos mian familion, eĉ dum tri jaroj. Sed ĉu mi jam ne forlasis ĝin kvar jarojn antaŭe? Tiam mi faris la unuan paŝon. Kial ne la duan? La nunan. Se la unua relative plaĉis al mi, ĉu la dua ne devis esti same alloga? Mi kuraĝigis min mem. Kiam min vokis mia superulo por anonci al mi, kien mi devos iri por studi mian filozofion, mi ĝojis pensi, ke mi vizitos unuafoje novan landon.

Antaŭ ol eniri la Ordenon, mi studis la francan lingvon. Tute

sola! Nur tri monatojn! Tro mal multe por ekzameniĝi. Tamen mi decidis subiĝi al la ekzameno kaj kompreneble malsukcesis. Kion plu mi pretendis? Tio multe malhelpis mian superulon decidi por mi la novan landon. La italan lingvon mi tre amis; mi ĉiam estis la plej bona studento en la itala, kaj tiurilate mi ĉiam estis la unua en la klaso rilate ekzamenpoentojn. Ne nur, sed, korektante la hejmtaskon, precipe la tradukojn el la angla en la italan, mia gimnazia profesoro, aŭdinte unue la tradukon de aliaj studentoj, aŭskultis laste la mian. Poste li ekkriis: *He! Belega traduko!* Kaj li ripetis al la aliaj frazojn el mia traduko.

Kompreneble, tio flatis kaj kuraĝigis min. Estis pro tio, ke post multaj jaroj mi ege deziris lerni alian lingvon. Tial, mi prezentis mian deziron al mia superulo, kiu komplezis. Feliĉe por mi! Mi neniam estis tiel feliĉa.

La lastajn tagojn en mia lando antaŭ ol elmigri mi pasigis senpacience preparante min, vizitante mian familion, studante iom da franca, kvankam ne multe kaj sen entuziasmo, pro la fakto, ke mi sciis ke mi havos sufiĉe da tempo por fari tion. Fakte tri jarojn.

Jen la ŝipo en la haveno. Mi surŝipiĝis adiaŭante miajn karulojn antaŭ ol foriri por supreniri mian novan vivostupon. Kien ĝi kondukos min? Unue al Sicilio, poste per trajne al Romo, poste al Francujo.

Post tiu ŝtupo? Mi ne volis scii. ❀

Marjorie Boulton konfirmita

Tre malmultaj abonantoj aldoniĝis al la PEN-anoj kiuj selektis la kandidatojn por la literatura Nobel-premio.

Ili voĉdonis plejparte por Marjorie Boulton, dum la PEN-anoj kiuj ree sin esprimis, ofte modifante sian opinion, koncentris siajn preferojn al Trevor Steele kaj Giorgio Silfer.

Kurioze, preskaŭ neniuj favoris al István Nemere kaj Spomenka Štimec. Nur pri ĉi-lastaj eblas klarigo, ĉar ŝi anoncis ke ŝi rifuzus la kandidatigon.

La diferenco inter Boulton, Steele kaj Silfer estas minimuma, laŭ nombro da voĉoj. Efektive la unua restas nia ne superita poetino, la dua nia plej talenta romanisto, la tria nia

plej valora dramverkisto: inter la vivantaj, kompreneble.

Tamen la tuta esperanta literaturhistorio ankoraŭ ne vidas rivalinon por Boulton, daŭre nia plej talenta aŭtorino, eĉ se delonge silenta. Male, Steele ne estas en absoluto nia plej granda romanisto en cent dudek jaroj da prozo, kaj el la fekunda dramarto de Silfer oni atendas plian disvolvon, kiuj proksimigu lin ekzemple al la dialoge satira Szathmári aŭ al la rime riĉa aŭtoro de *Sonĝe sub pom-arbo*.

Neniu estis klare preferata al la dojeno de niaj verkistoj kaj la sola damo en konkurso: tial vere indas rekandidatigi ŝin. ❁




- La ĝenerala Asembleo de LF-koop estas kunvokita al Ĉaŭdefono, ĉe la Esperanto-Domo, sabaton la 15^{an} de aprilo 2017 je 14h00 por diskuti laŭ la suba tagordo:**
- 1) Komunikoj de la prezidanto.
 - 2) Morala kaj administra raportoj.
 - 4) Ĝisdatigo de la Trijara Laborplano.
 - 5) Ĝisdatigo de la membraro.
 - 6) Diversaj kaj eventualaj.

La kooperantoj kaj stabanoj bonvolu anonci sian ĉeeston al
<lf-koop@esperantio.net>

Demono mia

de Mihail Lermontov

elrusigis
Espopore



*Svarmo de aĉaĵoj, lia sino,
Lin gvidas en nebula nokt'.
Tempeston, plagon kaj mondfinon
Estradas la tenebra vukt'.
Aŭtuna kaj senmova trono
Etendas sin en la arbar';
Sed pala lia vizaĝ-tono
Sur flava fono ŝajnas bar'.
Li naskas ronĝe la malfidon,
Li puran amon ĵetis for,
Li enkarniĝis en perfidon,
Li fajfas pri la sangdolor'.
Sufokas li per nur rigardo
Inspiron vian en la kern';
La flamo de l' subtila ardo
Cindriĝas plene por etern'.*

Kun la aromo de la estiĝa tempo

Kun la aromo de la estiĝa tempo. Jen stile aŭdaca titolo por recenzo. Kial mi ne diru pli klare “la estiĝinta tempo”? Tamen mi decidis konservi la vortojn mem de la tradukinto, nia estimata Vinko Oŝlak. Tiun citaĵon vi mem trovos meze de lia postparolo, p. 279, l. 4, kie li klarigas la esencon de sia traduka projekto.

Tiu stranga esprimo ilustras la elekton de Oŝlak: por traduki verkon de malnova epoko, verkon kies, por moderna leganto, lingvo arkaismas kaj malfacilas, oni provu, en la traduko, rekrei tiun “aromon” de malfacileco kaj arkaismo, aromon de lingvo iom stranga.

Li mem formulas la principon tiel ĉi:

Al mi plaĉas la principo, ke kiom longe la teksto estas komprenebla por la meze edukita leganto, oni la tekston prefere ne modernigu. Skize dirite: mi volis al la slovena kaj esperanta legantoj – ja mi decidis paralele traduki en ambaŭ lingvojn – proponi la tiel gravan verkon el la trezoro de la kristana literaturo kun la aromo de la estiĝa tempo. Ĉu en la traduko sentiĝas la parfumo de la angla lin-

gvo el la 17^a jarcento, mi ne povas prijuĝi, sed mi intencis tion iomete transdoni.”

Ne enirante en profundan diskuton pri la valoro de tiu principo, mi nur diros, ke tiu stila elekto ne faciligas la taskon de la leganto, jam imponan pro du aliaj kialoj: unue la legado de tiu diketa volumo kun 284 etliteraj paĝoj sufiĉe longas. Due, la antaŭparolo instigas atente legi la bibliajn citaĵojn indikitajn per la piedpaĝaj referencoj, okulfrapaj danke al limiga linio: serioza legado, avertas la tradukinto, *estas iomete pli postula ol legado de aliaj libroj (...). Tiu, kiu volas la tekston de tiu ĉi libro konsumi en pleno kaj tuteco kaj ĉion-ĉi kompreni tiel, kiel tion konceptis ĝia aŭtoro, tiu faras por si bone, paralele al ĉi tiu libro dumlege havi malfermita ankaŭ la Biblion, do oni neniel transsaltu la rimarkojn sub la linio per (tiele! ĉu “proponitajn sub la linio per”?) la indikitaj bibliaj lokoj, sed oni ilin paralele kaj atente legu (p. 5, l. 25/29)”. El tiaj citaĵoj mi mem nombris 430.*

Ĉu do ni malkuraĝigu? Baldaŭ tia leganto surprizita mal-

**recenzo de
Francisko
Degoul**

**John Bunyan,
La progresado
de l' pilgrimanto,
tradukis
Vinko Oŝlak,
eld. Ignis,
Ljubljana /
Labako
2015**

kovros, ke tia legado finfine ne estas tiel peniga, kiel unue ŝajnis. Tia leganto pli kaj pli envenos feliĉigan kaj kontentigan konsterniĝon, kian oni legante aliajn librojn ne kutimas travivi. Jen la proponita vidpunkto.

Honeste tamen mi konfesu mian propran sperton: pro mia bonega kono de la *Nova Testamento*, mi relative malofte malfermis la Biblion dum la legado, ne sentante la bezonon konsulti ĝin por retrovi citaĵojn jam bone memorigitajn de mi. Due, pro mia recenza celo kaj la eteco de mia disponebla tempo, mi limigis la studon de la koncernaj citaĵoj al la dekvin unuaj paĝoj (p. 15/29). Trie, mi ne atingis “feliĉigan kaj kontentigan konsterniĝon”, kiu supozus plenan aliĝon al la puritana fido de Bunyan kaj Oŝlak, kaj mi tro kutimas admiri la belecojn de la Biblio per rekta legado por trovi plezuron en la konsilita trafoliumado.

Ĝis nun, pri Bunyan la aŭtoro (1628-1688), ĉi-supre menciigis nur lia “angla lingvo el la 17^a jarcento”. Pri tiu verkisto, oni do legu la paĝojn 276 kaj 277 de la postparolo. Gravas tamen tuj mencii la paradokson de Bunyan, la “nekonata famulo”, mi dirus.

Nekonata, ĉar instruitaj homoj kiel Oŝlak kaj mi mem malkovris Bunyan kaj *The Pilgrim's Progress*, lian ĉefan verkon, nur en tre matura aĝo: la tradukinto *ne antaŭ 2005* (p. 278), kaj mi ĉi-jare. Famega tamen por siaj samlandanoj, ĉar *tiu ĉi libro estas inter la anglaj verkoj la dua plej ofte vendita*

libro tuj post la Biblio kaj (...) estas tradukita en pli ol 200 lingvojn. Krome, laŭ Oŝlak, paradoksas pri tiu verko ankaŭ la ĝisnuna manko de traduko en esperanto, laŭ li atribuebla al manko de intereso por religioj en la moderna mondo, interalie ĉe esperantistoj. Tiu supezebla manko de intereso klarigas la moderecon de la *eldonkvanto 300* menciita en p. 4.

Tricent happy few? Sed kiaj? Antaŭ ol respondi, mi dezirus tiujn homojn helpi per mia propra sperto legata. Fakte, post la antaŭparolo, mi tuj komencis la unuan ĉapitron. Mi eraris, kaj nun vigle konsilus antaŭe legi la du partojn de la postparolo, el kiu cetere larĝajn erojn mi ĉi-supre resumis kaj reproduktis: post du paĝoj *pri la aŭtoro* (p. 276/277), sekvas sep *pri la esperanta traduko* (p. 278/284).

Manke de tiu pedagogia preparado, mi estis ĝenata kaj surprizata per la malfacila lingvaĵo, ankaŭ per mia deziro strikte kompreni la teologian fonon kaj la intencojn de la aŭtoro. Tiam mi decidis legi la postparolon. Sekve de tio, mi revenis al la komeno de la rakonto, kaj tiu dua legado pli fruktodonis ol la unua. Tamen atingite la paĝon 67, fine de la sesa ĉapitro, mi alfrontis la jenan demandon: ĉu antaŭ recenzi mi devas legi la tuton, kiel mi kutimas?

Ĉi-libre des malpli utilus, ĉar al trafoliumanto ĉiupaĝaj titoloj de ĉapitroj fidele liveras la fadenon de la rakonto: la ĉefrolanto forlasas sian urbon, hejmon kaj familion, ĉar li timas morton, inferon, kaj detruon de

lia pekema urbo, kaj atingas *la Monton Ciono* (p. 31, l. 4/5, p. 50, l. 4/5, p. 53 l. 19): jen simbolo de la spirita vivo kun ties elanoj kaj tentoj, esperoj kaj malkuraĝiĝoj, ĝis la sukceso per la Zamenhofaj “obstino kaj pacienco”, kiel la konstanta etoso de la verko ebligas prognozi.

Mi fine venis al la jena konstato: por mi ne eblas luda legado de tiu rakonto aventura pro la malfacila lingvaĵo. Laŭ mi restus do por tion legi du eblaj motivoj: intelekta scivolemo aŭ spirita pilgrimado se la leganto *identiĝas (...)* per la *ĉefrolanto (...)* aŭ kun tiuj, kiuj lin aŭ ŝin *akompanas* (p. 282, l. 6/8).

Lin aŭ ŝin. Ĝis nun mi ne menciis la duan parton de la verko. Fakte, post la alveno de la pilgrimanto *al la ĉiela urbo* (p. 154), okazas dua aventuro: la edzino, kiu komence preferis ne akompani la edzon, poste bedaŭras sian sintenon, foriras kun la infanoj, kaj fine retrovas lin *en la ĉiela urbo* (p. 267). Post hipotezo, ke tiu dua parto havus intereson por feministoj, min dubigis la unua ĉapitro, *kristanino postsekvas kristanon*, sed ĉi-teme mi lasas scivolemul(in)ojn enketi.

Ni nun profundigu la du gravajn demandojn de tiu ĉi verko: la lingva kaj la kreda. Pri la lingvo, vidu flanke.

* * *

Post tiu ekzameno de la pli malpli diskutablaj manieroj krei tiun “aromon de la estiĝa tempo”, ni venu al la funda kredo inspiranta same la verkiston kaj la tradukinton. Por kvalifiki ĝin, mi akceptus la

Antaŭ lingva analizo, mi tuj avertu pri la malneta aspekto de la verko, laŭ mi tro rapide eldonita antaŭ atentaj relegoj. Mi ne listigos la relative multajn preserarojn, nur mencios la ĝenan eniĝon de slovenlingvaj eroj, interalie kvin linioj en p. 43, kaj titolo de la ĉapitro supre de dekunu paĝoj. Pri tio cetere Ošlak senkulpiĝas en noto, p. 288, fine de la “enhavmontrilo”.

Post tiu margena avertu, por gustume alkutimiĝi al tiu lingva “aromo de la estiĝa tempo”, ni kune malkovru la sep unuajn liniojn de la rakonto mem:

Kiam mi marŝis tra la sovaĝa pejsaĝo (tiele!) de la mondo, mi malsupreniris al certa loko, kie troviĝis kavo, kaj mi ekkuŝis tie por ekdormi; kaj kiam mi dormis, mi havis sonĝon. Mi sonĝis, kaj tion mi retenis; mi vidis viron, vestitan en ĉifonoj, kiel li staris sur iu loko, vizaĝe turnita for de sia domo, en lia mano libro, sur lia dorso granda ŝarĝo. Mi alrigardis lin kaj vidis, kiel li malfermas libron kaj legas en ĝi; kaj kiam li tiel legis, li ploris kaj tremetis; kaj kiam li ne povis plu tion elteni, li falis en plendantan ploron dirante: “Kion mi faru?”

Jen ege instruivaj linioj, lingve kaj teme.

Teme, la rakonto mencias sonĝon. Fakte la tuta verko prezentiĝas kiel du sinsekvaj sonĝoj: la unua pri la kristano, la dua pri la kristanino. Tiun fonon ne povos forgesi la leganto, preskaŭ ĉiupaĝe avertita per formuloj tiaj: *mi en mia sonĝo vidis, kiel...* (9 fojojn ĝis la paĝo 66), *mi vidis en mia sonĝo kiel* ktp.

Etose, tuj aperas la du obsedaj temoj de la “ŝarĝo”, kiu simbolas malagrablan konfuziĝon de sufero, tremo kaj plendo, kaj la temo de la “libro”, fakte la Biblio, kiu en la rakonto ĉiam akompanos la pilgrimanton, konstante nutrante liajn pripensojn.

Lingve, kvazaŭ ĉiulinie io ĝenetas. Anstataŭ la tie stranga “marŝi”, kial ne la simpla “piediri”? Ĉu “certa” aŭ “iu”? En la dua linio, ĉu estas vola tiu naŭfoja aliteracio de la raŭka sono “k”? Poste, kial “retenis”? Kial ne simple “memoris”? Fine ni legas “Mi vidis kiel”. Kial ne pli nature “mi vidis, ke”, formulo nur escepta en la verko? Ĉu influo de la angla *how*?

Fakte, en la sekvo konstante retroviĝos tiaj procedoj, certe celantaj elvoki “la aromon de la estiĝa tempo”.

Ni komencu per la vortara uzo, menciante, post “marŝi” anstataŭ “piediri”, ankaŭ la oftegan “kontinui” anstataŭ “daŭrigi”. Egale kun “kial” legiĝas “pro kio” (p. 16, 17, 23...). Mirigas ankaŭ anstataŭ “rekompenci” la simpla “kompensi” p. 41, l. 12, kaj anstataŭ “ĉambro” la vorto “kameron” (p. 16, l.1); fine la arkaisma uzo de “nun” anstataŭ “tiam” (p. 16, l. 4).

→

← Tiu sistema uzo de nekutimaj sinonimoj anstataŭ la normala vorto, jen unu el la manieroj surprizi por sugestis “la aromon de la estiĝa tempo”.

Kion oni diru pri la oftega kunmetaĵo “samtiel” anstataŭ la normala “sammaniere”? Pli ĝenas la enkonduko de ne-PIVaj radikoj: *karzer-* anstataŭ “prizon-” p. 277 l. 11, *ekscelenta* anstataŭ “bonega” p. 279, l. 25, kaj la germana *erst* en la ne tre klara signifo de “komence” aŭ “por la unua fojo” (p. 5, l. 20, p. 36, l. 10, p. 62, l. 10, p. 157, l. 10).

Se nun temas pri paŭsado de la angla, krom la jam notita “vidi, kiel”, mi menciis *apud tio* verŝajne el la angla *about that* en la signifo de “pri tio” (p. 25, l. 6), aŭ eble “por tio” (p. 45, l. 5 k 9). Krome, *tiel li diris* anstataŭ “tiam li diris”, verŝajne pro la angla *so he said; estu abomene (...) por lin (...) aŭskulti* (p. 28, l. 4/5) anstataŭ “estu abomene lin aŭskulti”, kie *por* tradukus la anglan *to*, simpla elemento de la infinitivo. Eble same la stranga uzado de “kiel” anstataŭ “ol” en la esprimo *ne pli bone kiel por li* (p. 32, lasta linio) klariĝus per iu tiea paŭsado de la angla vorto *as* en iu malnovangla esprimo kiel eble *not better as aŭ not so better as?* Multajn frazojn mi penis kompreni, ĉu pro la komplika sintakso lige kun foja labirinteco de la penso, ĉu pro misteraj kialoj, sed mi ne volas tedi la leganton per ekzemploj.

Iuj gramatikaj eraroj klariĝas per manko de relegadoj, mi jam diris. Ĉu tiaj mi konsideru “ĉesi” anstataŭ “ĉesigi” (p. 20, l. 31) kaj “pliparte” anstataŭ “plejparte” (p. 7, l. 26)? Specialan studon meritis la eble tro ofta neakordo de adjektivoj kun la koncerna substantivo, ekzemple en *aferojn, kondukantaj nin survoje* p. 41, l. 9.

adjektivojn “puritana” aŭ “kalvinisma”, malpli precize “protestanta”, kaj eĉ pli malprecize “kristana”, vorto diverse interpretita de ĉiu kristana eklezio.

Ĉe Bunyan, plej konvenas la vorto “puritano”, tiel ĉi difinita en PIV 2002:

1) *Ano de la parto de la anglaj protestantoj, kiuj konsideris la reformacion Elizabetanan nekompleta kaj volis aboli ĉiujn ritojn, ceremoniojn ktp. ne preskribitaj de la Evangelioj kaj Epistoloj.* 2) *Persono, kiu*

afektas striktan severecon en religio aŭ moralo, precipe pri la seksaj aferoj.

Ni komparu tiun difinon kun la vivo de Bunyan. Kiel nemalmultaj anglaj samtempuloj, Bunyan *sian* biblie bazitan kredon praktikis ekster la organizita religio de la anglikana ŝtata eklezio, reprezentita kiel ĝis nun *fare de la ĉiama monarko*. Pro tio Bunyan (...) *estis jetita en la mallibrejon de la graflando Bedford, kie li punsidis dum dekdu jaroj.* (p. 276, l. 25/30).

Jen konfirmo, ke Bunyan estis “puritano” laŭ la signifo 1) de PIV. Sed praktike la unua kaj dua signifoj ligiĝas per la tie menciitaj *Evangelioj* kaj *Epistoloj*, certe fontoj de la disigo el anglikanismo, sed ankaŭ de la morala severeco pro misfido al la “karno”, speciale insista en la *Epistoloj* de Paŭlo.

Tiu misfido ofte montriĝas en la nun studata verko de Bunyan, eĉ pere de la piednotaj referencoj bibliaj. El la tiaj novtestamentaj, 45,5 procentoj reŝendas al la *Epistoloj* de Paŭlo, kontraŭ nur 32,9 procentoj al *Evangelioj*, dum en la *Katekismo de la Katolika Eklezio* (Città del Vaticano 1997), la relativa graveco de ambaŭ tekstoj estas praktike la mala: 52 procentoj por *Evangelioj* kontraŭ 33 por Paŭlo. Pri Jesuo Kristo, por Vatikano *Evangelioj* estas la unua referenco, Paŭlo, la dua. Ĉe Bunyan, male, kiel verŝajne en la tuta puritana kaj kalvinisma movado.

Ĉe Bunyan oftas la esprimo de tiu Paŭla misfido al la karno, negative konotaciita, por ka-

rakterizi ĉu mondumajn pensojn (p. 29, l. 9 kaj 53 l. 4), ĉu plezuron: la pilgrimanto klarigas, ke sekvis lin nek lia edzino nek liaj infanoj (kiuj) preferis siajn junaĝajn frenezajn ĝuojn. Same kiel infanludemon, ankaŭ la karnan tenton tro dormi li mallaŭdas. Certe, tiu vidpunkto fontas el iu fama kaj drama momento de la *Evangelio* (Mat. 26,39): angorigita per sia proksima arestado, la Kristo suferas vidi, ke la disĉiploj dormas, lasante lin sola, kaj diras al Petro: *Ĉu vi ne havis forton vigli kun mi eĉ unu horon? Viglu kaj preĝu, por ke vi ne eniru en tenton; la spirito ja estas fervora, sed la karno estas malforta.* Tamen al la sama Jesuo la disĉiploj antaŭe riproĉis, ke surboate li dormas dum la timiga tempesto (Mat. 8,24/25)! Entute, se la morala severeco parte ŝuldiĝas al la Evangelio, kie troviĝas du eroj mallaŭdantaj la “karno(n)” (Mat. 26,41 kaj Joh. 6,63), tamen ĝi fontas esence el Paŭlo (Rom 8,3 ĝis 8, Gal. 5, 13 ĝis 24...), ĉefa referenco de Bunyan.

Ĉiukaze, por nia severmorala pilgrimanto, dormi dum la “hela tago” estas simpla peko, kiel montras la jena anekdoto.

Iumomente, ripozante sur la vojo, *li dronis en facilan endormiĝon kaj poste en profundan dormon*, sed *“dum lia dormado la skribrulaĵo falis el lia mano”* (p. 47, l. 19/21). Jam reforirinte, li ekkonscias la perdon kaj pentas pro sia dormo: *Ho mizera homo, kia mi estas, ĉu mi vere devis endormi meze de la hela tago? Endormi meze de malfacilaĵoj? Tiel cedi al mia karno kaj misuzi la ripozejon por fari plaĉon al mia karno?* (p. 48, l. 23/26). Feliĉe, post reveno li retrovas la skribrulaĵon, sed bedaŭras la tempoperdon.

Pri la temo de *karno* sufiĉas.

Ni nun venu al la ĝenerala pritraktado de la Biblio ĉe Oŝlak kaj Bunyan: krom la unuarangeco de Paŭlo, protestantismon karakterizas ankaŭ studa legado de la Malnova Testamento, malpli evidenta ĉe katolikoj, eĉ post la Concilio Vatikano



John Bunyan, 1628 - 1688

Dua: ĉe Bunyan, la referencoj al la Malnova Testamento konsistigas 37,6 procentojn de la Biblia ensemblo, kontraŭ nur 19,3, praktike la duonon, en *Katekismo de la Katolika Eklezio*.

Tamen, por ĉiuj kristanoj la centro kaj celo de la Biblio estas la anonco kaj surtera vivo de Jesuo-Kristo. Kristanoj ne interpretas la Biblion kiel la judreligianoj, por kiuj plej gravas la Mosea leĝo kaj la alproprigo de la promesita lando. Alian vidpunkton sur la Biblio proponas ankaŭ historiistoj, kiuj el la biblia kvazaŭa “biblioteko” (LF n-ro 276, p. 194, l. -7) provas elĉerpi la historion de la hebrea popolo, pri kiu nenio klaras antaŭ la epoko de David, kaj la historion de Jesuo, konatan esence danke al la pli malpli subjektivaj atestoj de disĉiploj.

Ĉe Bunyan kaj Oŝlak montriĝas strikte tradicia interpreto kristana de la Biblio: la modernajn esplorojn de historiistoj kompreneble Bunyan ne povis koni, sed de ili ankaŭ Oŝlak estis ne influita. Ekzemple li nomas Moseon *la unua skribisto de la Biblio* (p. 8, l. 2) aŭ asertas, ke Daniel *antaŭdiris la iron de la historio ĝis la fino de la epoko antaŭ la dua alveno de Kristo*

kun precizaj plenumiĝoj ankaŭ en nia epoko, dum ege debatiĝas la demando, ĝis kiugrade la judaj profetoj, speciale Daniel, interpreteblas kiel fidinde antaŭdiraj. Same perpleksigas la esprimo *eklezio, fondita de Kristo* (p. 10, l.7) se oni konsideras, ke ankaŭ pri tio historiistoj debatas, kun la demando pri la rolo de Paŭlo.

Krom neglekti la historian studon de la Biblio, Oŝlak rifuzas ties hebrean interpreton. Por li kaj Bunyan, hebrea religio estas danĝera tento kaj trompo, kun cetere, ĉe Oŝlak, konata kritiko al homaranismo de la judo Zamenhof.

Ĉe Bunyan, sub la titolo *La pilgrimanto kaj la legaleco*, la tria ĉapitro vigle mallaŭdas la judan interpreton de la Biblio. Survoje la pilgrimanto renkontas iun viron nomitan *Mond-Saĝulo*, (kiu) *vivis en la urbo Karno-Sagaco* (p. 23, l. 4). Fakte tiuj ŝajne sendanĝeraj nomoj kaŝas viglan kritikon ligitan al la penso de Paŭlo sed ankaŭ Johano, la du ĉefaj referencoj teologiaj por kristano. Por Johano, la "mondo" (greke *kosmos*), jen la malamiko: *la tuta mondo kuŝas en la malbonulo*" (Johano, *Unua Epistolo*, 5,19). Laŭ Paŭlo – ni jam anoncis tiun temon – la "karno" malamikas al la "spirito": *ĉar la karno deziregas kontraŭ la spirito, kaj la spirito kontraŭ la karno* (Gal. 5,17); vidu ankaŭ Rom. 8,6: *Ĉar la intereso de la karno estas morto, sed la intereso de la spirito estas vivo kaj paco.*

Resume, kiel sinonimojn de "malbono", Paŭlo uzas la vorton "karno" kaj Johano la vorton "mondo". Avertita leganto do tuj komprenas, ke la esprimoj "Mond-Saĝulo" kaj "Karno-Sagaco", atribuitaj al homo kaj urbo komence de la tria ĉapitro, fakte ilustras, malantaŭ trompaj ŝajnoj de saĝeco aŭ sagaceco, la judmesiisme danĝeran iluzion de "mondo" kaj "karno". Fakte la *Mond-Saĝulo* renkontita en tiu tria ĉapitro proponas *la bonaĵojn de la beno, liverita de Dio* (p. 23, l. 26), kaj aldonas, ke la vilaĝo kie ili troviĝas *havas*

nomon moraleco kaj tie loĝas ĝentlemano, kies nomo estas Leĝeco. El la du ĉi-lastaj konceptoj, "moraleco" elvokas por Oŝlak la judon Zamenhof, dum "Leĝeco" resendas al la judo Paŭlo. Ĉi tiu ribelas kontraŭ la judreligia "Leĝo", anstataŭe de kiu li proponas la savon per la Jesua kruco. Cetere por Zamenhof, laŭ Oŝlak, *la morala sinteno estas la pinto de la homa ekzisto kaj la lasta senco de ĉia homa entrepreno* (p. 284, l. 1/2).

Tamen la pilgrimanto fidus al sia konsilanto. Li do foriras kaj provas atingi la domon de Leĝeco, sed rapide troviĝas flanke de iu monteto timige dekliva, kaj, same kiel al la apostolo Paŭlo la ŝarĝo de la Leĝo, *lia ŝarĝo al li sentiĝis eĉ pli peza*. Krome, *al li aperis ankaŭ flamoj de fajro super la holmo*, pri kio la piedpaĝa noto resendas al la biblia epizodo de Sinajo. Li fine teruriĝas, rezignas, kaj revenas al sia normala vojo, kie lin akompanas *Evangeliiisto*. Tiu rapide retrovita kunulo lin severe admonas pro la naiva tento sekvi la konsilojn de Mond-Saĝulo: *Vi riskludas pri via pereco. (...) Mond-Saĝulo (...) interesiĝas nur pri la doktrino de tiu ĉi mondo, fakte doktrino de "Moraleco", kiu lin savis antaŭ la kruco. Kaj ĉar lia naturo estas karneca, li provas perverti miajn vojojn, kvankam ili estas ĝustaj; (...) vi devas absolute abomeni:*

1. Ke li deturnas vin de la vojo.
2. Ke li alstrebas abomenigi al vi la krucon.
3. Ke li starigas viajn piedojn sur tiun vojon, kiu kondukas sub la povon de la morto. (p. 27).

Evangeliiisto insistas: *(tiu) viro deturnis vin, por vin tiel preskaŭ disponigi al pereco (...) kaj estual vi abomene por (tiele!) lin alaŭskulti! (...) vi devas vin deturni de lia strebado, abomenigi al vi la krucon* (p. 28, l. 3/5), *vi paŝis en malpermesitajn paŝspurojn* (p. 29, l. 17/18).

Post tiu tria ĉapitro dediĉita al la tento sekvi la judan religion, venas la kvara, kie

nia pilgrimanto ree admoniĝas pro tiu tento. *Bonintenca*, alia kristana helpanto renkontita, avertas lin, ke Mond-Saĝulo kaj Leĝeco *ambaŭ estas veraj friponoj*” (p. 33, l. 4/5), kaj fine la pilgrimanto mem spertos, ke, alvenante al la monto *kie supre staris kruco(...) lia ŝarĝo malligiĝis de liaj ŝultroj kaj falis desur lia dorso*” (p. 43, l. 15/16).

Entute, la verko vigle laŭdas la kristanan savon, spiritan, individuan kaj perkruan, rifuzante la savon judan, ĉi-teran, kolektivian kaj Di-benan, tiel ĉi prezentitan de Oŝlak: *restaŭri la staton antaŭ la unua peko kaj “savi” la homojn tiel, ke ili denove ekloĝu en Edeno, ignorante, ke Dio havas alian, senkompare pli majestan planon* (p. 283, l. 24/26). Inter la juda kaj la kristana savo, kiu estas pli “majesta”? Eble, mi dirus, la kuneco de la du, proponita de la Revelacio en Ares-Urbeto (1974-1977), nekonata atesto pri spirita evento strukture komparebla kun la Mosea kaj la Muhamada, kaj eĥanta la Zamenhofan alvokon homaranisman rekrei la mondon per *strebado al homeco* (1917, *Mi estas homo*, p. 235, l. 2/3).

Sed al la kontraŭjudismo de Bunyan kaj Oŝlak aldoniĝas nuanco de kontraŭkatolikismo. Fakte – ni jam vidis tion – la anglaj puritanoj, al kiuj apartenis Bunyan, riproĉis al anglikanismo, ke ĝi ne uzis la okazon de disiĝo el Romo por liberigi la kredon el la sakramentoj kaj reveni al la simpla Biblio. Ĉe Bunyan tiu kontraŭpapismo aperas en la sekvaj linioj, kie la rakontanto en sia sonĝo *vidis, kiel la valo estis (...) kovrita per sango, ostoj, cindro kaj mistraktitaj homaj kadavroj, kaj poste vidis groton, en kiu iam en malnovaj tempoj loĝis du gigantoj, nomitaj Papo kaj Pagano, pro kies povo kaj tiraneco troviĝas la ostoj, sango, cindro ktp. de la homoj, kiuj tie kuŝis, estinte kruele mortigitaj*” (p. 66, l. 15/21). Kontraŭpapismo tipa pri tiu periodo de juna protestantismo.


Siaflanke Oŝlak faras similan riproĉon

al la grandaj eklezioj, kiuj volis restaŭri la staton antaŭ la unua peko. Bonvolu relegi kelkajn liniojn ĉi-supre la kompletan citaĵon de p. 283, l. 24/26, kaj vi komprenos, ke laŭ Oŝlak la neprotestantaj kristanoj tro “judecas”, tro interesiĝas pri la kolektiva savo kaj feliĉo de la homaro. La malan analizon prezentas la Revelacio en Ares-urbeto, laŭ kiu la manko de kolektiva perspektivo surtera ĉe kristanoj lasis homaron fali en la terurajn ideologiojn de la lasta jarcento.

* * *

Tamen la profunda judkristana disiĝo pri la interpreto de la biblia Savo (p. 43, l. 2) ne malhelpas komunan amon al la Biblia kerno, ekzemple por esprimi la Dian konsolon. Pri ni relegu Jesajan 45,17, cititan de

Bunyan en p. 19, *Izrael estas savita de la Eternulo per savo eterna* kaj Jesajan 51,12, kie resonas la voĉo de la Eternulo: *Mi, Mi mem estas via konsolanto*. Tiun frazon eĥas Bunyan: *Por ke mi trovu konsolon* (p. 46, l. 13). Por tiu konsolo, li klarigas, li ricevis la “skribrulaĵon” (p. 46, l. 12/16), nome la Biblion, kaj iom poste, *li eltiris la skribrulaĵon el sia brusto kaj iomete legis el ĝi por sin konsoli*” (p. 47, l. 16/17). Tamen malfortas la vorto “konsolo” por elvoki la eternecon de la biblia savo. Sub ambaŭ aspektoj de kristanislama paradizo individua kaj judpraktikristana mesiismo kolektiva, la Didonacita feliĉo eterna entuziasmigas multajn, ankaŭ la pilgrimanton, kiu konfesas tion ĉi: *tre volonte mi estus tie, kie*



mi ne plu mortos kaj en la societo, kiu senĉese jubilos (p. 53, l. 24/25).

Ĉi-cele, laŭ la protestanta kredo, Biblio funkcias kiel savilo, fakte kvazaŭa “legitimilo” (p. 50, l. 15) por esti akceptita en *la monto Siono* (p. 31, l. 16, p. 50, l. 4/5, p. 53, l. 19). Tiel klariĝas la timego de la pilgrimanto post la momenta perdo de tiu “legitimilo”, *ĉar ĝi estis lia dokumento por eniri la ĉielan urbon* paradizan (p. 48, l. 8/12). Tiel klariĝas ne nur la abundo de piednotaj referencoj al la Biblio, sed ankaŭ, en la rakonto mem, epizodoj dum kiuj la pilgrimanto legas tiun libron aŭ mencias ĝin.

Cetere por kristanoj la Biblio estas vera, *skribaĵo inspirita de Dio* diris Paŭlo (2 Tim. 3,16/17), citita de Oŝlak en p. 8; ĝi estas laŭ Bunyan *vortoj de Dio* (p. 27, l. 3), kaj *tio, kio estas Lia verko, ne povas mensogi* (p. 19, l. 15), des pli, ke temas pri *vero (...)* konfirmita per (la) sango de Kristo. Tiu “vero” sufiĉas kiel gvidilo, ĉar pri savo *la Sinjoro (...)* ĉion koncernan *igis skribi en tiu ĉi libro*. (p. 20, l. 13/14). Tiu graveco de la Biblio helpas kompreni la ĉiverkan abundon ne nur de piednotaj referencoj, sed ankaŭ, en la rakonto mem, de epizodoj dum kiuj la pilgrimanto legas aŭ mencias tiun libron.

Krom la Biblio, aliajn gravajn temojn en la verko de Bunyan konsistigas la “ŝarĝo”, kaj la “vojo” aŭ pilgrimado. La unua, fizike peza sur la dorso – ni jam pli malpli vidis tion analizante la unuajn liniojn de la verko –

simbolas angorojn: la urban detruon (p. 48, l. 2) kaj la *faŭkegon de la infero* (p. 64, l. 19). Jen impresa metaforo por elstarigi la timon kiun li jam vigle esprimis al la najbaroj provantaj lin reteni antaŭ la foriro: “*kiam vi mortos, pli malpli frue, vi falos pli malsupren ol troviĝas tomboj, en la lokon, kie brulas la sulfura fajro* (p. 17, l. 15). Poste, en la kvara ĉapitro, ni jam tion vidis iom supre, la ŝarĝo mirakle falis el la dorso je la vido de la kruco (p. 43).

Se nun temas pri la “vojo”, la pilgrimanto *venas el la Urbo de l' Pereo* kaj alcelas la *Monton Ciono* (p. 50, l. 3/4). Li spertas, ke tiu vojo ne ĉiam facilas, eĉ danĝeras, sed timas, ke reveno hejmen estus eĉ pli: *la iro returnen povus doni pli da danĝeroj ol simple kontinui la vojon* (p. 65, l. 1/2). Jam antaŭe la saman ideon li esprimis al du kunuloj timantaj pro leono: *Vi igas min timi, sed kien mi kuru? Se mi revenus en mian landon, tiu estas preparita por fajro kaj sulfuro kaj mi tie kun certeco pereus. Se mi sukcesus veni ĝis la ĉielurbo, mi kun certeco scias, ke tie mi estos en sekuro. Do mi devas riski. (...)* *Do mi volas kontinui*. (p. 48, l. 1/7).

Aliajn epizodojn malkovru la leganto mem: mi ŝparos al li komentojn des malpli taŭgajn, ke leginte nur apenaŭ pli ol la kvarono de la verko, verŝajne pli timiga ol la sekvo, mi riskus doni impreson pli negativan ol donus la legado kompleta, eĉ se angoroj havas profundajn radikojn ankaŭ en la Biblio kaj vivo mem. ❀

Steloj kaj revoj

Mikaelo Bronŝtejn jam kutimigis nin al historiaj romanoj: *Dek tagoj de Kapitano Postnikov kaj Oni ne pafas en Jamburg*; aldoniĝis la esearo *Legendoj pri SEJM*. En la unua verko ni vidas la deklaron zamenhofan pri la dezirindeco de iu "Esperantista civito", kio jam estis prognozita en la leteroj al Kofman kaj Schneeberger de dek jaroj antaŭe; en la aliaj du ni havas aliron pri kio estis la junulara movado en Sovetunio dum la periodo 1966-1979.

Recenzante la nunan verkon de Bronŝtejn oni restas kun dubo: kiom da realo kaj vero kaj kiom da fikcio? Kiu el la du aspektoj enmarketrigas en la alia? Tute realaj estas la citaĵoj el la tiutempaj gazetoj: en la unuaj jaroj post la oktobra revolucio la esperantistaj eldiris devizojn, elradis optimismon, kunigis la socialismon kun la lingva demokratio (kvankam tiu esprimo ankoraŭ ne estis uzata), vidis fortan adheron al la interna ideo, kiu poste, bedaŭrinde ne plu estis la ĉefa antaŭeniga stimulo. Jen citaĵo el la *Petrograda revuo*, n-ro 2, 1918:

Malgraŭ la "nepolitikeco" de la esperantista movado, ĝi bezonas demokratajn vivkondiĉojn, malfermitajn landlimojn

kaj pacan kunvivadon de la popoloj. Tio ne signifas tamen, ke esperantistoj devas esti kosmopolitoj, t.e. homoj sen la patrujo, sed signifas, ke, post la interesoj de familio, nacio kaj ŝtato, ne devas esti forgesitaj ankaŭ la komune-homaj interesoj kaj bonoj. [...] Esperanto, laŭ nia opinio, estas potenca faktoro por pacigo de la popoloj [...].

Tra la citaĵoj konturiĝas la historio reala: el *Esperanto triumfonta*, n-ro 67, 1922, estas ĉerpita la deklaro per kiu formiĝas SAT, apartiĝante de la neŭtrala UEA, kiu finiĝas tiel: *For la hipokritan neŭtralismon, for la kapitalismon, vivu SAT!*

Same historia estas la ĉesigo de la agado de UEA en Sovetio kaj la fondo de Sovetlanda Esperantista Unuiĝo (SEU); supozata ŝtelado far sovetaj oficistoj estas de la aŭtoritatoj prezentata kiel kaŭzo de drasta malpliigo de la ekonomiaj rimedoj. Ĉio estas raportata komence aŭ fine de ĉiu subĉapitro, tiel ke eĉ la nura legado de tiuj citaĵoj povus doni sintezan kaj sukan bildon pri la tuta historio en Sovetio ekde la oktobra revolucio ĝis la stalinaj purigoj, pasante tra la hispana civila milito kaj la partopreno

**recenzo de
Carlo Minnaja**

**Mikaelo
Bronŝtejn:
*Mi stelojn jungis
al revado.*
eld. Impeto,
Moskvo 2016.**

en ĝi de iuj el niaj protagonistoj. Sed tiu periodo, komenciĝinta inter grandaj esperoj pri justeco, evoluas al katastrofo: *En tiu nigra aŭtuno de la sangata trideksepa jaro, inter miloj kaj miloj de "popolmalamikoj" estis pafekzekutitaj en Ukrainio kelkdeko da elstaraj esperantistoj.* La legado de la nur sintezalisto frostigas: Ivn, Miĥalski, Sutkovoĵ... ŝajnas, ke ni estas en la intrigo de krimromano, kaj tamen tio vere okazis: la landa movado estis komplete detruita, la procesoj daŭris ankaŭ en 1938, krom mortkondamnoj estis amaso da verdiktoj pri longaj punlaboroj.¹

La libro estas, esence, rakonto pri entuziasma socia kaj reĝima ŝanĝo, kiu poste kolapsas en tragedio. Ke Bronŝtejn sukcesi tredi inter brilaj perloj fadenon en koliero tiom funebra, estas lia granda merito, kiu metas la verkon inter la plej bonajn romanojn de nia tuta literaturo ĉiuepoka. Ĉefrolantoj? Pluraj, sed elstaras unu: Ernest Karloviĉ Drezen, ĉefo en strukturo kiu laŭdifine devus esti demokrata, sed kiu tuj fariĝas hierarkie piramida kaj kiu poste lin pereigos. Amata de la virinoj, kaptata mem de personkulto, kiun li volus rifuzi, sed kiu lin ĉirkaŭas sen ebleco de eskapo, Drezen konturiĝis kiel ĉefo de la soveta esperantismo, prezidanto de la plej granda societo, la petrograda "Espero"; ĉefo, kiu penas transiri, en la alparoloj, de la malnova "sinjoro" al la nova "kamarado". Drezen rolas kiel interpretanto de la esperantismo en

la servo de la sovetlandaj principoj kaj inverse, kiel aplikanto de tiuj principoj al la esperantistaj idealoj, kiuj konturiĝas kiel rifuzo de la hipokrita "neŭtrala esperantismo", rifuzo kiun ni trovas ankaŭ pli malfrue en citaĵo el Lapenna de 1937. Drezen aspektas kvazaŭ la projekcio de tridimensia Stalino plagitita sur la ebena esperantista koordinatsistemo. Kiel diras Anna Striganova, en recenzo publikigita en la pasintaprila numero de *Rusia Esperanto-Gazeto* pri la rolo (kaj aspekto) de Drezen en la romano: *Samtempe sugestanta estimon kaj kruelan malestimon, raven kaj plenan malakceptadon, laŭ sia influo al vivoj de ĉiuj aliaj herooj, laŭ sia influo al leganto, li povus esti nomata la ĉefa heroo de libro.* Kaj lia estas la portreto en la kovrilpaĝo, kun la ruĝe-nigra koloro tuĉita el malnova gazeta foto de 1920 montranta la strekojn de la kliŝo.

La revolucio gardas siajn ŝultrojn, cirkulas kaŝrigardantoj, regas timo pri propraj diroj, ĉu ili povas esti konsiderataj kontraŭrevoluciaj, do ekstreme danĝeraj. Kaj la revolucio manĝas siajn filojn, la diversaj aloj kiuj ne adaptiĝas al la ĉefa ideologio estas kondamnataj kun abomeno: *la malnoblaj fiuloj de la zinovjeva-trockista opozicio...*

Inter okcidentaj neinformitoj cirkuladis onidiroj, ke en la stalina Sovetio esperanto ĝuis grandan favoron. Tio estas vera nur parte, ankaŭ tiam esperantistoj devis multe labori por konvinki la regantan klason, ke

¹ Kelkaj saviĝis: Semjon Podkaminer (1901-1982), judo, studento je la tempo de la romano, sukcesos travivi la militon kaj restarigi la movadon en Sovetio en tre malfacila tempo; li alvenos al kelkaj UKoj kaj estos nomumita honora membro de UEA. Lia arkivo, certe utila por pristudo de la E-movado en Sovetio dum la stalina periodo, iĝis alirebla nur antaŭ nelonge.

unu sola lingvo ne etna estas la solvo de la prolet(ari)a interkomunikado.² Drezen mem diras, en *Historio de la mondlingvo* (1931), citata de Bronŝtejn: *Ni ne intencas konsideri la nunan Esperanton kiel plej perfektan lingvon. Ni volonte lasas al Esperanto modestan servan rolon por la internaciaj rilatoj... Kaj tamen ni scias, ke nia lingvo pluen kreskos, pluen evoluos, kaj fine el ĝia kerno formiĝos la plej perfekta, la unusola lingvo de la socialisma epoko.*

Certe *Mi stelojn jungis al revado* estas historia romano. Ĉu ankaŭ amromano? En la sep partoj de la verko amas ja la (fikciaj) rolantoj, Maurice, Vera, Francine (karesnome Frosja), Ŝlomo, Vasilj, Talis, la du Semjon-oj: ilin disperdas kaj taŭzas la revolucio, la deviga transloĝiĝo, la vundoj dum la hispana milito, kie Francine, post malfacila periodo en Parizo, rifuzata ĉar suspektata pri komunismemo pro sia restado en Sovetio, estas reportero. Nu jes, estas ankaŭ ama sceno, ekstrema pruda, inter Drezen kaj Francine... Ĉesto de steloj apenaŭas, revado ja abundas, eĉ se poste ĝi frakasigos. Ankaŭ la fikciaj roloj ne estas tute fikciaj, sed, kiel Bronŝtejn klarigas en la Postparolo, mulditaj laŭ vere ekzistantaj personoj.

Malnovaj fotoj riĉigas la volumon: Nekrasov, Deŝkin, Lanti, Devjatnin kaj multaj aliaj eble estas hodiaŭ konataj eĉ ne nome, sed iliaj vizaĝoj prave sidas en tiom grava romano.

La fikciaj protagonistoj kru-



ciĝas kun realaj personoj: ili manpremas kun Lenin, parolas pri la apogo al esperanto far Lunacarski, tiel ke al la leganto ŝajnas vivi meze de la historio. Ili revenas de ĉapitro al ĉapitro, oni kvazaŭ sekvas unuope iliajn historiojn: kelkio estas feliĉfina, kun geedziĝo, sed morna pro labore trudata disiĝo. La libro tuŝas festajn momentojn kaj tre severajn situaciojn, longajn priskribojn kaj kraketantajn dialogojn, timoplenajn singardojn kaj ŝercajn aludojn; por ĉiuj tiuj diversaj registroj la aŭtoro trovas la ĝustan tonon, kaj la leganto restas katenita ĝis la fino. La lingvo fluas dolĉe, kun specifa aromo ĉe saĝa uzado aŭ ne de la difina artikolo, ĉe antaŭ- aŭ postmeto de la subjekto, ĉe la konstruo de la frazoj kvazaŭ per versoj; versoj ja prologas al ĉiu el la sep partoj de la romano. Cetere Bronŝtejn estas ankaŭ bona poeto kaj kantisto; se Dylan gajnis Nobel-premion pri literaturo, kial ne Bronŝtejn? ❀

² "Proletario" estis la tiama vorto, vaste uzata en la revoluciaj medioj, oficialigita en la tria *Oficiala Aldono al la Universala Vortaro*; ĝin igis arkaika la oficialigo de "proleto" en la oka *Oficiala Aldono* en la Sepdekaj jaroj.

Hipokriteco fariĝas ĉefverko, per la subtila ironio de Molière

recenzo de
Anne Jausions

Molière:
Tartufo,
el francigis
André Cherpillod,
eld. Fonto, 2012

Moliero, mondscale konata dramaturgo el la 17^a jarcento, ankaŭ rolludis en siaj teatraĵoj. Zamenhof tradukis de li *George Dandin* en 1908.

André Cherpillod, akademiiano (1992-2010) multe verkis, tradukis kaj en 2006 ricevis la OSIEK-Premion pro sia *Konciza Etimologia Vortaro de Esperanto* (2002).

En tiu lia traduko de *Tartufo*, mi unuavide bedaŭris ke ne temas pri versoj, kiel en la franca, kaj en la traduko de Gaston Waringhien en *Tra la parko de la Franca poezio*.¹ Sed tie, Waringhien tradukis nur dudek ok versojn, aleksandrojn kun 14 piedoj kiel necesas en esperanto. Georges Lagrange tradukis verse klasikaĵojn de Racine, el la sama periodo, ekzemple *Phèdre* (Fedra).²

Cherpillod pravigas sian prozan elekton en la Antaŭparolo: Moliero verkis proze aliajn gravajn teatraĵojn (*Donĵuano*, *La Avarulo*) kaj krome teatraĵon oni devas kompreni ĉe la unua lego. Li ja volas speguli plej proksime la sencon de la originalaj frazoj.

En tiu Antaŭparolo, la rolan-
toj estas bone prezentitaj: kelkaj

estas malsimpatiaj (la gasto Tartufo, la familia patro Orgono kaj lia patrino Pernela) kaj kelkaj aliaj plenaj je saĝo (Elmira, la dua edzino de Orgono, Kleanto, lia bofrato, Dorina, la akompananto – ne servistino – de lia filino Mariana).

Cherpillod pravigas ankaŭ la elekton de la *a*-finaĵo por la inaj nomoj, kaj nombras ilin en tre diversaj zamenhofaj tradukoj (ne nur en *Marta*, sed ekzemple aliaj dek du en la Biblio!) Plie, li koncize prezentas Molieron kaj pli detale, sur tri paĝoj, la tri versiojn de *Tartufo* en 1664, 1667, 1669, klarigante la povon de la Kompanio de la Sankta-Sakramento (partio de bigotoj), kiu komence estis pli cenzuranta ol la juna reĝo Ludoviko la 14^a, kiu finfine protektis la artiston.

Ni alvenas al la verko mem kaj alia tikla punkto: multe da vortoj kiuj apartenas al la lingvaĵo de la 17^a jarcento, aŭ al senĝena dirmaniero, ne havas ekvivalentojn en esperanto kaj perdas sian sukcon: *Marchons, gaupe, marchons* (je la fino de la dua sceno en la unua akto, Sinjorino Pernela al sia servistino) iĝas *Iru, aĉulin', iru*, kaj

¹ Gaston Waringhien:
Tra la parko de la Franca poezio –
La Klasika periodo,
eld. Gabrielli, 1980
(dulingve).

² Georges Lagrange:
Fedra (Jean Racine),
Antologieto de la franca literaturo,
en *Revue française d'espéranto* n-ro 424,
oktobro 1991

tio redonas la sencon, sed ne la sukon. Multe da francaj vortoj povus esti tradukitaj per “aĉulino”, tiu lingvo kaj tutcerte multaj aliaj riĉas pri tio! Sed estas memvola defio de Cherpillod uzi nur PIV-ajn vortojn.

Estas atendataj la unuaj vortoj de Tartufo al sia servisto, kiam li finfine aperas en la dua sceno de la tria akto, konataj de ĉiuj francaj kleruloj: *Laurent, serrez ma haitre avec ma discipline*. Tie la vortoj ne plu estas tuj kompreneblaj de la nuna publiko, sed restas gravuritaj en la memoro. *Serrer ĉi* tie signifas ordigi, *haitre* estas kvazaŭ harĉemizo kiu vundas la korpon, kaj *discipline* estas vipo, du iloj kiujn kelkaj kredantoj uzis por suferigi sin pro kompato kun la suferoj de Kristo kaj atingi sanktecon. La traduko estas: *Laŭrento, ordigu mian pentocemizon kun mia pentoskurĝo*. Eble la plej bona traduko laŭ la senco, sed mi estas certa ke mi ne retrovus ĝin en ĉiuj verkaĵoj de studentinoj kiel okazis al mi en Alĝerio: ili scipovis kaj la araban kaj la francan lingvojn, kaj plezure alproprigis al si tiujn unue misterajn vortojn.

Tuj poste, jen dialogo tre ŝatata, de Tartufo al Dorina:

...*Cachez ce sein que je ne saurais voir* kaj la sekvo:

Par de pareils objets les âmes sont blessées


Et cela fait venir de coupables pensées.

(Tradukita tiele: Kovru tiun bruston, kies vidon mi ne povas elteni. Per tiaj vidaĵoj la animoj

estas vundataj, kaj tio instigas al kulpaj pensoj).

Kompreneble, mi pli ŝatas la unuan version en la franca, de tiom longe mi konas ĝin, sed “vidaĵoj” kaj “instigas” plene taŭgas por redoni vortojn, vole mildigitajn en la franca ĉar ni estas en monduma medio. La didaskalio (*Tartufe*) *tire un mouchoir de sa poche* estas tre bone redonita per *Eltiras puntan tukon el sia poŝo* ĉar *mouchoir* nun resendas al triviala naztuko, sed en riĉa burĝa familio de la 17^a jarcento ĝi tutcerte estis ornamaĵo.

La tria delikata punkto estas: ĉu la historia fono estas grava kaj necesa por ekzemple neeŭropa leganto kiu konas la nomon de Ludoviko la 14^a, sed eble ne la *Fronon* (ribelon de la Nobeloj kontraŭ la Regentino, patrino de la reĝo, pri kio estas aludo en la verko), kaj evidente ne la Kompanion de la Sankta Sakramento. En la francaj eldonoj plej ofte troviĝas longaj klarigoj pri tiu partio de bigotoj, integristoj, kiuj batalis kontraŭ la vivmaniero de la popolo, eĉ de la juna reĝo mem, opiniante ĝin tro gaja kaj leĝera. Sufiĉas kompreni ke la akra kritiko estas kontraŭ hipokrituloj kiel Tartufo, kies nomo, famiĝinta danke al Moliere, devenas, tra la itala, de ‘trufo’, ĉar tiu fungo kaŝas sin. Cherpillod bone elektis ne pezigigi la tekston per multnombraj



piednotoj kiel en la francaj eldonoj por studentoj, sed klarigas per la kunteksto kaj per pli simplaj esprimoj.

Tiel tradukita, la rakonto estas tre agrable legebla, la stilo flua, kaj ni tutcerte ne povas imagi kiom da klopodoj necesis por atingi tiun ŝajnan simplecon.

Ĉu temas pri komedio kiel indikis Moliero? Jes, la fino ne estas malfeliĉa, kaj kelkaj dialogoj, ĉefe tiuj estritaj de Dorina, estas ege amuzaj kaj bone redonitaj. Ni retrovas metitrukojn de la komedia ĝenro: ekzemple, ripetado. En la kvara sceno de la unua akto, inter la rehejmeniranta Orgono kaj Dorina:

– Kion oni faris ĉi tie? Kiel oni fartas?

– Sinjorino suferis febron...

Sed Orgono ne interesiĝas pri sia edzino kaj la sekva demando estas:

– Kaj Tartufo?

– Li fartas admirinde, dika kaj grasa, kun mieno freŝa kaj buŝo brile ruĝa.

– Kompatindulo!

– Vespere ŝi suferis pri naŭzo...

– Kaj Tartufo?

– ...devote li manĝis du perdrikojn kun la duono de haketita ŝaffemuraĵo.

– Kompatindulo!

Tiu vorto estas kvinfoje ripetata kaj Dorina plaĉe konkludas la seneliran dialogon:

– Mi tuj anoncos al Sinjorino la parton, kiun vi prenas en ŝia resaniĝo.

Same aliffoje Orgono ne kapablas klarigi sian amon al Tar-

tufo, sed nur malpermesas al la familianoj prononci pli ol unu vorton. La legita traduko, kiel la originalo, efike vekas ridon.

Sed ni ankaŭ ĝuas intelekte la bone redonitajn argumentojn de Tartufo kiu kapablas pravigi ĉion laŭ jezuitaj argumentoj, t.e. eldiri striktajn ĝeneralizaĵojn, sed tamen konsenti esceptojn en specifa kazo (kazuistiko). La du scenoj inter Tartufo kaj Elmira estas tre ĝuindaj ankaŭ en la traduko. Kiam li deziras delogi Elmiran, Tartufo rivelas sian veran naturon. Ekzemple en la kvina sceno de la tria akto: *Estas vere, ke la ĉielo malpermesas iujn kontentigojn, sed oni povas trovi kun ĝi kelkajn interaranĝojn.*

En 1997, kiam mi spektis ĉi tiun verkon ĉe la *Comédie Française*, la franca nacia elstara teatro, la aktoro Philippe Torreton komplete nudigis sin en bela maniero, tute nekutima tiam en tiu loko. La reĝisoro klarigis: *Tartufo sin senvualigas, mi senvualigas lin kaj Torreton taksas la scenon voluptodona.* Kiam oni spektas ĝin en la reto, vere ĝi estas, la spektantaro ridegas, kaj la agmaniero de Tartufo estas triviala. En la traduko, tiu aspekto estas tamen pli ĝentila.

Do, post eble unua elreviĝeto, la traduko aspektas tre plaĉa je la legado kvankam iom mildigita: ĝi ja devas plaĉi al tutmonda legantaro, kaj ĝi devus esti (kaj ja estas) inda je enscenigo. Alivorte, la laboro de Cherpillod estas multaspekta kaj riĉiga. ❀

DISTRIBUA RETO DE KOOPERATIVO DE LITERATURA FOIRO

F: filio – A: agente – D: distribuanto – L: libroservo

FILIO akceptas mendojn pri ĉiu varo kaj servo de LF-koop, AGENTO principe peras nur periodaĵojn, DISTRIBUANTO principe peras ankaŭ librojn, diskojn, kasedojn, LIBROSERVO disponas pri kelkaj varoj.

Aŭstralio	A	Nicole Else, 1/359 Pacific Highway, Asquith NSW 2077	IT
Aŭstrio	A	Klaus Perko, Lendkai 111, 8020 Graz	45
Belgio	A	Flandra E-Ligo, Beeldekenstraat 169, 2060 Antwerpen	45
Brazilo	D	Brazila Esperanto-Ligo, SDS Ed. Venâncio III Sala 303, 70393-900 Brasília-DF	IT
Britio	A	Hilary Chapman, 8 Vardre View Deganwy, Conwy LL31 9TE	33
Bulgario	D	Ivanka Kirĉeva Stojanova, p.k. 701, 9000 Varna	IT
Ĉeĥio	A	Pavel Polnický, Lidická 939/11, 290 01 Podebrady III	IT
Ĉinio	A	Hu Guopeng. Gansu, Jingchuan, renshe ju. CN-744300 tel:86+18609335568	IT
Danio	A	Arne Casper, Bryggervangen 70, 4. tv., 2100 København Oe.	340
Estonio	A	Eesti Esperanto Liit, Raekoja plats 14, 10146 Tallinn	IT
Finnlando	A	Literatura Foiro, PL 87, 00531 Helsinki – IBAN FI48 80001770845965	45
Francio	L	Unuiĝo Franca por E-o, 4 bis rue de la Cerisaie, 75004 Paris – pĉk 855.35	45
Germanio	D	EsperantoLand, Lu Wunsch-Rolshoven, Wiciefstr. 9, 10551 Berlin	45
Hispanio	A	Esperanta Naturamikaro, Málaga. IBAN ES6921030146980030051518	45
Hungario	D	Anna Bartek, Táncsics Mihály u. 83. VIII. 81, 1211 Budapest	11900
Islando	A	Islanda Esperanto-Asocio, pk.1081, 121 Reykjavík	IT
Israelo	A	Jeoŝua Tilleman, 97-A Dereĥ-Akko, 26373 Kirjat-Mockin	IT
Italio	A	Perla Martinelli, 20100 Milano – pĉk 72627193	45
	D	Orbis Pictus, V. Branković, Via Parini 5, 34129 Trieste	45
	L	IEF, via Villoresi 38, 20143 Milano	45
Japanio	A	JEI, Wasedamati 12-3, Sinzyuku-ku, Tokyo-to 162 – pĉk 00130-1-11325	IT
Katalunio	A	Victor Solé, Kataluna Esperanto-Asocio	45
Kroatio	A	Orbis Pictus, V. Branković, Via Parini 5, 34129 Trieste	IT
Litovio	A	Irena Alijosiute, Bitininku 2b-11, 08310 Vilnius	IT
Meksiko	A	A.L.Velasco, Marina Nacional 45 Ap. F-5/03, col. Tacuba, 11410 MéxicoDF	IT
Nederlando	L	UEA, Roterdamo, por la konto Ifoi-i (bv sciigi samtempe al LF-koop)	45
Norvegio	A	Anne Karin Bondhus, Morenefare 8 A, 4340 Bryne, konto 0533 05 22870	420
Novzelando	A	David Dewar, 24 Date Crescent, Halswell, Christchurch 8025	IT
Pollando	A	Tomasz Chmielik, ul. Jarzebinowa 3/30, 21-040 Swidnik	160
Portugallio	A	Portugala E-Asocio, rua D-ro João Couto, 6, r/c A, 1500-239 Lisboa	45
Rumanio	A	Julia Sigmond, C.P. 200, 400310 Cluj-Napoca-1	IT
Ruslando	A	Halina Gorecka, ab. ja. 1248, 236039 Kaliningrad	IT
Serbio	A	Zlatoje Martinov, Otona Zupancica 24, 11070 Novi Beograd	IT
Svedio	A	Bertil Nilsson, Biskop Brasks gränd 25, 176 76 Järfälla – pĉk 37 47 48-2	425
	A	BEF, Leif Holmlund, Kågevägen 40 B, 1303, SE-931 38 Skellefteå	“
Svislando	F	Administrejo: CP 928, 2301 La Chaux-de-Fonds – pĉk 12-11114-5	50
	D	KCE, CP 311, 2301 La Chaux-de-Fonds – pĉk 23-2921-8	“
Usono	A	Esperanto-USA, 1335 Stanford Ave, Suite 300, CA 94608	50

Se en via lando mankas peranto, bv. vin adresi al la administrejo!

La abonoj validas por la kalendara jaro.

Internacia abontarifo (IT) 50,– CHF. Suplemento por aervoja sendo: 18,– CHF.

Por landoj ne menciitaj sin turni rekte al LF-koop.

Rabato por Esperantaj Civitanoj: 33,33% por tiuj en Argentino, Bocvano, Brazilo, Ĉeĥio, Ĉilio, Ekvatora Gvineo, Gabono, Hungario, Kostariko, Kroatio, Latvio, Libano, Litovio, Meksiko, Montenegro, Panamo, Pollando, Rusio, Sud-Afriko, Turkio, Urugvajo, Venezuelo;

50% por tiuj en Bulgario, Rumanio, Serbio kaj "sudaj" landoj menciitaj nek ĉi-supre nek ĉi-sube;

66,66% por tiuj en Angolo, Benino, Burkinafaso, Burundio, Eburio, Ganao, Gvineo, Haitio,

Kamerunio, Kenjo, Komoroj, Kongolandoj, Madagaskaro, Malio, Mozambiko, Niĝerio, Niĝerlando, Nikaragvo, Mongolio, Nepalo, Ruando, Senegalio, Tanzanio, Togolando, Vjetnamo, Zimbabvo.

Clayton Kopp

HU ISSN 0393-2905
17002
9 770393 290005

M



R